

EL POPOLA ĈINIO

中國報道
2 1981





Dolĉaj konfinitaj
kratag-fruktoj

La infanoj ŝatas
eksplozigi petardojn.



Kampanoj ŝatas porti tiajn tradiciajn kontraŭfrostajn ŝuojn faritajn el lan-herbo, unu el la tri trezoroj de nordorienta Ĉinio. (La aliaj du estas ginsengo kaj zibela felo.)



Papertondajoj kaj novjaraj pentraĵoj faritaj de bel-artistoj por la Printempa Festo.



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Rikolto de trapoj (Novjara pentraĵo)
de ZHENG KEXIANG

SUR LA DORSKOVRILO:

Nova vojo en Yanshan-monto
(Kolora lignogravuraĵo)
de TONG BAOHUA, CHEN
BEI kaj LIANG ZHAOCUN

KOLORAJ SERIOJ:


La Printempa Festo en ĉina kamparo
“Subtera Parko”
Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj
La kanto kaj danco de la manĉuroj
Ekspozicio de krizantemoj

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Gruntbovoj en Tibeto
Zhuzhou — nova industria urbo en Hunan-provinco
Trejna centro kune starigita de Ĉinio kaj Usono
Pentristeto Ma Ling
Vuŝu — ĉina luktoarto

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOJI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La vojo de ĉina moderniga konstruado	2
1000 dolaroj en la 2000-a jaro	7
Malgrandaj hidroelektoj — grava fonto de energio por kamparo	9
Antaŭ la popolan tribunalon	13
KURANTAJ AFEROJ	18
NIA KULTIVEJO: Mi kaj “Petro”	19
Oficiala komuniko de la Akademio de Esperanto	20
La unua mecenato de Esperanto — Aleksandr Zilbernik	21
Esperanto-movado en Changshu-gubernio	22
ESP-NOVAĴOJ	23
KORESPONDI DEZIRAS	25
VIDINDAJ LOKOJ: “Subtera Parko”	26
SUR NIA LIBROBRETO: Bela rakonto	27
Baĉka, mia Baĉka	27
Vojaĝo en mia miela tempo	28
Medio de la homaro alfrontas seriozan krizon	30
Mirinda knabo — viva komputero	34
KULTURAJ NOTOJ	35, 52
Konkobiltoj	36
La Kvina Mezlernejo de Beijing	38
Intervjuo al verkistino Chen Rong	40
En Mezaĝo (Novelo)	42
AMIKECO: La Yunnan-a Pekin-opera Trupo en Eŭropo	45
SPORTO	47
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Vizito al la Ruino de Ĝardeno Yuanmingyuan	48
KALEJDOSKOPO	50
INTER NI	52



Nova akvoutiliga konstruaĵo, kiu povas irigacii 7,000 hektarojn da agroj.

WANG FENG:

La vojo de ĉina moderniga konstruado

EFEKTIVIGI modernigon de la industrio, agrikulturo, nacidefendo, scienco kaj teknikoj estas la celo al kiu strebas la ĉina popolo en la kuranta jarcento. Por realigi tiun grandiozan planon, la ĉina registaro jam faris multajn gravajn aranĝojn en la pasintaj du jaroj kaj atingis evidentajn sukcesojn. Nun ni koncize klarigas al niaj legantoj pri la vojo de la ĉina moderniga konstruado.

SURBAZE DE LA ĈINA REALECO

La moderniga konstruado de Ĉinio ne estas de tipo de la Okcidento, nek de iu alia lando, sed de originala tipo surbaze de la ĉina realeco.

En la pasintaj 30 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, jam formiĝis relative kompletaj industria sistemo kaj nacia ekonomia sistemo, t.e. Ĉinio jam havas materian bazon por efektiviĝi la modernigon. Sed por fine atingi sian celon, Ĉinio alfrontas ankoraŭ multajn malfacilojn, inter kiuj la ĉefaj estas la multnombreco de la loĝantaro kaj malforta ekonomia bazo.

Ĉinio havas pli ol 900 milionojn da loĝantoj. La tro granda nombro de loĝantaro malhelpas rapidan plibonigon de materia kaj kultura vivo de la popolo unuflanke kaj la kapitalan akumuladon de la ŝtato aliflanke, kio sendube influas la rapidecon de la moderniga konstruado.

Krome, la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produktado neeviteble postulos relativan pliigon de kapitalo pri teknikaj ekipaĵoj kaj relativan malpliigon de laborfortoj. Tiu kontraŭdiro fariĝos ĉiam pli akra kun la efektiviĝo de la kvar modernigoj.

La ekonomia bazo de nia lando estas malforta. La malnova Ĉinio antaŭ la Liberiĝo estis lando malriĉa. Tiam ĝiaj industrio, agrikulturo, scienco kaj teknikoj estis tre subevoluintaj. Post la 30-jara diligenta laborado la ĉina popolo akiris ĝojindan sukceson: La totala produktovaloro de industrio pliigis de 14 miliardoj da juanoj ĝis 459 miliardoj da juanoj, la tota-

la produktokvanto de greno pli-
iĝis de 113 milionoj da tunoj ĝis
332 milionoj da tunoj, kaj la
nacia enspezo pliiĝis pli-ol-ok-
oble laŭ kompareblaj prezoj.
Sed la po-kapa kvoto de ŝtalo,
greno kaj la nacia enspezo estas
tre malgranda.

Oni devas rimarki, ke la dek-
jara plago de la kultura revolu-
cio serioze detruis la ĉinan eko-
nomion kaj puŝis ĝin al la rando
de bankroto. La plago kaŭzis al
Ĉinio ekonomian perdon de ĉ.
500 miliardoj da juanoj kaj
denove pligrandigis la jam mal-
grandigitan distancon en la
scienca kaj teknika nivelo inter
Ĉinio kaj evoluintaj landoj. La
historio montris, ke la kresko de
la ŝtataj fortoj baziĝas sur long-
tempa akumulado kaj ankaŭ la
kulturado de sciencistoj kaj tek-
nikistoj bezonas longan tempon.

Kiel supre dirite, la multnom-
breco de la loĝantaro, la malfor-
teco de la ekonomia bazo, la
aktualaj malfaciloj en ekonomio
kaj la postĝinteco en scienco
kaj teknikoj estas niaj ĉefaj
malfaciloj por efektiviĝi la kvar
modernigojn. Sed Ĉinio estas

vasta kaj riĉe naturdotita lando
kun areo de 9,600,000 kvadrataj
kilometroj. Ĉinio havas ne nur
abundajn mineralojn kaj ĉiujn
aliajn naturajn rezervejojn, sed
ankaŭ diversajn favorajn natu-
rajn kondiĉojn por disvolvi
agrikulturon, forstokulturon,
brutobredadon, helpajn okupojn
kaj fiŝadon. Tiuj kondiĉoj kune
kun la jam starigita industria
bazo ebligas al ni konstrui kom-
pletan modernan nacian ekono-
mian sistemon.

Eliri el la ĉina realeco kaj
lernadi de fremdaj landoj iliajn
avangardajn sciencojn, teknikojn
kaj sperton de ekonomia admi-
nistrado, por servi ilin al la
ĉina socialisma sistemo, tio estas
la vojo de la ĉina moderniga
konstruado.

LA NORMO DE MODERNIGO

Kio estas la normo de moder-
nigo? Ĝia koncepto devas
esti la modernigo de la tuta
socio. Sed tiu ĉi artikolo trak-
tas nur la nacian ekonomion.
Koncerne tion ekzistas diferen-
caj normoj en la mondo. Iuj
opinias ke la modernigo estas

industriigo, kaj aliaj opinias, ke
ĝin markas la monda avangarda
nivelo de la po-kapa kvoto de
totala nacia produktovalor.

Ni opinias, ke industriigo ne
egalas al modernigo. Se indus-
triigo signifus modernigon, do
Ĉinio jam efektivigus modernigon,
ĉar ĝia industrio konsisti-
gas jam 75% de la nacia ekono-
mio kaj ĝia agrikulturo nur
25%.

Ankaŭ la lasta aserto estas
evidente ne konvinka. Ekz. la
po-kapa kvoto de totala nacia
produktovalor de iu lando
abunda je petrolo jam supe-
ris tiun de Usono, sed ĝi havas
nur petrolan industrion kaj mal-
havas modernan industrian sis-
temon, por ne paroli pri relative
kompleta moderna nacia ekono-
mia sistemo.

La moderniga konstruado de
la ĉina tipo estas modernigo de
industrio, agrikulturo, nacidefen-
do, scienco kaj teknikoj, t.e.
ekipi la ĉefajn branĉojn de la
nacia ekonomio per nunaj avan-
gardaj teknikoj. Ĝi inkluzivas
ne nur modernigon de la pro-



Novaj loĝdo-
moj en Beijing

duktaj rimedoj de industrio kaj agrikulturo, sed ankaŭ tiun de la produkta strukturo, kaj tiun de scienco kaj teknikoj, kiuj ludas decidan rolon en la moderniga konstruado.

Tie ĉi ni devas montri, ke la kapitalisma modernigo alportis al la koncernaj landoj altnive-lajn sciencon, teknikojn kaj ma-terian civilizacion, sed ĝi kaŭzis malignan ŝveliĝon de iliaj urbe-joj, seriozan polucion de la atmosfero ktp. En nia moderni-ga konstruado ankaŭ ni alfron-tas la samajn problemojn kaj nepre prenos necesajn rimedojn por preventi la atmosferan polu-cion, laŭplane konstruos sateli-tajn urbojn por bridi la senliman disvolviĝon de urbegoj, disvol-vos agrikulturajn, industriajn kaj komercajn kombinaĵojn kaj konstruos novan socialisman kamparon por fine likvidi la diferencon inter urboj kaj kam-paro.

LA INDUSTRIA KAJ AGRIKULTURA MODERNI- GO DE ĈINIO

En la konkretaj cirkonstancoj de Ĉinio, nia moderniga kons-ruado havas siajn trajtojn kaj iras sian propran vojon de dis-volvigo.

Ni prenu kiel ekzemplon la devenon de la kapitalo por in-dustria modernigo. Ni absolute ne devas preni rimedojn de pre-mado kaj ekspluatado por aku-muli kapitalon, nek devas sim-ple utiligi fremdlandajn kapita-lon kaj teknikojn en disvolvo de industrio kaj efektiviĝo de indus-triigo, nek devas oferi la inte-resojn de kamparanoj aŭ neglek-ti la altigon de la vivnivelo de la popolo por akumuli kapitalon kaj efektiviĝi modernigon. En efektiviĝo de sia industriigo, Ĉinio sin apogas ĉefe sur la pro-praj fortoj kaj sur sia propra kapitalo-akumulado, kaj sam-

tempe klopodante por akiri eblajn helpojn de fremdaj lan-doj. Tiamaniere ni iom post iom efektiviĝos industriian moderni-gon laŭ la principo de konstruo de memstara nacia ekonomia sistemo.

Koncerne la rapidecon de konstruado, Ĉinio faros stabilan aranĝon laŭ sia realeco. Ĝi difinos racian kapitalo-akumu-lon (ekz. 25%) kaj stabilan rapi-decon de kreskado (ekz. la mez-nombra kreskado ĉiujare estos 6-7%). Tro alta procento de akumulo premos la konsumon de la popolamasoj kaj malhelpos ilian aktivecon. Pri tio ni jam havis lecionon. La ŝtato devas klopodi por ke la enspezo kaj elspezo de la financo estu en ekvilibro, kaj la kurzoj estu stabilaj. Oni devas fosi la laten-tajn fortojn, fari teknikajn reno-vigon kaj reformon al la ekzis-tantaj entreprenoj kaj samtempe disvolvi entreprenojn grandajn,

Avangarda fremdlanda ekipaĵo enkondukita de la Beijing-a Dua Lan-tekstila Fabriko



mezgrandajn kaj malgrandajn en la industria produktado.

La nombro de kamparanoj de Ĉinio konsistigas ĉ. 80% de ĝia totala loĝantaro, tial ĉiu agrikultura loĝanto meznombro posedas relative malmulte da tero kaj aliaj naturaj rezervoj. En la agrikultura modernigo Ĉinio devas laŭeble utiligi la avantaĝon de siaj grandnombraj loĝantoj, plene uzi la teron kaj altigi hektaran produktokvanton. Oni devas vidi ne nur la 100 milionojn da hektaroj da agroj, sed ankaŭ ĉ. 900 milionojn da hektaroj da vasta tero, disvolvi tieajn agrikulturon, forstumon, brutobredadon, helpan okupadon kaj fiŝadon laŭ iliaj malsamaj naturaj kondiĉoj.

Ĉar la ĉina agrikultura bazo estas malforta, la enspezo de kamparanoj malmulta, kaj la kamparaj laborfortoj estas tro multaj, la monrimedoj por efek-

tivigi la agrikulturan modernigon kaj la eliro de la superflujaj laborfortoj en la estonteco estas malfacile solveblaj grandaj problemoj. Pro tio ni devas iri la vojon de kombinado de agrikulturo kaj industrio, de urbo kaj kamparo, de funkciigo de agrikulturaj, industriaj kaj komercaj kombinatoj kaj de komuna disvolviĝo de urbo kaj kamparo. (Vd. "En Kombinato de Agrikulturo, Industrio kaj Komerco", N-ro 11 de 1980, EPĈ) Oni devas fari produktadon de diversaj formoj. Nur tiamaniere la kamparanoj kaj kamparo povas riĉiĝi rapide, dependante de kapitalo-akumulado de agrikulturo kaj helpo de la ŝtato.


La ĉina agrikulturo havas longan historion kaj tradicion de zorgema terkulturado. Sed ĝiaj modernaj teknikaj ekipaĵoj estas malmultaj kaj la kultura nivelo de la kamparanoj malalta. Tial oni devas doni grandan atenton

al eduko pri agronomio, plenforte ĝeneraligi agronomiajn sciojn kaj efektivigi sciencan terkulturadon. Pro tio la agrikultura modernigo de Ĉinio devas estis kombini la agrikulturan meĥanizadon kun avangardaj agronomiaj scienco kaj teknikoj kaj zorgema terkulturado.

PROBLEMOJ EN LA MODER-NIGA KONSTRUADO

La nuna socialisma ekonomia sistemo de Ĉinio formiĝis en la komenco de la kvindekaj jaroj. Ĝi karakteriziĝas per alta centralizado, kaj la ekonomiaj aktivadoj de entreprenoj estas rekte direktataj de administraciaj organizoj. Tia ekonomia administracia sistemo estas neutila por disvolvi la aktivecon de entreprenoj kaj laborantoj kaj samtempe limigas disvolvon de la produktaj fortoj. Tial nun Ĉinio devas plenforte konduki reformon de ekonomia sistemo,

Parto de la Zhengzhou-a Alumina Fabriko — la plej granda nefer-metala kombinumo de Ĉinio





La Dandong-a Mezurila kaj Instrumenta Fabriko de Liaoning-provinco produktis plurspecajn perfektajn mezurajn instrumentojn. La foto montras, ke laboristinoj alĝustigas 400-kilovoltan X-radian fendo-detektilon por industria uzo.

por ke la entreprenoj posedu necesajn rajtojn mem decidi produktan direktadon, varbadon de personoj kaj profito-distribucion. Tia reformo ne neas la socialisman posedsistemon de produktaj materialoj, sed utilas al ĝia firmiĝo kaj disvolviĝo.

La socialisma laŭplana ekonomio havas grandan superecon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, realiĝis socialisma komuna posedsistemo de produktaj materialoj, kio ebligis al ni reguligi la produktaĵojn per plano inter la branĉoj de la nacia ekonomio. Sed la skalo de tiu plana reguligo devas esti konforma al tiutempaj ekonomiaj kondiĉoj. La varoj, kiuj havas speciale gravan signifon por la nacia ekonomio kaj la popola vivo, devas esti rigore regataj de la ŝtata plano. La ordinaraĵoj de multaj specoj, kiujn la ŝtata plano ne povas enteni, devas esti reguligataj per merkato. En la pasinteco, la ŝtato trudis al la lokaj entreprenoj tro multajn limigojn pri la varoj produktataj

de ili, tial la interŝanĝo de varoj en la socio estis malhelpata, kaj la disvolviĝo de produktado bridita kaj la plibonigo de kvalito de varoj katenita. (Vd. "Reformo de la Ekonomia Administra Sistema de Ĉinio" en N-ro 11 de 1980, EPĈ.) Pro tio, en la moderniga konstruado ni ne devas neglekti laŭplanan produktadon kaj samtempe devas disvolvi la reguligan rolon de merkato. La laŭplana kaj merkata reguligo kun la antaŭa kiel la ĉefa rimedo povas puŝi la disvolvigon de var-produktado kaj rapidigi la paŝojn de la moderniga konstruado.

La moderniga konstruado de Ĉinio sin apogas sur siaj propraj fortoj. Sed tio ne signifas fari konstruadon post fermita pordo. Enkondukante avangardajn teknikojn de fremdaj landoj, Ĉinio devas plene uzi la ekzistantajn entreprenojn kaj ekipaĵojn kaj kombini la enkondukitajn teknikojn kun disvolvo de la nunaj produktaj fortoj kaj altigo de la enlanda nivelo de fabrikado.

En la pasintaj jaroj Ĉinio enkondukis kompletojn da ekipaĵoj. Kvankam ilia proporcio en nia ekonomio estas ne granda, tamen ili ludas bonan rolon en iuj branĉoj.

Ĉinio devas unuflanke resumi siajn proprajn spertojn en la moderniga konstruado kaj aliflanke lerni de evoluantaj landoj iliajn avangardajn sciencojn kaj teknikojn kaj administradon de entreprenoj. Sed Ĉinio absolute ne ŝanceliĝos pri sia socialisma sistemo. Tial la modernigo de Ĉinio ne estas okcidentigo, nek kapitalismigo, sed havas sian propran vojon.

Sur la vojo de moderniga konstruado Ĉinio certe disvolvos sian rilaton kun la evoluantaj landoj de la mondo. La apero de la prospera Ĉinio en la mondo estos konforma al la intereso de diverslandaj pacamaj popoloj. Ĝuste pro tio la moderniga afero de la ĉina popolo certe estos zorgata kaj subtenata de ĉiuj pacamaj landoj kaj popoloj.

1000 dolaroj en la 2000-a jaro

KIA estos la ĉin-tipa modernigo je la fino de ĉi tiu jarcento? Kian normon ĝi devos atingi? La ĉinaj ŝtatgvidantoj proponis, ke la totala produktovalorado de la nacia ekonomio atingi, en la 2000-a jaro, la nivelon de 1,000 usonaj dolaroj por ĉiu popolano. Tiam Ĉinio fariĝos "socio riĉeta".

Tiu propono vekis grandan intereson kaj vastan diskuton inter la ĉinaj popolanoj. Iuj deputitoj, kiuj ĉeestis la Trian Sesion de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, diris, ke la proponita celajo estas tre bona, klara kaj efektivebla.

Po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado estas mezurilo vaste uzata nuntempe en taksado de la produktonivelo kaj vivnivelo de la landoj. De lastaj jaroj nemalmultaj landoj aplikis usonan valuton en kalkulo de sia totala produktovalorado kaj mezuras per ĝi la gradon de modernigo kaj la nivelon de ekonomia disvolvigo. La totala produktovalorado de nacia ekonomio, laŭ kutimo de iuj landoj, konsistas el jenaj tri partoj: unue, nacia enspezo (neta produktovalorado de industrio, agrikulturo, konstruado, transportado kaj komerco); due, devaloriga kosto de fiksa kapitalo; trie, neta enspezo de neproduktivaj fakoj.

Kiom estas la po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado en Ĉinio nuntempe? Laŭ la statistiko de koncerna institucio, la po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado en 1979 estis 253 usonaj dolaroj, tio signifas ke ĝi devos kvarobliĝi por atingi la sumon de 1,000 usonaj dolaroj en la 2000-a jaro. Kompreneble, eĉ post atingo de tiu celo, nia lando estos ankoraŭ sub la nivelo de la nunaj riĉaj landoj. Sed tamen tio signifas ke la totala produktovalorado de la nacia ekonomio de Ĉinio tiam atingos 1,100 miliardojn da usonaj dolaroj. Kiam ni atingos tiun nivelon de ekonomia disvolvigo, certe ŝanĝiĝos la malriĉa, postiginta fizionomio de Ĉinio kaj iom post iom nia lando iros la vojon de abundeco kaj riĉeco. Plie, dank' al la racia distribua socialisma sistemo kaj la diligenteco kaj ŝparemo de la ĉinoj, certe multe boniĝos iliaj vivkondiĉoj post kiam tiu ĉi celajo estos atingita.

Ĉu tiu celajo estos atingebla?

Statistiko de 1979 montras ke la po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado de Shanghai (Ŝanhajo) jam superis 1,000 usonajn dolarojn kaj tiuj de Beijing (Pekino) kaj Tianjin (Tiangin) jam proksimas al tiu nombro.

Sichuan estas provinco kun plej multe da loĝantoj (97 milionoj). La po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado de la provinco en 1979 estis nur 200 usonaj dolaroj, ĝi estas sub la meznombro de tiu de ĉiuj provincoj de la lando. Kiel do oni devas klopodi? La deputitoj de Sichuan respondis: Sichuan abundas je akvoenergiaj riĉfontoj utiligeblaj, el kiuj apenaŭ 5 procentoj estas utiligitaj kaj la ceterajn oni povas ekspluati estonte. La kresko de energioprovizo akcelos la disvolviĝon de industrio kaj agrikulturo. En Sichuan la malpeza industrio okupas relative malgrandan lokon, la maŝinfabrika industrio funkcias ne tre bone, 27 milionoj da hektaroj da stepoj, arbaroj kaj akvoj en la provinco ankoraŭ ne estas bone utiligataj. Se oni plene utiligos ĉiujn supre menciitajn avantaĝojn, oni povos atingi la nivelon de 820 usonaj dolaroj de po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado en la 2000-a jaro kaj post plua strebado dum 2 aŭ 3 jaroj atingi la nivelon de 1,000 dolaroj.

Laŭ statistiko la po-kapa kvoto de totala nacia produktovalorado de Heilongjiang-provinco en 1979 estis 366 dolaroj. La popolanoj de tiu provinco planis ke en 1995 ili atingos la celajon de 1,000 dolaroj. En la provinco

troviĝas vasta fekunda tero, kie oni povas establi bazlokon de greno. La provinco produktas abunde sojfabon, lignon, drogojn kaj felojn. La 14-a brigado de Yinhe-a Popola Komunumo en Gannan-gubernio produktis 2,000 tunojn da greno en 1979 kaj vendis al la ŝtato 1,410 tunojn. La totala enspezo de la brigado estis 950,000 juanoj, meznombro 1,350 juanoj por ĉiu membro (870 dolaroj). Ĉijare tiu ĉi brigado faris plian progreson en agrikulturo, forstokulturo, brutobredado kaj flankaj okupoj. Espereble ili pliproksimiĝos al 1,000 dolaroj.

1,000 dolaroj en la 2000-a jaro signifas ke la vivkondiĉoj de la ĉinaj popolanoj tiam pliboniĝos konsiderinde, la eduka afero multe disvolviĝos; televidiloj, lavmaŝinoj, fridujoj kaj aliaj altkostaj kaj nefacile eluzeblaj konsumaj varoj grandnombre enfluos en la ordinarajn familiojn de laboristoj kaj kamparanoj. La viando, ovo, sukero, lakto kaj aliaj nutraĵoj okupos pli kaj pli grandan procenton de la manĝaĵoj. Kaj la loĝkondiĉoj kaj vivmedio multe pliboniĝos.

Sed por efektiviĝi tiun ĉi perspektivan planon la ĉina popolo devas fari penegon: unue, tutforte limigi kreskon de la loĝantaro. Se en la venontaj 20 jaroj la totala nacia produktovaloro kreskos 7.5 procentojn ĉiujare, nia po-kapa kvoto de totala nacia produktovaloro atingos 1,000 dolarojn en la 2000-a jaro, se nur laŭplana naskado estos bone farita kaj ĉiuj geedzaj paroj naskipovaj havos meznombro po 1.5 bebojn (se tiel, en la 2000-a jaro nia loĝantaro atingos 1,125 milionojn). Se la kresko de la loĝantaro superos tiun ciferon, prokrastiĝos la efektiviĝo de tiu celajo.

Due, aktive ekspansiigi la nentan enspezon de la neproduktivaj fakoj. En iuj disvolviĝintaj landoj neta enspezo de la neproduktivaj fakoj (plus devaloriga kosto de fiksa kapitalo) ĝenerale konsistigas 25 procentojn de la totala naciekonomia produktovaloro, kiam ĝia po-kapa kvoto de totala nacia produktovaloro atingis 1,000 dolarojn. Nun nia neta enspezo de la neproduktivaj fakoj (plus devaloriga kosto) konsistigas nur 12-13 procentojn de la nacia totala produktovaloro. Tial aktive disvolvi medicinan-higienan aferon, turismon, servan aferon por multe pligrandigi la proporcion de ilia enspezo en la totala naciekonomia produktovaloro estas tre utila por efektiviĝi la celajon de 1,000 dolaroj.


Laŭ iuj historiaj materialoj, FR Germanio bezonis 9 jarojn, Japanio 18 jarojn, Francio 9 jarojn, Italio 16 jarojn, Sovetunio fakte 24 jarojn kaj Usono 41 jarojn por ke ilia po-kapa kvoto

de totala nacia produktovaloro kresku de 250 aŭ 300 dolaroj ĝis 1,000 dolaroj respektive. Kvantkam Ĉinio alfrontas malfavorajn kondiĉojn de multeco de loĝantoj kaj malalta teknika nivelo, tamen ĝi jam havas konsiderindan materian bazon metatan dum la pasintaj 30 jaroj en la socialisma konstruado kaj la ĉina popolo diligenta kaj brava prenis lecionojn en sia malsukceso kaj daŭre konstruas sian landon ĉefe per siaj propraj fortoj kaj samtempe kun internaciaj helpoj. Mi kredas, ke ĝi povos finiri, en 20 jaroj, la vojon de industria modernigo kiun iris la supre menciitaj landoj.

(Noto de la Red.: la totala nacia produktovaloro de malsamaj landoj estas kalkulata ne en tute sama maniero. Tial estas ne tute science mezuri per ĝi la diferencon inter diversaj landoj; ĝi estas nur por referenco.)

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
			32.0	9365
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	32.0	9365
			25.7	11650
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.3	15510
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145



Reprezentantoj de membro-landoj de la Organizo por Industria Disvolviĝo de UN vizitas la Shuang-long-an Hidroelektrajn en Jinhua-gubernio de Zhejiang-provinco.

WANG TAO:

Malgrandaj hidroelektrejoj—grava fonto de energio por kamparo

NUN, kiam la mondo implikiĝas en manko de energio, lama provizado de brulmaterialoj kaj konstanta altiĝo de petrola prezo, internacie ĝeneralan intereson altiris la fakto, ke Ĉinio donis grandan atenton al la disvolvo de malgrandaj hidroelektrejoj por liveri energion bezonatan en modernigo de la kamparo.


En la lasta tagdeko de okt., 1980, komisie de la Organizo por Industria Disvolviĝo de la Unuiĝintaj Nacioj, la Ĉina Akvo-mastruma Ministerio kunvokis

la internacian kunvenon pri malgrandaj hidroelektrejoj en Hangzhou (Hangĝou), Ĉinio. La kunveno havis lokon en Ĉinio ja pro tio, ke en la unua internacia kunveno tiufaka, kiu okazis en Nepalo en 1979, ĉinaj delegitoj prezentis siatempe la disvolvon de malgrandaj hidroelektrejoj en Ĉinio kaj tio vekis vivan intereson ĉe la kunvenantoj el diversaj landoj. Kaj ĉifoje la kunvenon ĉeestis entute 46 delegitoj kaj hidroelektristoj el 25 landoj de diversaj kontinentoj de la mondo. Ili interŝanĝis

siajn spertojn rilate al la praktikaj teknikoj kaj la disvolvo de malgrandaj hidroelektrejoj.

90,000 MALGRANDAJ HIDROELEKTREJOJ

La akvoenergiaj riĉfontoj en Ĉinio nombris 680,000,000 kilovattojn kaj interalie tiuj por malgrandaj hidroelektrejoj, 150,000,000 kilovattojn, el kiuj duono estas ekspluatebla. Malgrandajn hidroelektrejojn karakterizas malgranda skalo, relative simpla tekniko, mallonga tempo por konstruado, oportuna admi-




La Panxi-a Tria-ŝtupa Hidroelektrajo de Jinyun-gubernio

nistrado, facila profito-dono kaj taŭgeco por esti entreprenitaj de gubernioj, popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj; kaj tial, samtempe kun la forta disvolvo de hidroelektrajoj grandaj kaj mezgrandaj, la ĉina registaro ankaŭ donis sufiĉan atenton al konstruado de la malgrandaj.

Ĝis septembro, 1980, en la lando jam konstruiĝis pli ol 90,000 malgrandaj hidroelektrajoj, dissemnitaj en la vasta kamparo apartenanta al pli ol 1,500 gubernioj kaj urboj. Ilia totala kapacito atingis 6,800,000 kilovattojn, t.e. pli-ol-tri-oblo de tiu de ĉiuj hidroelektrajoj kaj termoelektrajoj en la unuaj jaroj post la Liberiĝo. En 1979, la malgrandaj hidroelektrajoj produktis 11,900,000,000 kv.-horojn

da elektro kaj tiu kvanto superis trionon de la elektro-konsum-kvanto de la tuta kamparo. Pli ol 720 gubernioj de la lando uzas ĉefe elektron de siaj malgrandaj hidroelektrajoj en la produktado de industrio kaj agrikulturo kaj en lumigo. Nun en Ĉinio estas 12,000 malgrandaj hidroelektrajoj en konstruado, kies totala kapacito estos 3,500,000 kilovattoj.

La malgrandaj hidroelektrajoj en Ĉinio estas konstruitaj plejparte de popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj per propraj kapitalo kaj materialoj; la ŝtato ilin helpis nur per malmulta subvencio kaj la ŝtata banko per malgranda pruntedono. Ĉar la investitaj sumoj estas malgrandaj, ili estas facile reakire-




La Chahuadun-a Akvorezervejo kun volumeno de 1,050,000 kubmetroj kaj kluzo alta je 23 metroj estas reguliga akvorezervejo de la Panxi-a Kvina-ŝtupa Hidroelektrajo.

blaj per la funkciado de la elektrajoj.

PLENA UTILIGO DE AKVO-ENERGIAJ RIĈFONTOJ

Dum la menciita kunveno, la delegitoj kaj hidroelektristoj el diversaj landoj informiĝis pri la disvolvo de malgrandaj hidroelektrajoj en Zhejiang (Ĝeĝiang)-provinco kaj speciale veturis al ĝiaj gubernioj Jinhua (Ĝinhua) kaj Jinyun (Ĝinjun) por fari ĉelokan esploron.

80 procentoj de la tuta areo de tiu apudmara provinco en sudorienta Ĉinio estas montregionoj. Malabunda je karbo kaj petrolo, ĝi tamen riĉas je akvoenergiaj riĉfontoj. Nun la respektiva kapacito de la malgrandaj hidroelektrajoj en 24 el ĝiaj 43 gubernioj kaj urboj, kiuj havas akvoenergiajn riĉfontojn, jam superis 10,000 kilovattojn. Same kiel ĉe aliaj lokoj en la



industrion kaj la agrikulturon per elektro.

La ekspluatado de la akvoenergia riĉfonto de Meixi-rivero en tiu ĉi gubernio vekis apartan intereson ĉe la vizitantoj. La torento kun longeco de 54 km. serpentumas tra valoj kaj poste sin direktas en montet-regionon. Ĝuste ĉi tie oni konstruis du malgrandajn akvorezervejojn kun kapacito de 68,500,000 kubmetroj kaj, profite el la nivel-diferenco de la torenta fluejo, starigis 5 ŝtupajn elektrejojn kun totala kapacito de 6,760 kilovattoj, kiuj produktas meznombre 16,800,000 kv. -horojn da elektro ĉiujare, dum la eluzita akvo povas akvumi 27,000 hektarojn da agroj. De montsupro ni vidis, ke la malgrandaj hidroelektrejoj, inkrustitaj unu sub alia inter la montoj, donis al ĉi tiu kvieta montregiono signojn de moderneco.

Forlasinte Jinhua, la vizitantoj kun granda intereso veturis per aŭtobuso al Jinyun-gubernio, por pririgardi la ŝtupajn elektrejojn ĉe la negranda torento Panxi, kiu fontas el Dayang-monto kaj longas nur je 30 km. Kiam la aŭtobuso penetris en la montregionon Dayang, ĝi komence ĉirkaŭiris laŭ la valoj inter sinsekvaj verdaj altaĵoj, poste spirale grimpis supren, kaj fine atingis Dayang-akvorezervejon ĉe la supra parto de la torento Panxi. Panxi-ŝtup-elektrejoj disponas ĝuste la akvon el ĉi tiu akvorezervejo. La akvo fluas laŭ konduka kanalo longa je pli ol 20 km. Kaj la tuta nivel-diferenco de ties fluejo estas 660 metroj kaj ebligas la starigon de 5 malgrandaj hidroelektrejoj. Ĉi tie la gastoj pririgardis la elektrejojn ĉe la 1-a, 2-a kaj 3-a ŝtupoj. Suprenrigardante al ili

oni ĝuis bildon grandiozan. Depost kiam tiuj ŝtupaj elektrejoj ekfunkciis en 1978, tute ŝanĝiĝis la situacio en Jinyun-gubernio, kie en la pasinteco mankis elektro al la industrio kaj la kamparo.

Respondeculoj de la elektrejo diris, ke ili jam komencis la duatapan konstruadon, post kies plenumiĝo ĉi tie aperos nova mezgranda akvorezervejo kun kapacito de 50,000,000 kubmetroj kaj 2 hidroelektrejoj kun totala kapacito de 16,000 kilovattoj, tiel ke la akvoenergia riĉfonto de la torento Panxi ricevos plenan utiligon.


ŜANGIĜO EN MONT-VILAĜO

Okaze de la vizito de la delegitoj kaj hidroelektristoj al Jinhua-gubernio, mi informiĝis ĉe guberniaj respondeculoj pri la rolo ludata de malgrandaj hidroelektrejoj en disvolvo de la lokaj industrio kaj agrikulturo kaj vizitis Jiulong-brigadon de Shuanglong-komunumo en tiu gubernio.

La gubernio estas fame konata en- kaj eksterlande pro siaj ŝinkoj, sed malfortaj estis ĝiaj industrio kaj agrikulturo en la pasinteco. En la unua periodo post la Liberiĝo ĝi disponis nur malgrandan termoelektrejon kaj la nesufiĉa elektro-provizado terure katenis la kreskadon de ĝia industrio. Kun la konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj, la stato ŝanĝiĝis okulfrape. Fabrikoj agrikulturila, kemisterka, tekstila, tinktura, kemia, akvoturbina kaj elektromotora leviĝis unu post alia. La totala industria produktovaloro de la gubernio pliiĝis de 150,000,000 juanoj en 1976 al 310,000,000 juanoj en 1979.

lando, ĉi tie la hidroelektrejoj ja fondiĝis kune kun la disvolvo de akvoutiliga konstruado. Oni laŭeble uzis la dislokitajn akvoenergiajn riĉfontojn, ĉeloke kolektante konstruajn materialojn kaj ĉeloke starigante elektrejojn. Kaj tiamaniere, ne nur riĉfontoj estas plene utiligataj, sed ankaŭ rapide kontentigitaj estas disaj bezonoj de elektro en la kamparo.

Jinhua-gubernio aplikis multe da metodoj por ekspluati malgrandajn fontojn de akvoenergia. Iuloke oni konstruis akvorezervejojn kiuj ne nur bridas superakvon, sed ankaŭ samtempe produktas elektron; aliloke, profitante el la nivel-diferenco de la riverujoj, oni starigis ŝtupajn hidroelektrejojn por pli bona utiligo de la fluoj; triloke, utiligante la nivel-diferencon de irigaciaj kanaloj oni konstruis malgrandajn hidroelektrejojn por servigi la akvon al pluraj celoj. Nun en la gubernio konstruiĝis 708 akvorezervejoj kaj 206 malgrandaj hidroelektrejoj, kiuj ne nur utilas al inundo-regado kaj irigacio, sed ankaŭ provizas la



La Meixi-a Unua-ŝtupa Hidroelektrejo kun kapacito de 5,000 kilovattoj estas unu el la ĉefaj hidroelektrejoj de Jinhua-gubernio.

Ankaŭ ĝia agrikulturo progresis rapide. En kombino de akvomastromado kun elektroproduktado, la areo de irigaciataj kampoj pligrandiĝis, la nivelo de agrikultura meĥaniziteco plialtiĝis kaj la kapablo kontraŭ inundo kaj sekegeco plifortiĝis. Krome, oni pligrandigis la kemisterkan fabrikan. Sekve de tio la produktokvanto de greno kreskadis. En 1979 ĝi estis 402,000,000 kg., je 107,000,000 kg. super tiu en 1976, dum la hektara produktokvanto pliiĝis de 7,100 kg. al 9,500 kg.

Jiulong-brigado troviĝas en la mont-regiono de tiu gubernio. Kiam mi venis al ĝi, ĝi min bonvenigis kun ridanta pejzaĝo en sia tuta prospereco — novaj domoj viciĝas ĉirkaŭ la monto, sur la ŝoseo de la vilaĝo veturiloj ŝarĝitaj per erco kaj kalko kuras tien kaj reen kiel navetoj, kaj megafonoj disaŭdigas, de tempo al tempo, ĉinajn folklorajn kan-

tojn... Min akceptis la estro de la brigado.

Tiu ĉi brigado konsistas el 148 familioj kun 587 loĝantoj, sed havas je sia dispono nur 6.1 hektarojn da agroj. Estinte, la kamparanoj sin vivtenis ĉefe per ekspluatado de kalkŝtonoj, kalko-preparado kaj kulturado de malmulte da te-arboj, sed kontraŭ sia penlaborado ili ricevis nur kompatinde malgrandan enspezon ĉiujare kaj ne malmultaj devis elmigri aliloken por serĉi vivrimedojn. Post kiam la gubernio starigis malgrandajn hidroelektrejojn, precipe post kiam ekfunkciis Shuanglong-ŝtup-elektrejoj en proksimeco, malmultekosta elektro estis sendita al la kamparanoj en tiu ĉi mont-regiono kaj la malriĉeco en tiu brigado komencis reduktiĝi iom post iom. Nun elektro jam estas aplikata al irigacio kaj drenado, al minajo-ekspluatado, teopreparado, greno-prilaborado

kaj lumigado. Elektro kaj maŝinoj ebligis al la brigado meti pli da laborforto en minajo-ekspluatado kaj kalkopreparado, tiel ke ĝia flankokupa produktado vigle disvolviĝis. La tuta enspezo de la brigado jam leviĝis de 63,000 juanoj en 1966 al 289,000 juanoj en 1979, kaj la meznombra enspezo de ĉiu homo, de 92 juanoj al 293 juanoj.

Dum mia vizito la estro diris al mi kun ĝojo, ke en 1979 ili instalas malgrandan cementan fabrikan, kies jara produktokvanto estas 7,000 ĝis 10,000 tunoj, kaj en 1980 aĉetis 4 kamionojn. Nun jam revenis ĉiuj, kiuj elmigris en la pasinteco pro mizero. La ŝanĝiĝo en tiu brigado elokvente pruvis al ni, ke malgrandaj hidroelektrejoj efektive alportis al la kamparanoj tute novan fizionomion.

En Ĉinio multe da akvoenergiaj riĉfontoj atendas ekspluatado, kaj ankoraŭ disvolviĝanta estas ĝia konstruado de malgrandaj hidroelektrejoj. Sed delegitoj kaj hidroelektristoj el multaj landoj alte taksis la klopodon faritan de Ĉinio ĉiflanke, kaj samtempe elmetis utilajn proponojn por plibonigo. Nun la Organizo por Industria Disvolviĝo kaj la Disvolviĝa Programo de la Unuiĝintaj Nacioj jam decidis establi en Ĉinio internacian centron por esplorado kaj trejnado koncerne al tekniko de malgrandaj hidroelektrejoj. Post sia fondiĝo, tiu centro certe ludos sian aktivan rolon en la disvolvo de malgrandaj hidroelektrejoj tra la mondo.



Antaŭ la popolan tribunalon

LA 20-an de novembro, 1980, komenciĝis publika juĝado de la ĉefaj krimuloj de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing, kion longe atendis la ĉina popolo.

Lin Biao kaj liaj sekvantoj komplotis en septembro de 1971 por murdi prezidanton Mao Zedong kaj fari kontraŭrevolucion armitan puĉon. Pro malkaŝiĝo de sia intrigo, Lin Biao intencis forfuĝi alilanden kun siaj edzino kaj filo per aviadilo, sed pereis en kraŝo ĉe Undur-Han de Mongolio. Post kiam la kontraŭrevolucia kliko estrata de Lin Biao estis malkovrita kaj frakasita, la kvarpersona kontraŭrevolucia kliko kun Jiang

Qing kiel la ĉefo daŭrigis la intrigadon por uzurpi la partian kaj ŝtatan gvidantecon.

Dum la kultura revolucio, tiuj du kontraŭrevoluciaj klikoj en koluzio persekutadis per falsitaj atestoj partiajn kaj ŝtatajn gvidantojn laŭ antaŭdeciditaj paŝoj, uzante intrigajn artifikojn kaj aplikante diversajn rimedojn leĝajn kaj kontraŭleĝajn, publikajn kaj sekretajn, perarmajn kaj civilajn, profitante siajn altajn rangojn kaj povon, kaj klopodis por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato kaj renversi la regpotencon de proletara diktaturo. Ili alportis ne-takseblan katastrofon al nia lando kaj nacio.

Nun, finfine la 10 ĉefkrimuloj de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing estas portitaj antaŭ la historian tribunalon. Ilin akuzis kaj ekjuĝis la Speciala Prokurorejo de la Supera Popola Prokurorejo kaj la Speciala Tribunalo de la Supera Popola Kortumo fonditaj laŭ decido de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.

KRIMINALA KAZO

La Speciala Prokurorejo akuzis la kontraŭrevoluciajn klikojn de Lin Biao kaj Jiang Qing nur pri iliaj kontraŭrevoluciaj



(Daŭrigo de p. 21)

absurdaĵo. Al M. Zamenhof minacis granda puno. Por eviti la punon L. Zamenhof donis al sia patro restintajn 5,000 rublojn kaj mem restis sen mono. M. Zamenhof veturis S. Peterburgon. L. Zamenhof savis sian patron, sed mem ruiniĝis por ĉiam. La enspezoj de L. Zamenhof estis tiel malgrandaj, ke ili kovradis nur parton de liaj plej necesaj kaj plej modestaj elspezoj.

A. Zilbernik subtenadis sian bofilon L. Zamenhof dum 15 jaroj. Li kredis al la ideo de sia

bofilo. Tuj post la apero de Esperanto (26 julio 1887) li ellernis ĝin perfekte, malgraŭ sia neĵuna aĝo, fariĝis fervora esperantisto kaj korespondadis kun alilandaj samideanoj. Li subtenadis sian bofilon ne nur materiale, sed ankaŭ morale. Li konsoladis ĉiam sian bofilon, kiam la espero de tiu ĉi lasta komencis malfortiĝadi. Li havis ĉiam grandan amon kaj interenson por la afero Esperanta, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj, kiuj trovis sin sur lia skribotablo antaŭ lia morto, estis Esperantaj.

A. Zilbernik estis la unua mecenato de Esperanto. Al Zilbernik la esperantistoj multe ŝuldas, ke Esperanto aperis en la mondo, ke ĝi povis trapasi la plej malfacilajn jarojn de sia ekzisto. Sen A. Zilbernik Esperanto hodiaŭ ne ekzistus en la mondo.

En Pazu gatvé (=Pazu strato) en Kovno, Rusio, A. Zilbernik havis domon. En 1925 Pazu gatvé estis nomita Zamenhofo gatvé (=Strato de Zamenhof). En 1941 germanoj okupis Litovion, sovaĝbeste detruis la stratotabulon.

krimoj kontraŭ la kriminala leĝo, sen tuŝo de iliaj eraroj en laboro. Iliaj kontraŭrevoluciaj krimoj nepre devas esti punitaj laŭ la leĝo de la ŝtato. En la pasinteco, iuj fremdlandaj amikoj rigardis la batalon inter la ĉina popolo kaj la klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing kiel batalon inter moderuloj kaj radikaluloj. Tio estas ja miskompreno. En sia akuzo, la Speciala Prokurorejo listigis la kvar ĉefajn kaj 48 specifajn krimojn de tiuj kontraŭrevoluciaj klikoj.

Granda nombro da aŭtentikaj atestoj montras, ke ili absolute ne estas “radikaluloj” kun malsamaj politikaj opinioj sed centpocentaj kontraŭrevoluciaj krimuloj kontraŭ la kriminala leĝo.

PERSEKUTI PER FALSITAJ ATESTOJ

Frue jam en aŭgusto de 1966, kiam Lin Biao laboris kiel vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (CK de KPC) kaj estro de

la Nacidefenda Ministerio, li kaj lia edzino jam falsis materialon por kalumni la ŝtatan prezidanton Liu Shaoqi, kaj inspiris alulon, ke li falsu akuzan materialon kaj poste Lin mem prezentis ĝin al Jiang Qing, kiu estis vicestrino de la tiama Kultur-revolucia Grupo de CK de KPC. En julio de 1967, Jiang Qing kaj aliaj arbitre decidis okazigi kritikan mitingon kontraŭ Liu Shaoqi, persekutis lin kaj lian edzinon kaj traserĉigis ilian domon. La speciala enketa grupo de afero de Liu Shaoqi faris torturadon al koncernaj personoj por falsi atestojn kaj kalumnie akuzis Liu Shaoqi kaj lian edzinon kiel perfidulojn, spionojn kaj kontraŭrevoluciulojn. Fine Liu perdis sian vivon pro ilia turmentado.

La kontraŭrevoluciaj klikoj kalumniis, per elpensitaj krimoj, ankaŭ prezidanton Zhu De, ĉefministron Zhou Enlai kaj grandan nombron da vicĉefministroj kaj marŝaloj, ke ili intrigis por “uzurpi la ŝtatpoten-

con”, “konspiri kun fremda lando” kaj fari “puĉon”. La fame konataj marŝaloj Peng Dehuai kaj He Long mortis pro persekutado.

De 1967 ĝis 1976, 88 membroj kaj kandidataj membroj de CK de KPC, 60 membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj 74 membroj de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco suferis ilian persekutadon.

MALJUSTAJ KULPIGOJ KAJ SUBPREMO AL KADROJ KAJ AMASOJ

Por persekuti kadrojn kaj amasojn la klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing instigis batadon, detruadon, rabadon kaj interbation tra la tuta lando, kaj eĉ fondis spionajn grupojn por spionadi, ŝtelaresti homojn, priserĉi domojn, enkarcerigi senkulpojn kaj kaŝe torturi kaptitojn, kaj fari aliajn faŝistajn aktivadojn.

La Speciala Tribunalo de la Supera Popola Kortumo en juĝado kontraŭ la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing



Dum la dek jaroj de ilia tiranado, miloj kaj miloj da kadroj estis maljuste kulpigitaj kaj persekutitaj de ili kaj ĉie en la lando troviĝis kazoj de maljustaj kondamnoj. Ni prenu la urbojn Beijing (Pekino) kaj Shanghai (Ŝanhajo) kiel ekzemplon. 30 el la sekretarioj de la kompartiaj komitatoj kaj urbestroj kaj vicurbestroj de la du municipoj estis miskulpigitaj kaj 6 el ili mortis de persekutado. Pro la kazo de la t.n. "Popola Revolucia Partio de Interna Mongolio" fabrikita de ili en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, 346,000 kadroj kaj popoloj estis miskulpigitaj kaj persekutitaj kaj 16,222 el ili mortis. Nenombreblaj estas la persekutitoj de ili tra la tuta lando.

KOMPLOTADO POR MURDI PREZIDANTON MAO KAJ FARI ARMITAN PUĈON

En aŭtuno de 1970, post kiam fiaskis la intrigo de Lin Biao preni por si la oficon de

ŝtata prezidanto per paca uzurpo en la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de KPC, li rapidigis sian kovadon de kontraŭrevolucia armita puĉo. En februaro de 1971, Lin Biao kolektis sekvantojn kaj ellaboris planon de armita puĉo, kun la intenco kapti la ŝtatan regpotencon aŭ fari separatisman regadon.

En la 8-a de septembro de la sama jaro, Lin Biao donis sian dekretan por armita puĉo kaj lia filo kaj la ĉefaj membroj de lia speciala taĉmento faris konkretajn aranĝojn por murdi prezidanton Mao. Okaze de la inspektado de prezidanto Mao en orienta Ĉinio, ili komplotis ataki lian trajnon per fajrojetilo kaj 40-milimetra bazuko, detruu per dinamito fervojan ponton trapasotan de la speciala trajno de prezidanto Mao, bombi la trajnon per aviadilo aŭ eksplodigi benzintenujon, apud kiu haltas la trajno, por krei haoson en kiu ili povus murdi prezidanton Mao.

Ne sukcesinte efektiviĝi sian planon murdi prezidanton Mao, la kontraŭrevolucia kliko de Lin Biao intencis fuĝi suden al Guangzhou (Kantono) por spliti la landon kaj starigi alian centran registaron. Post malkaŝiĝo de sia intrigo, Lin Biao kaj aliaj flugis eksterlanden per aviadilo je 32 minutoj post la nulo horo en la 13-a de septembro, sed ili pereis pro kraŝo.


MANOVRADO POR ARMITA RIBELO EN SHANGHAI

Frue jam en julio de 1976, la kontraŭrevolucia kliko de Jiang Qing intencis fondi por si en Shanghai armitajn fortojn. Poste, ili kaptis la komandon de la milicio de tiu urbo. En aŭgusto de 1976, kiam prezidanto Mao estis en danĝera malsano, iliaj sekvantoj en Shanghai urĝe disdonis al la milicianoj 74,000 fusilojn, 300 kanonojn kaj pli ol dek milionojn da kugloj kaj obusoj por armita ribelo.

La 6-an de oktobro, 1976, la kvaropo kun Jiang Qing kiel la ĉefo estis arestita, kaj ĝiaj sekvantoj en Shanghai tuj okazigis urĝan kunvenon en la 8-a de oktobro por fari urĝan mobilizon kaj decidis fari armitan ribelon per la milicio. Sed tiu ribelo estis sufokita en sia embria stato.

POPOLA JUĜO NEESKAPEBLA

El la supraj akuzoj niaj legantoj povas facile eltiri la konkludon, ke la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing estas bando de kontraŭrevoluciaj intriguloj kaj karieristaĉoj. Iliaj malbonfaroj dum ilia 10-jara tiranado alportis senprecedencajn katastrofojn al



la ĉina popolo kaj estas neeble plene listigi iliajn krimojn en unu akuzo. Hodiaŭ ili nepre devas esti juĝitaj kaj punitaj laŭleĝe.

Ĉi tie mi volas aparte rimarkigi, ke dum la kultura revolucio, Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj sekvantoj laŭvole tretis la Konstitucion kaj leĝojn kaj laŭplaĉe kulpigi iun ajn sen ajna atesto, aresti kaj malliberigi sen plenumo de leĝa procedo kaj mortigi sen juĝado. Hodiaŭ, post la frakaso de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing, Ĉinio jam eniris novan periodon por disvolvo de socialisma demokratio kaj plifirmigo de socialisma leĝosistemo. La ĉina popolo nek permesos la ĉefkrimulojn de la klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing resti nepunitaj ekster la leĝo, nek faros juĝon pri ili malserioze, sed rigore laŭ postuloj de la leĝoj. Antaŭ ol la kazo estis transdonita al la juĝa organo, longa preparo kaj multa enketado pri ilia kazo estis faritaj. Poste oni denove faris sufiĉan esploradon en la enketa juĝado kaj prokurora ekzamenado, per-

sistate en la principo juĝi laŭ la leĝoj surbaze de faktoj, ne blinde fidante konfesojn sed ĉiam emfazante atestojn. La akuzoj kontraŭ Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj sekvantoj estis faritaj laŭ ekzamenitaj originalaj skribaĵoj kaj objektoj, kiel dosieroj, leteroj, taglibroj, notoj, protokoloj de paroladoj, sonbendoj ktp.

AKUZO LAŬLEĜA, JUĜADO PUBLIKA

Post enketa juĝado de la Ministerio de Publika Sekureco, tiu kazo estis transdonita al la Supera Popola Prokurorejo en septembro lastjare por ekzameni kaj fari akuzon. La Speciala Prokurorejo faris ekzamenadon de pli ol unu monato pri la aktoj, atestoj kaj skribitaj opinioj pri akuzo kaj pridemandis Jiang Qing kaj la aliajn 9 akuzitojn. La Speciala Prokurorejo konstatis, ke ili malobservis leĝojn kaj devas respondeci pri siaj kontraŭleĝaj agoj, sekve faris publikan juĝadon kontraŭ ili.


La Speciala Tribunalo de la Supera Popola Kortumo ekzamenis la akuzan akton de la Speciala Prokurorejo pri la kon-

traŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing kaj decidis akcepti la proceson, kaj donis, je la 10-a de la lasta novembro, kopiojn de la akto al Jiang Qing kaj la aliaj 9 akuzitoj kaj samtempe sciigis al ili, ke ili povas havigi al si advokatojn.

La akuzo de la Speciala Prokurorejo montras, ke laŭ la "Kriminala Leĝo de la Ĉina Popola Respubliko" Jiang Qing kaj aliaj naŭ ĉefkrimuloj faris respektive krimojn de puĉo, splitado de la ŝtato, armita ribelo, kontraŭrevoluciaj mortigo kaj vundado de homoj, kontraŭrevoluciaj kalumniaj kulpigoj kaj persekutoj, organizado kaj gvidado de kontraŭrevoluciuloj, kontraŭrevolucia agitado, torturado por eldevigi falsan kulpkonfeson, kontraŭleĝa aresto kaj enkarcerigo, kaj devas esti juĝotaj pro siaj agoj kontraŭ la kriminala leĝo. Oni ne plu demandas la kriminalan respondecon de Lin Biao kaj la aliaj 5 mortintaj ĉefkrimuloj.

La juĝado pri Jiang Qing kaj la aliaj 9 ĉefkrimuloj estas farita respektive de la unua kaj dua juĝistaroj de la Speciala Tribunalo. Reprezentantoj de diversaj provincoj, aŭtonomaj regionoj, municipoj, institucioj de CK de KPĈ, organoj de la ŝtata registaro, popolaj organizoj, demokratiaj partioj kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo ĉeestis la juĝadon kiel publikaj aŭskultantoj. 10 advokatoj pledis por la akuzitoj. Scenoj pri la juĝado estis dissenditaj per televido al la tuta lando. Oni diris kun facila koro: De longe la krimuloj de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing jam devas esti punitaj! Hodiaŭ efektiviĝis finfine nia volo, vere ĝojinde!

La aviadilo Trident-256, per kiu Lin Biao kaj liaj sekvantoj forfuĝis post malkaŝiĝo de siaj intrigoj, frakasigis en Undur-Han de Mongolio.



NOTOJ

La 10 ĉefkrimuloj de la kontraŭ-revoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing prijuĝitaj de la Speciala Tribunalo de la Supera Popola Kortumo de la Ĉina Popola Respubliko estas:

Jiang Qing, membro de la Deko Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo, antaŭ la arestiĝo.

Zhang Chunqiao, membro de la Deko Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo kaj membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC, vicĉefministro de la Stata Konsilantaro, estro de la Ĝenerala Politika Departemento de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, unua sekretario de la Shanghai-a Komitato de KPC kaj prezidanto de la Revolucia Komitato de la municipo Shanghai, antaŭ la arestiĝo.

tato de la municipo Shanghai, antaŭ la arestiĝo.

Yao Wenyuan, membro de la Deko Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo, la dua sekretario de la Shanghai-a Komitato de KPC kaj vicprezidanto de la Revolucia Komitato de la municipo Shanghai, antaŭ la arestiĝo.

Wang Hongwen, membro de la Deko Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC kaj vicprezidanto de CK de KPC, sekretario de la Shanghai-a Komitato de KPC kaj vicprezidanto de la Revolucia Komitato de la municipo Shanghai, antaŭ la arestiĝo.

Chen Boda, membro de la Naŭa Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo kaj membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC, antaŭ la arestiĝo.

Huang Yongsheng, membro de la Naŭa Centra Komitato de KPC kaj

ĝia Politika Buroo kaj ĉefstabestro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, antaŭ la arestiĝo.

Wu Faxian, membro de la Naŭa Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo, vicĉefstabestro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj komandanto de la Aera Armeo, antaŭ la arestiĝo.

Li Zuopeng, membro de la Naŭa Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo, vicĉefstabestro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la unua politika komisaro de la Mara Armeo, antaŭ la arestiĝo.

Qiu Huizuo, membro de la Naŭa Centra Komitato de KPC kaj ĝia Politika Buroo, vicĉefstabestro de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj estro de ĝia Ĝenerala Provianta Departemento, antaŭ la arestiĝo.

Jiang Tengjiao, politika komisaro de la aera armeo de la Nanjing-aj Trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, antaŭ la arestiĝo.



Jiang Qing



Zhang Chunqiao



Yao Wenyuan



Wang Hongwen



Chen Boda



Huang Yongsheng



Wu Faxian



Li Zuopeng



Qiu Huizuo



Jiang Tengjiao

ALIA "BADALING"

Lastatempe laborantoj de la Ĉina Turisma Administra Buroo kaj aliaj unuoj trovis en Luanping-gubernio de Hebei bone konservitan parton de la Granda Muro konstruitan en Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi longas ĉ. 30 kilometrojn de oriento ĝis okcidento kaj sur ĝi troviĝas turoj por fajrosignalo. Ĝi povas esti komparata kun Badaling, fama turisma loko de Beijing.


Ĝi estas proksima al Beijing kaj fariĝos la dua "Badaling" post riparo.

PLI OL MIL BAZOJ POR LOKAJ KAJ FLANKOKUPAJ PRODUKTAĴOJ KONSTRUITAJ EN ĈINIO

Tiuj bazoj liveras al la ŝtato juton, kokonon de silka raŭpo, tefolion, bambuson, krudan lakon, pomon, mandarinon, nigran orelfunĝon, jujubon, hemerokalon (*Hemerocallis flava*), palman ŝelon, fragmiton, longharan kuniklon, kapron kaj multajn aliajn produktaĵojn, kiuj konsistigas pli ol 60% de la totala kvanto de la aĉetitaj produktaĵoj de la ŝtato.

LA PLEJ GRANDA KAVERNA FRIDEJO DE ĈINIO KONSTRUITA

Nova kaverna fridejo de Jilin-provinco estis finkonstruita en no-



La dua "Badaling" en Luanping-gubernio

vembro de 1980. Kun kapacito de 15,000 tunoj, ĝi estas la plej granda en Ĉinio. Ĝi havas fridigan ĉambregon kun areo de 10,500 kvadrataj metroj, kiu povas konservi 12,000 tunojn da porkaĵoj. Ĉiujare ĝi povas fridigi 60 tunojn da kuirita viando nespicita kaj 4 tunojn da akcesoraj produktaĵoj. Ĝia glaciejo kun kapacito de 300 tunoj povas produkti ĉiutage 15 tunojn da glacio. Ĝi ludas gravan rolon por garantii provizadon de porkaĵoj al industria, mineja kaj arbara regionoj de la nomita provinco.

MALLEVIĜO DE LA TERSURFACO DE SHANGHAI BRIDITA

La malleviĝo de la tersurfaco de Shanghai (Ŝanhajo) estis bridita kaj sekve foriĝis ĝia minaco al la tiea

industria produktado kaj popola vivo.

En la pasinteco, pro tro multa uzo de subtera akvo la tersurfaco de Shanghai malleviĝis kun rapideco de 80-100 mm. ĉiujare, kaj la teretaĝo de iuj domegoj eĉ fariĝis malpli alta ol la tersurfaco. En majo de 1964 la popola registaro de Shanghai asignis pli ol 5 milionojn da juanoj al bridado de la malleviĝo de la tersurfaco. Helpe de la Geologia Ministerio kaj geologiaj laborantoj ĝi alprenis rimedojn redukti ekspluatan kvanton de la subtera akvo, alterne uzi subteran akvon de malsamaj tavoloj kaj replenigi ilin per surtera akvo. En la lastaj jaroj la rapideco de la malleviĝo reduktiĝis ĝis 1-2 mm. ĉiujare. Lastatempe en Shanghai okazis la tutlanda simpozio pri tersurfaca malleviĝo kun partopreno de pli ol 140 geologoj el diversaj partoj de la lando.



Rikolto de fungoj en kamparo de Shanghai



Gruntbovoj en Tibeto

La 4-monataj gruntbovoj povas vivi per si mem.



La gruntbovo sin trovas nur en Azio. Kaj la Qinghai-Tibeta Altebenajo de Ĉinio estas ĝia ĉefa produktejo.

La gruntbovo estas mamulo-remaĉulo. Ĝi havas malaltan korpon kovritan de longaj nigraj haroj. Ĝi estas grupigema, frostorezistema kaj povas vivi eĉ en la temperaturo de 30-40 gradoj

sub la nulo. Kruda furaĝo estas ĝia nutraĵo. Ĝi tre kapablas fari transportadon sur montaro en malalta atmosfero, tial oni nomas ĝin "boato sur altebenajo". Ĝia lakto entenas multe da graso kaj taŭgas por fari buteron. Ĝia viando estas delikata. Ĝiaj haroj kaj haŭto estas materialoj por vesto kaj ledoj.

La tibetanoj ŝatas gruntbovojn, nemalhaveblajn por ilia vivo.





Parto de Zhuzhou


Zhuzhou—Nova Industria Urbo

Zhuzhou nun havas pli ol 300,000 loĝantojn kaj nombron da entreprenoj de metalurgia, maŝina, kemia kaj tekstila industrioj. Sed antaŭ 30 jaroj ĝi estis nur urbeto kun 7,000 loĝantoj.




Ramiaj teksaĵoj kaj ramia-poliesteraj teksaĵoj produktitaj de la Zhuzhou-a Ramia Tekstila Fabriko estas bonvenaj al eksterlandaj merkatoj. La foto montras varpadon.

En la Xiangjiang-a Nitrogen-sterka Fabriko de Zhuzhou



Laboristoj de la Tianxin-a Fabriko de Lokomotivo kaj Vagono en Zhuzhou muntas elektran lokomotivon.

Produkta linio de kondensatoroj en la Zhuzhou-a Karbose-
lektejo




Trejna Centro kune Starigita de Ĉinio kaj Usono

D-ro Richard H. Holton donas lecionon.

La Dalian-a Trejna Centro por Industria Scienca kaj Teknika Administrado fondiĝis en la Dalian-a Industria Instituto, laŭ la interkonsento de la Stata Scienca kaj Teknika Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Komerca Departemento de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko. Ĝi celas studi la modernan administradon kaj teknikon de Usono, trejni ĉinajn personojn por establi instruajn sistemojn de la ĉina moderna industria administrado.

La kurson vizitas fabrikestroj, direktoroj, altlernejaj instruistoj kaj kadroj de scienca kaj teknika administrado el diversaj partoj de Ĉinio. Ĉiu kurso daŭras kvar monatojn.





Usona-ĉina kuna grupo faris esplorojn en fabrikoj en Beijing, Dalian kaj aliaj urboj por kompili la instruan materialon por la kursanoj. Nun membroj de la grupo estas en la Dalian-a Fabriko de Lad-manĝaĵoj por koni ĝian administradon de la entrepreno.

D-ro T. C. Ting (la dekstra) klarigas demandojn per komputero.



Usonaj profesoroj sin ekzercas per tajĝi-ĉjuan, speco de ĉina tradicia gimnastiko, sub la gvido de ĉina instruisto.



Mi kaj “Petro”

de SPIN *



Spin (la unua de maldekstre) kaj Fulmet, alia honora prezidanto de la Hunana Esperanto-Asocio

SUR mia tablo kuŝas Esperanta legolibro “Petro”. Tiu aminda libreto estas ĉiam ĉe mi ekde 1938, eĉ en la longdaŭra, kruela Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la intensa Liberiga Milito. Kunportante ĝin, mi trapasis la blokadan linion de la malamiko kaj venis al bazloko en la postfronto de la malamiko. Ĉiufoje, kiam mi vidas ĝin — mian gvidiston por lerno de Esperanto, ĉe mi vekigas rememoro pri multaj pasintajoj.

En aŭtuno de 1938, kiam la Kontraŭjapana Rezistmilito agitis la ĉinan nacion, nia Tria Kontraŭjapana Drama Trupo laŭordone venis de Wuhan al Xi-an kaj estis preta iri al bazloko en postfronto de la malamiko por fari kontraŭjapanan propagandon. La gvidanto de la trupo estis fama poeto Guang Weiran. Iutage li rakontis al ni pri Esperanto kaj ĝia kreinto Zamenhof, kio multe interesis nin. Helpate de li, ni dekkelkaj junuloj organizis nin en studrondon kaj eklernis Esperanton. Nia unua lernolibro ja estis “Petro”. Ni estis kortuŝitaj de la granda idealo de Zamenhof. En lernado ni spertis, ke Esperanto estas konstrue logika kaj facile lernebla. La bela futuro de la homaro kaj la idealo pri komuna internacia

lingvo kuraĝigis nin por diligenta lernado de Esperanto. Malgraŭ la malbonaj kondiĉoj de la vivo, ni ne perdis fervorecon en lernado.

En aŭtuno kaj vintro de 1939, ni faris kontraŭjapanan propagandon kaj amasan mobilizadon en montregiono de Zhangzi-gubernio de la sudorienta parto de Shanxi-provinco. Tiam ekster la montaro seninterrompe aŭdiĝis kanonado fare de japanaj agresantoj. Frumatene ni devis ŝarĝi la mulojn per pakitaj litajoj kaj kunligitaj rekvizitoj kaj poste fari propagandan laboron inter la loĝantoj pri la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj lernigis junajn artistojn pri scioj, kantoj, dramoprezentado kaj pentroarto. Tuj ricevinte ordonon de supera instanco, ni translokiĝis post kelkminuta kolektado de objektoj. Eĉ en tiu medio ni ankoraŭ elpremis tempon por lerni Esperanton kaj Esperantajn kantojn. Inter ili troviĝis “La Internacio”, “Espero”, “Himno al Lumo” kaj aliaj. “La Kanto de Cigano” ĝis nun restas en mia memoro. El ĝia teksto estas jenaj vortoj: “En la kor’ de la cigan’ ĉiam brulas arda flam’, se vi tuŝus ĝin per man’, vi forbrulos en la flam’.” Tiuj kantoj ne nur alportis al ni

multan ĝojon en la intensa batala vivo, sed ankaŭ instigis nin al batalo por bela estonteco!

Eble en 1940, mi komencis korespondi kun esperantistoj de la urbo Chongqing kaj tiel konis veteranajn esperantistojn Venlo Fon, Ye Laishi (Jelezo) k.a. Ĉiufoje, kiam ni ricevis leterojn kaj Esperantajn revuojn senditajn de ili el la postfronto, ni ĉiam sentis grandan ĝojon. Kvankam ni ne renkontis unu la alian, tamen ni fariĝis sinceraj amikoj. Tiam ni ofte legis la revuon “Heroldo de Ĉinio” eldonitan en Chongqing kaj esperantajn gazetojn el Jugoslavio kaj Hungario. Ĉio ĉi tio ne nur larĝigis nian vidkampon kaj komprenigis nin pri situacio de kontraŭfaŝisma milito en- kaj eksterlanda, sed ankaŭ plifortigis nian intereson pri Esperanto kaj fidon en lernado de ĝi.


Krome, ni legis ankoraŭ Esperantajn artikolojn verkitajn de japana esperantistino Verda Majo. Ŝia nobla internaciismo kaj heroeco kontraŭ la japanaj militaristoj multe kortuŝis nin kaj ĝuis nian respektan. El ŝiaj artikoloj ni aŭdis la justan voĉon de la japana popolo

kaj antaŭvidis la neeviteblan fiaskon de la japanaj agresantoj. Tio firmigis nian konvinkon pri venko super la japanaj agresantoj.

Ĉi tie mi volas rakonti alian neforgeseblan historieton. En januaro de 1945, nia drama trupo plenumis sian taskon en la regionoj regataj de Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) kaj Yan Xishan. Ĉar ni subtenis la Kontraŭjapanan Rezistmiliton, pledis por progreso kaj nacia unuiĝo, reakciuloj persekutis nin. Mi kaj aliaj 12 kamaradoj estis arestitaj kaj ĵetitaj en malliberejon. En la unua tago de la enkarceriĝo mi ricevis vatitan veston kaj trovis slipon en ĝia poŝo kun Esperanta skribo: "Mi ĉiam amas vin!" Tio estis skribita de kamaradino Fu Xia, kiu aliĝis al nia studrondo antaŭ nelonge. Tio donis al mi neesprimeblan ĝojon. Mi tute ne atendis, ke ŝi povis esprimi sian sinceran koron per nia lingvo. Poste, helpate de ŝi kaj aliaj kamaradoj ni faris firman batalon kontraŭ reakciuloj kaj fine akiris la venkon. Post unu jaro mi edziĝis al Fu Xia.

En la longa periodo de post la fondiĝo de la nova Ĉinio mi estis tre okupita de laboroj, tial mi for-

Spin (la unua de maldekstre) lernigas al sia filino (meze) "Kanto de Ciganoj".



lasis mian lernadon de Esperanto. Tamen mi ne perdis amon kaj intereson al ĝi. Antaŭ unu jaro mi reprenis la libreton "Petro" kaj komencis legi ĝin ankoraŭfoje. Ĝi denove vekis mian entuziasmon, enkondukante min en miajn junajn jarojn.

Jaro pasis post jaro kaj mi maljuniĝis kaj la memorkapablo kadukiĝis, tamen pro mia daŭra lernado nun mi ankoraŭ povas legi la revuon "El Popola Ĉinio". Mi ĝuis grandan honoron, ke lastatempe oni elektis min kiel la honoran prezidanton de la Hunan-a Esperanto-Asocio. Nun mi jam ekinstruis Esperanton al mia filino, kiu estas kantistino

de iu ensemblo. Mi metas mian esperon sur ilin, la gejunulojn.

Nun mi jam estas 62-jara. El mia multjara sperto mi komprenis, ke Esperanto estas vere utila lingvo. Kiel internacia helpa lingvo, ĝi havas grandan vivipovon. Eĉ se centono de niaj loĝantoj lernos Esperanton, mi pensas, tio ja utilegos al konstruado de nia patrujo, al akcelo de kultura interŝanĝo inter nia kaj aliaj landoj kaj al interkompreniĝo kaj amikeco inter popoloj de nia kaj aliaj landoj.

** La aŭtoro estas vicprezidanto de la Agrikultura Komisiono de Hunan-provinco.*

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

(Oktobro, 1980)

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas

perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: "Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u".

Prezidanto: W. AULD

Sekretario: D-ro A. GOODHEIR

La unua mecenato de Esperanto —Aleksandr Zilbernik

ALEKSANDR Lejboviĉ Zilbernik naskiĝis en 1831 en Vieksniai, distrikto de Vilno, Rusio. (Pollando estis tiam okupita de cara Rusio kaj fariĝis parto de tiu imperio — La Red.) mortis la 25-an de marto 1906 en Varsovio, Rusio. Lia patro, Lejb Ŝah, estis libera rabeno en la hebrea komunumo. La familian nomon Zilbernik li ricevis pro jena okazintaĵo. Por eviti militservon liaj gepatroj turnis sin al seninfanaj ges-roj Silberfenig kun peto, ke ili adoptu la infanon (laŭ la rusaj leĝoj la sola filo en familio estas libera de militservo). La rusa oficisto enskribis la infanon Ŝah erare: anstataŭ Silberfenig Zilbernik. La infano lernis en Jeŝivot (Supera rabena lernejo) kaj per meminstruado li lernis la rusan kaj germanan lingvojn. Li edziĝis al la filino Hadasa de la riĉa kaj honesta familio Bjelostok, Rusio, poste li translokiĝis en urbon Kovno, Rusio, kaj kune kun J. Ŝĉeranskij fondis fabrikon de sapoj, kiun ili ambaŭ gvidis dum 47 jaroj en plena harmonio.

Zilbernik havis kvar filojn kaj kvin filinojn. La plej juna filino Klara (6 oktobro 1863 — 6 decembro 1924) edziniĝis la

9-an de aŭgusto al L. Zamenhof (15 decembro 1859 — 14 aprilo 1917). Zamenhof finis la kreadon de Esperanto en 1885 kaj dum du jaroj vane serĉis eldoniston. Neniu volis aŭdi pri Esperanto, ĉar ekzistis jam lingvo Volapük, neniu volis riski eĉ sumeton da mono, por eldoni la unuajn malgrandajn broŝuretojn de Esperanto en la rusa, pola, franca, germana, angla lingvoj. Zilbernik donis 10,000 rublojn al Zamenhof por la presado de Esperantaj lernolibroj kaj ilia senpaga dissendado al redakcioj, lernejoj, profesoroj, kuracistoj, diversaj societoj, por multaj anoncoj en diversaj gazetoj ktp.

Cenzuristo Marko Fabianoviĉ Zamenhof (8 februaro 1837 en Tikocin, Rusio, — 30 novembro 1907 en Varsovio, Rusio), patro de L. Zamenhof, permesis aperon de la artikolo de J. Frenkel. D-ro J. Frenkel en n-ro 199-200 de la jaro 1888 en hebrea gazeto "Hacefira" (Matenruĝo) aperigis artikolon pri vinberujo kaj vinberoj, en n-ro 200 (25 septembro) daŭrigan — pri la vino. En la artikolo li priskribis diversajn vinojn kun enhavo de 8% ĝis 17% de alkoholo ktp. Li pritraktis la efikon de la vino

sur la homa korpo. La alkoholo en malgrandaj kvantoj havas sanigan efikon, en grandaj kvantoj malsanigan. Oni do trinku ĉiutage kvaronlitron da vino ne per unu fojo, sed per tri fojoj. La artikolon li finis jene:

"Pli ol tiu kvanto difektas kaj malsanigas. Prave ni diru: Morto kaj vivo dependas de la alkoholo. Troaĵo aperigas diversajn malsanojn. Daŭra trinkado de vino forigas de la cerbo de 1' homo iom post iom la intelektajn kaj civilizajn kapablojn kaj kelkfoje ĝi kaŭzas ĉe li frenezecon kaj perdon de la tuta prudento."

La kontrolanto Nikander Vasiljeviĉ Zusmen en S. Peterburgo, Rusio, estis drinkemulo, malbonintenca. Li supozis aludon. Evidente li sciis, kian kutimon kaj kian guston havas la caro. Tiu artikolo vekis ĉe Zusmen flaman koleron. Li akuzis la ĉiam lojalan cenzuriston M. Zamenhof, ke J. Frenkel per fino de la artikolo ofendis caron. Kion ni hodiaŭ pensu, se tiu ordinara higiena informo estis ofendo de caro? Strangaj motivoj kaŝiĝis malantaŭ tiu ĉi

(Daŭrigata sur p. 13)



Geesperantistoj de Changshu-gubernio vizitas la miljaran kvadratan Pagodon.

Esperanto-movado en Changshu- gubernio

CHANGSHU-GUBERNIO, kiu situas ĉe la bordo de Changjiang (Jangzi)-rivero, estas fama urbeto en la frua historio de Esperanta movado de nia lando. En tiu urbeto iu strato iam portis la nomon de Zamenhof. Ĝis nun, en la Gubernia Komisiono por Konservado de Historiaj Objektoj ankoraŭ konserviĝas lernolibroj uzitaj de Es-

peranta kurso en la komenca periodo de la kuranta jarcento kaj koloraj poŝtkartoj senditaj de diverslandaj esperantistoj al la kursanoj en 1913. Laŭ historia noto, nelonge post kiam Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion, tie jam fondiĝis Esperantaj organizaĵoj. En 1914 stariĝis la Changshu-a Esperanto-Societo kaj la Changshu-a Esperanto-seminario.

Post tio oni eldonis la gazeton "Verda Flago", kiu propagandis Esperanton. Post la eksplodo de la Unua Mondmilito la ĉina Esperanta movado estis multe tretita kaj ankaŭ Changshu silentadis preskaŭ kvindek jarojn ĝis 1963. En tiu jaro la Changshu-a Laborista Kultura Domo fondis la unuan laboristan Esperanto-kurson post la Liberiĝo



Sporto

LA SUKCESO DE ĈINAJ GEGIMNASTOJ

Decembre de 1980 ĉinaj gegimnastoj gajnis ses ĉampionecojn en la Tokia Internacia Gimnastika Konkurso, nome Zou Limin gajnis per 10 poentoj la ĉampionecon en rekado, Li Xiaoping — la ĉampionecojn en ĉevalado kaj paralelado, Tang Xiaoli — la ĉampionecojn en virina

grundgimnastiko kaj ŝtupa paralelado, kaj Li Cuiling kaj rumana gimnastino ambaŭ estis ĉampioninoj de senansa ĉevalado.

En la konkurso partoprenis gegimnastoj de Ĉinio, Japanio, Rumanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, DR Germanio, Kanado, Usono kaj suda Koreio. Ĝi estis internacia gimnastika konkurso kun relative alta nivelo.

ĈINIO GAJNIS DU HALTER-LEVAJN ĈAMPIONECOJN

En la Kvara Nusara Internacia Halterleva Ĉampioneca Konkurso

okazinta en Kairo en novembro de 1980, sub la aŭspicioj de Egiptio, ĉinaj halterlevistoj Han Zhenyu kaj Zhang Zhifang gajnis po unu ĉampionecon per siaj totalaj individuaj poentoj en la konkurso en dek pezkategorioj, nome Han gajnis la unuan lokon en pezkategorio 52 per levo de 210 kilogramoj kaj Zhang — la unuan lokon en pezkategorio 60 per levo de 247.5 kilogramoj.

La konkurso prenis lokon en la kultura domo de la urbo Aswan. En ĝi partoprenis halterlevistoj de Egiptio, Italio, Ĉinio, Hungario, San-Marino, Indonezio kaj suda Koreio.

helpate de lokaj esperantistoj kaj tiel semis denove verdon.

En la lastaj du jaroj revigliĝis la Esperanta movado de tiu loko. Multaj laboristoj, lernantoj, oficistoj kaj poŝtistoj lernis Esperanton en la kurso. Aparte menciinde estas ke Zhang Linrui, maljuna esperantisto de la gubernia Poŝtoŝefejo de Changshu fondis la gazeton "Verda Lampiro" ekde aŭgusto de 1979. La riĉa enhavo, delikata presarto kaj akurata eldonado de la gazeto estas varme aplaŭdataj de diverslokaj esperantistoj. En tiu gazeto oni povas informiĝi pri la Esperanto-movado de Ĉinio kaj aliaj landoj, akiri gramatikajn sciojn kaj sciojn pri Es-

peranta stenografio, kaj legi kaj poemojn kaj interesajn karikaturojn. Ĝis la fino de 1980 jam eldoniĝis preskaŭ 50 numeroj.

Changshu-gubernio estas riĉa loko de suda Ĉinio kaj ankaŭ pitoreska vizitindejo. Tie troviĝas miljara turo kaj aliaj historiaj lokoj fame konataj tra la tuta Ĉinio, kiuj altiras al si multajn en- kaj eksterlandajn turistojn. La poŝtoŝefejo de la gubernio, ekde la unua de majo de la pasinta jaro, eksponas poŝtajn materialojn kun klarigoj en la ĉina lingvo kaj Esperanto en du propagandaj montrofenestroj. Tio estas bonvena al la vizitantaj esperantistoj.

ESPERANTO KIEL LINGVO POR MONDA TURISMO


Monda Turisma Konferenco kunvokita de Monda Turisma Organizaĵo okazis en Manila (Filipinoj) de la 27-a de sept. ĝis la 10-a de okt. 1980. La ŝtatoj partoprenantaj en la konferenco rajtis klarigi per dokumento sian starpunkton pri ĉiu el la 9 punktoj de la tagordo. La pozicio de Hungario estis prezentita en 5-paĝa dokumento subskribita de la Ministro pri Komerco kaj Prezidanto de la Nacia Turisma Konsilantaro Vilmos Saghy. En longa paragrafo de la dokumento la ministro atentigis pri la problemo de komunikado en turismo kaj submetis oficialan proponon por Esperanto. Li asertis, ke la rekomendo de tiu ĉi konferenco povas vaste instigi ĝian uzadon, kaj sugestis la kuraĝigon de la instruado de Esperanto al turistoj kaj ĉiuj laborantoj en la turista fako.

VIRINAJ PROCENTOJ DE INDIVIDUAJ MEMBROJ DE UEA

Lastatempe ellaborita statistiko montris, ke nur kvarono de la individuaj membroj de UEA estas virinoj. Laŭlande, la plej grandan procentaĵon de virinoj en sia UEA-membraro havas Finnlando (49,6), antaŭ Nov-Zelando (44,26) kaj Nederlando (41,19). Sekvas Pollando, Peruo, Svedio kaj Svislando (30-40), Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francio, Israelo, Italio, Jugoslavio, Kanado, Norvegio kaj Usono (20-30). Ĉiuj aliaj landoj havas malpli ol 20 procentojn de virinoj en la individua membraro de UEA.



Poŝtoŝefejo propagandas filatelon per la ĉina lingvo kaj Esperanto.



La gazeto "Lampiro"

NASKIGIS LA ANHUI-A ESPERANTO-INSTITUTO

En la 20-a kaj la 21-a de novembro 1980 okazis en la urbo Bengbu la kunveno por fondiĝo de la Anhui-a Esperanto-Instituto. K-do Yu Yuan, vicprezidanto de la Anhui-a Sociologia Federacio, faris en la kunveno paroladon favoran al la Esperanta laboro. La kunvenon ĉeestis 52 esp-istoj el diversaj partoj de la provinco. Ili diskutis pri la statuto de la instituto kaj la raporto de Esp-laboro kaj poste elektis la konsilantaron de la instituto. Yang Baichuan, vicedestro de Anhui-universitato, estis elektita kiel ĝia prezidanto kaj Lu Shengyuan, Yang Haichun kaj Zhang Weimei kiel ĝiaj vicprezidantoj. Dum tiuj du tagoj estis ekspoziciataj Esperantaj eldonaĵoj.

FONDIĜIS LA PREPARA GRUPO DE LA JIANGXI-A ESP-ASOCIO

Por disvolvi Esp-laboron, Jiangxi-aj esp-istoj kunvenis la 5-an de decembro 1980 en la ĉefurbo Nanchang por fondi la nomitan preparan grupon. Gui Wenbo, Yan Yun, Li Chuanzhen kaj aliaj tri personoj estis elektitaj kiel membroj de la grupo.

Esperanta studrondo de la Wenshan-a Ĝuang- kaj Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan



Inaŭgura kunveno de la Anhui-a Esperanto-Instituto

NOVAJ ESP-KURSOJ EN ĈINIO

Inter septembro kaj decembro de 1980 pliaj Esperantaj kursoj kaj grupoj fondiĝis en grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. En Beijing (Pekino) la prepara grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo, la Kultura Palaco de Laboranta Popolo de Beijing kaj la Geknaba Domo de la Okcidenta Distrikto funkciigas tri elementajn Esp-kursojn kun pli ol 1,300 personoj. Ankaŭ la Beijing-a Lingva Instituto funkciigas, en la lasta novembro, Esp-kursojn elementan kaj mezgradan.

En la urboj Kunming kaj Gejiu de Yunnan-provinco en sudokcidenta Ĉinio, centoj da homoj vizitas la Korespondan Esperanto-Lernejon kaj

Esp-kursojn funkciigatajn de lokaj esp-istoj aŭ Esp-organizoj. Kaj aperis Esp-grupo el 22 personoj en la Wenshan-a Ĝuang- kaj Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Subprovinco.


Krome, Esp-kursoj aŭ Esp-grupoj fondiĝis ankaŭ en la urboj Lanzhou, Shashi, Nanjing, Chongqing, Tianjin, Bengbu, Wuxi, Dushan, Yuanjiang, Gongcheng kaj Pinghu.

“RIGARDO AL NORVEGIO”

Aperis la broŝuro “Rigardo al Norvegio” verkita (norveglingve) de Erling Welle-Strand, tradukita de C. Stop-Bowitz kaj eldonita de la norvega Reĝa Ministerio pri Ekstero. Tio ĉi estas la unua fojo, ke norvega ministerio oficiale uzas Esperanton en siaj presaĵoj.

Lanzhou-a Esperanta studrondo





* Erwin Schrotter (instruisto), A-8047 Graz, Berliner Ring 75/8/34, Aŭstrio, dez. kor. kun samideano, precipe instruist(in)o.

* F-ino Aurika Malaimare (23-j ekonomikistino), Jat, Gherman, nr. 40, Com Jamu-Mare, Cod 1843, Jud Timis, R.S. Rumanio, dez. kor. kun geesp-istoj el la tuta mondo pri diversaj temoj.

* Alessandro Dematheis (estro en teknika oficejo de aŭtomat-maŝinoj), V. Lodi, 20, 10152 Torino, Italio, dez. kor. kun ĉina s-ano.

* S-ro Haraldo Mants (18-j lernanto), Zum Faulborn 2, D-3420 Herzberg/Harz, FR. Germanio, hobiaj: rajdado, Esperanto, vojaĝoj, serĉas junajn korespondantojn el Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj.

* S-ro Peter Zilvar (30-j oficisto), hobiaj: Esperanto, vojaĝoj, serĉas korespondantojn en Ĉinio.

* Esa Lang (45-j laboristo), Lokenkatu 5, 15610 Lahti 61, Finnlando, kun ĉinaj kaj aliaj aziaj esp-istoj.

* Hosein Meyari (20-j), str. 6 Bahman C/O: Dorfeshan, Karaj-Hesarak, Irano, kun geesp-istoj el Aŭstralio, Danlando, Svedio, Nederlando kaj aliaj landoj pri muziko, kino, revuo, b.k. ktp.

* 26-jara knabo Depauw. Paul vol kor. kun juna esp-istino. Hobiaj: naturo kaj fotografio. Adr: Meiboom 49, B-1500 Halle, Belgio.

* Szasz Marton (37-j), Str. Cintarului, Nr. 8, Sc. A, ap. 12, Miercurea Ciuc 4100, Rumanio, kun ĉinaj k. japanaj geamikoj pri historio, popolkutimoj k. populartoj.

* S-rino Angela Harlow (34-j meksikdevena usonanino), 47 Nancy Drive, San Pablo, Ca 94806, Usono, dez. kor. pri diversaj temoj.

* Vaclaw Danowski, ul. Wandy 3/7m 2, 03949 Warsovio, Pollando,

kun ĉinoj, kiuj laboras kiel tajloro aŭ en peltista fako.

* Ni dez. kor. kaj interŝ. b.k. kun ĉinaj gelernantoj kaj tutmonde. Adr: Classe V A-Scuolaelementare, "G. Agruaviva" Vialeorsini, 64022, Giulianovalido, Italio.

* S-ro Lataste Pierre (58-j), Residence Marhaba, 271 Rue Ennle-Combes, 33700 Merignac, Francio, dez. kor. kun ĉina esp-isto pri arto, literaturo, historio kaj p.m.

* Dudas Zoltan (20-j), Frederika Ŝopena 74., 24000 Subotica, Jugoslavio, kun 15-20-jaraj ĉinaj geknaboj.

* Jevdjevic Ljubomir, P.P. 106, EM Hidromontaza, 84210 Pljevlja, Jugoslavio, kun ges-anoj pri ĉiuj temoj.

* S-ro Roland Beuvar, Rue des Remparts, F-08260 Maubert-Fontaine, Francio, dez. kor.

* F-ino Viviana Santillan Mediano (22-j), Calle Jorge Chavez Nr. 163, Reque-Dpto, de Lambayeque-Peru. dez. kor. tutmonde kun s-anoj, pri kukornamado, desertoj kaj manĝajaj receptoj ĝenerale.

* Gelernantoj de du bazaj lernejoj el urbo Osijek (Jugoslavio), inter 10 k. 15 jaroj, dez. kor. kun ĉinaj gelernantoj. Adr: Ivan Flanjak, Divaltova 220, YU-54000 Osijek, Jugoslavio.

* S-ro Aleksandr Mikiŝev, 19-jara studento, Kustanajskaja 17-16, SU-614056 Perm, Sovetunio, volas kor. tutmonde.

* S-rino Signoret (instruistino), rue de Timbergues, F 46200 Souillac, Francio, kun ĉina koleginino pri edukado, popolaj kutimoj, muziko, ktp.

* S-ro Wilson Souza Andrade, Rua Joao Matioli 413, 37200 Lavras-M.G., Brazilo, dez. kor. kun geamikoj ĉinaj, filipinaj, hindiaj kaj de aliaj aziaj landoj, pri religio, okultismo kaj spiritismo.

* S-ro Amir Baŝir Bhatti, H32/10 Near Police Line-1, Basti Sadik Tali, Mutano, Pakistano, dez. kor. tutmonde.

* Karoly Brindza, 24000 Subotica, Pupinova 29, Jugoslavio, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj pri ĉina geografio, historio kaj vivo.

* Mieczislaw Szostak (studento pri latina kaj greka filologio), PL-20-039 Lublin, Katolicki Uniwersytet Lubelski, str. Nowotki 7, Pollando, kun tutmondaj amikoj precipe el Ĉinio, Koreio, Mongolio pri lingvoj, filozofio, libroj kaj ĉiutaga vivo.

* Jwona Slotnicka (16-j lernantino), str. Zlota Gora 22, 37-550 Radymno, Pollando, kun junaj esp-istoj el Ĉinio kaj aliaj landoj en Azio pri ĉiutaga vivo, kolektas bildkartojn.

* Dario Olewinski (15-j lernanto), str. Chopin 4, PL-37-55-Radymno, Pollando, kun ĉinaj kaj tutmondaj amikoj.

* Snežana Kruŝic (22-j studentino), Krapinska 10-a, 54000 Osijek, Jugoslavio, dez. kor. kun geesp-istoj tutmonde pri ĉiu temo k. interŝ. p.m., b.k. kaj prospektojn.

* Emil Hanhiniemi (55-j laboristo), P.O. Box 764, Ingham, Queensland 4850, Aŭstralio, dez. interŝ. ĉiajn esp-tajn revuojn, gazetojn k. jarlibrojn.

* Frantisek Stovicek, Hradebni 381, 500 00 Hradec Kralove, ĈSSR, dez. kor.

* S-ro Rakotondravao, Antanambao IVL 309 Anjezika, Antananarivo Madagaskaro, delegito de UEA pri turismo en Madagaskaro, anoncas la jenajn kondiĉojn: Mi zorgas pri la rezervigo de hotelo — akcepto ĉe la flughaveno — gvidado de ekskursoj aŭ vizitoj deziretaj. La vizitontoj sin ŝarĝos per ĉiuj elspezoj. Mia sindona perado pretas pri ampleksaj helpoj, diverse lokaj aferoj. Tre interese: Por pasaĝeroj pogrupo KVIN kaj pli, mi peros rabaton pri aviadilaj biletoj de Parizo/Madagaskaro/Parizo per kompanio "Air Madagaskar". Nepre estos frua antaŭanonco pri kia ajn vojaĝo farota. Respondkuponon estos petata por satigi pliajn informojn.

"SUBTERA PARKO"

de Ge Wenpei



EN antaŭurbo de Guiyang (Gujjang), la ĉefurbo de Guizhou (Gujĝou)-provinco, sin trovas la pitoreska Nanjiao-parko. Ĝi havas multajn kunligitajn kalkoŝtonajn kavernojn kaj pro tio ricevis la nomon "Subtera Parko".

Ĝi kun areo de 34 hektaroj fondiĝis en 1965. La kaverno kun longeco de preskaŭ 600 metroj formiĝis dum ĉ. miliono da jaroj. Antikve tie troviĝis subtera rivero kaj en la ĉirkaŭaĵo estis kalkaj rokoj kiuj transformiĝis jaron post jaro en kavernojn. La erozio kreis en ili multajn ĉarmajn stalagmitojn, stalaktitojn, ŝtonkurtenojn kaj ŝtonkolonojn.

Sekvante vizitantojn ni iris al la kaverno por pririgardi ĝin. En ĝi la stalaktitoj pompe brilis sub la lumo de koloraj lampoj, dum la stalagmitoj altaj kaj malaltaj, kiel bele vestitaj diversnaciecaj viroj kaj virinoj, staris por bonvenigi malproksimajn gastojn.

Ni venis al kaverna aperturo laŭ tunelo jen leviĝanta jen malleviĝanta. El la nesondebla kaverno aŭdiĝis plaŭdo. La klarigisto diris, ke subtera rivero fluas en la kaverno kaj ĝia akvo faris kaskadon unu metron altan kaj tri metrojn larĝan, kiu plaŭdas senĉese. Sub la kaskado estis kavo kun klara akvo, en kiu naĝas nigraj kaj blank-diafanaj fiŝoj.

Ni iris tra larĝa placeto kaj venis antaŭ klaran lageton, en kiu speguligas arĝenta "montĉeno". Ĝi estis ombro de neĝblankaj stalaktitoj en la kaverna supro. Post la lageto

prezentiĝis multfaltaj diafanaj ŝtonkurtenoj, kiuj bele brilis sub la koloraj lampoj. Unu el la ŝtonkurtenoj formis naturan skalon laŭ longo de faltoj. Kiam la klarigisto manfrapetis ĝin, eliĝis bela sono en la kaverno.


Ni rigardis promenante. Niajn okulojn frapadis la groteskaj stalaktitoj. Ĉe iu "valeto" staris ŝtonkolono, kiu similas gardostaranton kun pafilo. Nermalproksime vidiĝis stalagmito simila al terurita kokido ĵus forlasinta sian patrinon. Super ĝi pendis stalaktito, kiu aspektas kiel agla ungo kaptanta la kokidon. La turistoj donis al tiu vidaĵo la nomon "Aglo Kaptas Kokidon". En alia loko estis kaverno simila al ĝardeno kiosk, en kies interno du stalagmitoj staras kvazaŭ intimaj geamantoj.

Ni iris antaŭen kaj la kaverno fariĝis pli kaj pli larĝa. Ni surpaŝis ponteton kaj rigardis la ondetantan akvon sub ĝi kaj la stalagmitojn kaj ŝtonkolonojn en la ĉirkaŭaĵo. Tiam la klarigisto subite malŝaltis la lampojn, kaj antaŭ ni prezentiĝis nokta rivera pejzaĝo. La lampoj sur ambaŭ bordoj trembrilis en la akvo. Baldaŭ ruĝa lumo heliĝis en malproksimo, samkiel ruĝa suno leviĝanta super la riveron. Ekaperis aŭroro en la ŝtona arbaro. Kaj la blankaj stalaktitoj super niaj kapoj tuj fariĝis kiel bunta brokato. La kalejdoskopa vidaĵo en la kaverno estis tre alloga.

Ekster la kaverno kuŝas gruzo pado ambaŭflanke borderita per verdaj pinoj. Iom malproksime, sur la montodeklivoj, estas fruktaroj kaj poraprecaj arboj. Oni diris, ke en la rojo apud la parko servos plezuroboatoj kaj ambaŭ ĝiaj bordoj estos beligitaj de floroj kaj arboj. Baldaŭ la vizitantoj povos ne nur rigardi la ĉarman vidaĵon en la kaverno, sed ankaŭ sate ĝui la bordan pejzaĝon veturante per boato.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


- 1 Hangzhou
- 2 Jinhua
- 3 Guiyang
- 4 Changshu
- 5 Dalian
- 6 Zhuzhou
- 7 Zhengzhou
- 8 Guangzhou




“Subtera Parko”


En tiu parko troviĝas ĉefe kaverno kun groteskaj stalaktitoj. Pri ĝiaj detaloj vidu la artikolon “Subtera Parko” en tiu ĉi numer

Stalagmitoj






Alia mondo mirinda!




La Cent-paša Ponto



En densa ŝtona arbaro

FOTOJ PRI NATU- RAJ BELAĴOJ FA- RITAJ DE E-ISTOJ

de G. PARTLOW (Usono)



La lago "Dorothy" ĉirkaŭbra-
kata de sennomaj montpintoj
kaj glaciriveroj



La valo de la rivereto "Oro",
dum la vintro de 1976

Parto de la montpasejo "Chil-
koot", sur la piedvoĵeto de la
orserĉistoj de la jaro 1898



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuajoj per tiaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

“Vulpoj de Ĉironnup”, bildrakonto de Takanashi Hiroyuki, eljapanigita de Niwa Masanisa, 52 p., 23.5 cm. × 24.5 cm., kartone bindita. Prezo nemontrita. Adreso de la tradukinto: Gokuraku 2-171, Meitoku, Nagoya 405, Japanio.

La bela rakonto pri tragedio de vulpa familio estas verkita kun la deziro, ke la infanoj-legantoj ĉerpu el ĝi “ne nur fortecon de amo inter gepatroj kaj infanoj, sed ankaŭ ion pli profundan kaj grandan”. Mi ne dubas la bonvolon de la aŭtoro. Multaj fabelistoj laboras por tiu sama celo. Sed kial la homoj buĉadas ne nur vulpojn kaj aliajn bestojn sed ankaŭ aliajn homojn kun ĉiam pli mirinda genio?

Papero, preso, bindo — ĉio bona. Min aparte interesis la bildoj en originala stilo. La lingvo de la tradukaĵo estas facila. Ĉar bildlibro por infanoj servas ankaŭ kiel lerniloj, do estas dezirinde ke tia eldonaĵo aperu en lingvo senerara. Mi tamen rimarkis korektendaĵojn kiel ekzemple: p. 20, la vorto “forlasas” en la unua frazo “Venis la mateno, kiam ili forlasas la insuleton” devus esti anstataŭita de “devis forlasi”; antaŭ “etulino” devus esti aldonita “la”; p. 24, “ekfajfas” devus esti anstataŭita de “fajfis”; p. 30, la vorto “aŭdiĝas” en la frazo “Ili ambaŭ kuregis direktante sin tien, de kie aŭdiĝas la jelpo” devus esti anstataŭita de “aŭdiĝis”; p. 32, “La kap-

tilo devas esti preparita de la soldatoj” evidente ne diras kion oni volus diri, eble “La kaptilo certe estas metita de soldatoj”; “povas demordi” devus esti anstataŭita de “povis demordi”; p. 34, “Odoras je homo!” devus esti anstataŭita de “Odoron de homo!”; “elsalt” devus esti anstataŭita de “elsaltis”; p. 36, anstataŭ “fine ne” en la frazo “La patra vulpo fine ne revenis”, oni devus uzi “neniam”; ĉu “neĝpluvaj tagoj” aŭ “neĝaj kaj pluvaj tagoj”?; p. 49, anstataŭ “vicdeligito” devas esti “vicdelegito”. Malgraŭ la eraretoj mi rekomendas ĝin al ĉiuj libroamantoj, ĉar ili ja ne makulis la belon de la bildrakonto.

RECENZIS N. M.

HAVRIJIL
KOSTELJNIK
(1886-1948):

BAĈKA,
MIA BAĈKA

Baĉka, mia Baĉka!
En ĉi mondo fora
mi al ci sopiras,
ĉiam plenangora.*

*Plaĉas ciam kantoj
vespere aŭdataj,
kiel tiuj kantoj
al caroj ludataj!*

*Plaĉas al mi ciam
kamparo grenplena,*

*kiel ŝtonpalacoj
de l' tutmondo jena.*

*Ci ja donis koron
al mi kaj ĝi sola
cin ŝatas, komprenas,
kiel koro vola.*

*En ĉi mondo fora
sen koro vivas mi —
tie mi laboras,
sed revas nur pri ci!*

Esperantigis **BORIŜA MILIĈEVIĈ**

* Baĉka estas naskiĝloko de la poeto, nun parto de Novi Sad, ĉefurbo de Vojvodina Aŭtonoma Provinco de Respubliko de Serbio, Jugoslavio.

Vojaĝo en mia miela tempo

de Liu Dong



La aŭtoro kaj lia edzino sur la monto Huangshan

LA miela tempo estas ege feliĉa por novgeedzoj. Laŭ la ĉina moro la novgeedzoj devas aranĝi abundan festenon por siaj parencoj kaj amikoj, opiniante, ke ju pli lukse la edziĝofesto okazos, des pli bone estos. Sed mi kaj mia fianĉino Xiao Yang tenis malsaman opinion. Ni volis edziĝovojaĝi al la pitoreska sudo por ĝui la ĉarmon de la naturo. Nia deziro plenumiĝis en la lasta julio. Ni vizitis Huangshan-monton kaj la urbojn Hangzhou, Suzhou kaj Zhengzhou.

Dum ni faris vojaĝoplanon, la samon volis ankaŭ Ai Ping, kuzo de Xiao Yang, kiu studas en Kanado kaj hejmen revenis por lernejaj ferioj, kaj lia fianĉino Xiao Zhang. Kaj ni preparis la vojaĝon kvarope.

Ni forlasis Beijing (Pekinon) en varma tago, tamen atinginte Huangshan-monton ni tuj sentis malvarmeton, ĉar ĝi estas alta kaj havas multajn arbojn kaj ankoraŭ ne finiĝis la tiea pluva sezono.

La hotelo ĉe la montpiedo estas ĉirkaŭita de densaj pinoj apud akvo. En la pinaro punktiĝas dekoj da elegantaj dometoj el bambuo kaj ligno, kiuj similas grandajn fungojn ĵus elkreskintajn el la tero rigardate de malproksime. Servisto de la hotelo diris, ke oni konstruis ilin speciale por la edziĝovojaĝantaj gejunuloj. Kun scivolemo ni enloĝiĝis en tia domo. Pluvetis vespere. Kaj en pluvo ni promenadis en arbaro, brako en brako. Ni ĝuis la nebulajn konturojn de la malproksimaj montoj, aŭskultis lirlon de la fluo kaj susuron de la arbofolioj. Ni tute raviĝis de la bela naturo.

La sekvantan matenon ni preparis nin por montogrimpado. Ni iris montan vojon krutan, malsekan kaj glitigan super profundega valo kaj ni rigardis tion bona ŝanco por hardi nin urbajn gejunulojn. Kiam ni venis al la fama Tiandu-pinto, la vojo fariĝis pli kaj pli malfacila. Ĉe krutega loko la piedoj de la supra grimpanto preskaŭ tuŝis la kapon de la sekvanta. Mi timis,

ke Xiao Yang retiriĝos. Sed ŝi ne senenergiĝis. Ŝi grimpis supren pene per la kvar membroj. Ni kuraĝigis unu la alian kaj ŝercadis senĉese. Kaj antaŭ tagmezo ni jam surgrimpis la supron. Ni staris sur ŝtonego kaj havis panoraman vidon de la montoj.

Tie estis nemalmultaj ekskursantoj, el kiuj plejparto estis studentoj, oficistoj, laboristoj kaj ankaŭ edziĝovojaĝantoj. Antaŭ kelkaj jaroj nur altranguloj kaj fremdlandaj specialistoj ĝuis turisman vojaĝon kaj ordinaj civitanoj malofte havis tian ŝancon, sed hodiaŭ la ordinaj gejunuloj kiel ni jam havis la ŝancon de turisma vojaĝo. Mi estas ŝoforo de la Fremdlingva Eldona kaj Distribua Buroo, kaj Xiao Yang — oficistino de iu pediatria instituto. Ni estas nemulte salajrataj, ne havas pasian deziron pri la luksa vivo, sed volas liberan spiritan vivon. Kvankam ni elspezis por nia vojaĝo la tutan monon ŝparitan dum la pasinta unu jaro, tamen ni baniĝis en granda ĝojo. Estas

menciinde, ke ni konatiĝis kun 13-14-jara knabo, kiam ni finis nian fotadon kun la geedzoj Ai Ping antaŭ la Gastama Pino kaj daŭrigis la vojon al Beihai, unu el la pitoreskejoj de Huangshan. Li estas mezlerneano, filo de kamparano, kaj loĝas en vilaĝo 40-50 kilometrojn for de Huangshan. Tuj kiam komenciĝis la someraj ferioj, li piediris kunportante sekan manĝaĵon por viziti tiun lokon. Antaŭ ol renkontiĝi kun ni, li iris du tagojn, tamen li montriĝis energi-plena. Li diris, ke tio estas lia dua vizito. Li bone konis la lokon, tial li fariĝis nia gvidisteto.

Beihai estas la plej bela en Huangshan. Ĝi forte logis nin gejunulojn. Frumatene ni ascendis la nebulan rigardejon Qingliang. Ondiĝis vastega nubomaro en la antaŭo. Ĉielskrapis antikvaj pinoj en la malantaŭo, kaj pepis birdoj ĉirkaŭe. La ruĝa suno leviĝis malrapide kaj rozigis la nubomaron. Videblis la mirindaj naturaj pejzaĝoj kiel la Alta Pino sur Kruta Rokmuro kaj la Plurĝiba Montokresto. Mi kaj Ai Ping foliumis turisman mapon por serĉi la sekvantan vidindejon, kaj niaj edzinoj plukis belajn sovaĝajn liliojn kaj postkuris viglajn sciurojn en arbareto. Ni havis agrablan vivon kaj sentis nin kvazaŭ en senzorga infaneco. Ni piknikis sur herbejo kaj poste la geedzoj Ai Ping iris ien. Ventrokuŝante sur herbejo, mi kaj Xiao Yang flustris niajn neforgeseblajn jarojn. Ni kreskis en la sama korto. Ni konas kaj fidas unu la alian kaj sin trovas inter ni bona harmonio. Antaŭ kvar jaroj mi revenis malmobilizita al Beijing. Ni ofte kunestis, kaj ekĝermis inter ni amo. Ni geamiketoj fariĝis hodiaŭ nedisigebla paro.

Ni revas pri la estonta feliĉa vivo.

Ni ekskursis du tagojn kaj revenis tute elĉerpitaj, tamen tre ĝojaj, al nia bambua dometo. Laŭ propono de servisto ni banis nin en la akvo de la termofonta naĝejo de 40°C por unu horo, kaj la laco malaperis for de ni, kvazaŭ masaĝitaj.

Ni adiaŭis Huangshan kaj veturis al Hangzhou, pitoreska urbo nomata "Paradizo". Xiao Yang kaj Ai Ping naskiĝis en tiu urbo kaj en sia 4-5-jara aĝo transloĝiĝis al Beijing. Ili tre sopiris sian hejmlokon forlasitan antaŭ pli ol 20 jaroj. Vespere ni kune iris viziti la avon de Xiao Yang, kaj li ĝojplene regalis nin kaj gratulis nin pro nia geedziĝo. Li akceptis nin afable, parolis humure, kaj ni havis tri agrablajn tagojn en lia hejmo. Li rakontis al ni sian pasintaron en juneco kaj komprenigis al ni la feliĉon de ni juna generacio. Estas neforgeseble, ke la 80-jara avo kun bastono akompanis nin en ekskurso al la Okcidenta Lago. Li

ĉiam estis ridetanta dum vojirado. Ni kune fotiĝis ĉe ĉiuj vidindaj lokoj.

Poste ni ŝipveturis de Hangzhou al Suzhou en nokto. La nokton ni pasigis en kajuto kun kvar litoj. Ni rigardis la noktan pejzaĝon laŭborde. La ĝardejoj de Suzhou estas famaj en Ĉinio. Ili havas artefaritajn montetojn, zigzagajn koridorojn, graciajn kioskojn kaj pavilonojn tute aliajn ol tiuj en Hangzhou.

Ni kaj la geedzoj Ai Ping disiĝis en Suzhou, ĉar ili volis vojaĝi al Wuxi kaj Shanghai (Ŝanhajo) kaj ni — reveni al Beijing. Ni veturis per trajno preterpasonta la urbon Zhengzhou, ĉar mi volis viziti mian plej intiman amikon Bai Minggong kaj aliajn proksimajn kamaradojn en armeo. Informiĝinte pri nia edziĝovojaĝo, li skribis al mi plurfoje, ke ni vizitu Zhengzhou kaj nepre gastu ĉe li kelkajn tagojn. Mi adiaŭis lin antaŭ 4 jaroj. Li kaj lia edzino tre afable akceptis nin. Ili invitis nin al ĉasado.

Ĝojo de ĉasado



Medio de la homaro alfrontas seriozan krizon

PLI kaj pli reduktiĝas agraro, detruigigas arbaroj, malmultiĝas dolĉa akvo, malaperas iuj specoj de sovaĝaj bestoj kaj ŝveliĝas urboj. Tiuj seriozaj krizoj alfrontataj de la medio de la homaro vekis grandan atenton de multaj registaroj. Ili publikigis leĝojn, faris sciencan esploradon kaj elmetis efikajn rimedojn por protekti naturajn riĉfontojn kaj haltigi malignan ŝveliĝon de urboj kaj atingis iujn sukcesojn.

SERIOZA EROZIO DE TERO

La vivo de la homoj estas nedigebla de la tero, sed la agraro sur nia tergloba konsistigas nur dekonon de la areo de la tero. En Danlando la agraro konsistigas 65% de ĝia totala areo, en Britio 30%, en Usono 20%, en Ĉinio 17% kaj en Sovetunio nur 10%, kaj en iuj aliaj landoj ĝi konsistigas nur 5%-6%. Sed tiuj agroj suferadas seriozan detruon.

Sablo englutas multan teron. Oni taksis, ke la sablaj dezertoj kaj sablita tero de la mondo konsistigas trionon de la areo de la kontinentoj.

La sekvantan frumatemon ni kvinope venis al bordo de Huanghe-rivero ĉe antaŭurbo de Zhengzhou. Tiam la ĝisgenuaj herboj estis plenaj de roso. Ĉiu el ni portis dutuban ĉasistan pafilon sur la ŝultro kaj kuglujon ĉe la talio. Laŭ agmaniero de ĉasisto ni disiĝis en kamparo. Ili facilmove kuris kaj rapide malaperis en matena nebulo, dum mi kaj Xiao Yang, timante, ke niaj ŝuoj kaj ŝtrumpetoj malsekiĝos, restis kun pafiloj en

Tie loĝas sesono de la loĝantoj de la tergloba. Du trionoj de la pli ol 150 landoj de la mondo estas damaĝitaj de sablizo. Ekzemple, en la pasinta duonjarcento Saharo de Afriko englutis 650,000 kvadratajn kilometrojn da agroj kaj paŝtejoj en Sahel-regiono. La dezerto ĉiujare etendiĝas suden 30-50 kilometrojn kaj norden al la bordo de Mediteraneo englutante centmilojn da hektaroj da tero. Ĉiujare sablo antaŭen puŝiĝas 13 kilometrojn en la Delto de Nilo. Laŭ takso de konferenco de UN pri sablizo, ĉiujare ĉ. 5-7 milionoj da hektaroj da agroj perdiĝas pro sablizo. Se oni ne alprenos urĝan rimedon, triono de la agraro de la mondo perdiĝos ĉe la fino de la kuranta jarcento.

Rimarkinda estas la agropertiĝo pro akva kaj venta erozio, kiun plej multe suferas Usono, Ĉinio kaj Sovetunio. Ĉiujare akvo forportas ĉ. 3 miliardojn da tunoj da grundo el Usono. La ĉina rivero Huanghe (Flava Rivero) ĉiujare forportas 1.4-1.6 miliardojn da tunoj da tero kaj sablo, inter kiuj estas 30 milionoj da tunoj da organika grundo.

manoj por atendi, ke la ĉasaĵo mem venu al ni. Aŭdiĝis de tempo al tempo obtuzaj pafoj de malproksime. Subite aro da turtoj estis preterfluganta super niaj kapoj. Mi kaj Xiao Yang celis kaj pafis kaj trafis unu el ili. Xiao Yang eksaltis de ĝojo. Tio vekis ĉe ni pli grandan intereson pri ĉasado. Ni komencis serĉi kaj ĉasekvi leporon en herbaro. Post unu horo ĉiuj "ĉasistoj" revenis kun ĉasaĵoj. Ni ĉasis sume 10 leporojn kaj

En la fino de la sesdekaj jaroj pli ol 100 milionoj da hektaroj da agroj suferis akvan erozion en Sovetunio kaj ĉiujare perdiĝis pro tio 500-600 milionoj da tunoj da grundo.

Ankaŭ vento multe damaĝas grundon. Ekzemple, en 1934 en Usono nigra ŝtormo kovris areon kun longeco de 2,400 kilometroj kaj larĝeco de 1,400 kilometroj. La ŝtormo daŭris tri tagojn. Ĝi forportis 300 milionojn da tunoj da grundo de la okcidenta stepo, reduktante la produktokvanton de vintra tritiko al 13.8 miliardoj da kilogramoj tiujare, je 5.1 miliardoj da kilogramoj malpli multe ol la meznombra produktokvanto en la pasintaj dek jaroj. En 1963 okazis en Sovetunio ankaŭ nigra ŝtormo, kiu damaĝis 20 milionojn da hektaroj da agroj. Nur en Pavlodar pli ol miliono da hektaroj da plantoj estis serioze damaĝitaj kaj detruitaj de ŝtormo. En 1969 kaj en la komenco de 1970 plurfoje leviĝis nigra ŝtormo en norda Kaŭkazo, suda Ukraino kaj la centra nigra-grunda zono en Sovetunio.


kelkajn turtojn. Ni sidis ĉirkaŭ tablo en la hejmo de Bai Ming-gong. Bai, kiun ni rigardis kiel "kompetentan kuiriston", frikasis la leporojn kaj turtaĵon tre bongustaj. Ni ĝuis la pladojn kaj interparolis pri nia amikeco. Ili tostadis pro nia geedziĝo.

Reveninte en Beijing, ni regalis niajn kolegojn kaj parencojn per bombonoj. Tiel ni plenumis nian geedziĝon. La feliĉa edziĝovojaĝo ĉiam restos en nia memoro.

Ankaŭ iuj landoj en suda Ameriko multe suferis ventan erozion. En Venezuelo vento damaĝas 2.9 milionojn da hektaroj da tero, inter kiuj la areo de la kulturebla tero konsistigas 64%. En aliaj landoj la ventodamaĝita tero okupas 15% minimume.

Laŭ takso, en la pasintaj cent jaroj ĉ. 2 miliardoj da hektaroj da tero sur la terglobo estis damaĝitaj de sablo kaj vento. Ili konsistigas ĉ. 27% de la totala areo de agroj, inter kiuj 50 milionoj da hektaroj fariĝis tute nekultureblaj.

Rapida disvolviĝo de industrio, senĉesa ekspluatado de subteraj riĉfontoj, disvastigo de urboj kaj uzo de tero por trafiko estas alia grava kaŭzo de reduktiĝo de agroj. De 1967 pro funkciigo de fabrikoj, konstruado de ŝoseoj kaj domoj kaj disvolvo de turisma afero perdiĝis ĉ. 4 milionoj da hektaroj da agroj en Usono. En la pasintaj dek jaroj, pro la samaj kaŭzoj steriliĝis 1.6 milionoj da hektaroj da tero en diversaj landoj de Eŭropo. La totala areo de ŝtonhakejoj en Sovetunio estis ĉ. 2 milionoj da hektaroj. Pro disvolviĝo de minekspluatado, la areo de detruita tero pliiĝis je 35,000 hektaroj ĉiujare. En la meza periodo de la sesdekaj jaroj Ĉeĥoslovakio perdis 596,000 hektarojn da



Parto de Novjorko

tero, kiuj konsistigas 6.3% de ĝiaj agroj. En Pollando la areo de la perditaj agroj superis 30,000 hektarojn.

ARBAROJ MULTE DETRUITAJ

La arbaroj estas "ĝeneralaj reguligaj ĉambroj de la naturo". Akvo de riveroj, kiuj fontas de ili kaj trapasas ilin, konsistigas 70% de la totala akvokvanto de la mondo. Arbaroj reduktas rapidecon de vento je 60%. Arboj sur rokmuoj malmultigas okazigon de superakvo kaj kotoŝtona fluo. Tiuj ĉirkaŭ akvo-rezervejoj malhelpas forportiĝon de tero kaj sablo kaj baras lavangon. Tiuj ĉirkaŭ urboj reguligas aeron

kaj temperaturon. Unu hektaro da verdaĵoj povas purigi 18 milionojn da kubmetroj da aero.


Nun la arbara areo de la mondo estas ĉ. 3.7 miliardoj da hektaroj. Sovetunio, Kanado kaj tropikaj landoj kiel Brazilo estas landoj kun plej granda areo de arbaroj en la mondo.

Pro diversaj kaŭzoj nun ĉiujare detruigas 18 milionoj da hektaroj da arbaroj en la mondo. Laŭ takso, de 1950 ĝis 1975 la monda arbara areo reduktiĝis de 5 miliardoj ĝis 2.6 miliardoj da hektaroj. En Azio, Afriko kaj Latinameriko oni ĉiujare forhakas 20 milionojn da hektaroj

Ĉinaj sciencistoj esploras sabloventon en la baseno Turpan de Xinĵiang.



Saharo



da arbaroj, inter kiuj estas 11 milionoj da tropika pluva arbaro.

Brazilo estis tre abunda je arbaroj, kiuj kovris 300 milionojn da hektaroj. Sed nun en ĝia nordorienta ŝtato la Riogrando Norda troviĝas neniu postsigno de primitiva arbaro. Nur de 1965 ĝis 1975 detruigis 11 milionoj da hektaroj da arbaroj en ĝiaj centra kaj okcidenta partoj kaj en ĝia ŝtato Amazonio. Ĝia seka regiono plivastiĝas jaron post jaro.


La arbara areo de Aŭstralio estas 34.9 milionoj da hektaroj. Nun ĉiujare oni forhakas 121,500 hektarojn da arboj, sed plantas nur 30,000 hektarojn da arboj.

En Italio okazis en 1973-1974 pli ol 9,000 arbaraj incendioj, kiuj ruinigis 200,000 hektarojn da arbaroj. Nun la proporcio de la plantitaj kaj hakitaj arboj estas 3:10. Post duonjarcento Apeninoj fariĝos tute kalvaj.

DOLĈAKVA RIĈFONTO ALFRONTAS KRIZON

Akva fonto estas plej riĉa sur la terglobo. La totala akva volumeno estas ĉ. 1.3 miliardoj da kubkilometroj, kies 97% troviĝas en la oceanoj. Escepte de neuzablaj glaciriveroj kaj glaciaj kronoj sur la montoj, la akvo sur la kontinentoj okupas nur ĉ. 0.17%, kies duono estas en la salaj lagoj kaj internaj maroj. La akvokvanto de riveroj kaj dolĉakvaj lagoj konsistigas nur 0.0091% de la totala akvokvanto de la terglobo. Kaj krome tiuj riveroj kaj lagoj lokiĝas tre nesimetriĉe. Krom vaporiĝo, nur ĉ. triono de la dolĉa akvo estas uzata por la homa vivo kaj industria kaj agrikultura produktado.

Kun rapida disvolviĝo de industria kaj agrikultura produktado, ĉiam kreskas la konsumo kvanto de la dolĉa akvo. Por produkti unu kilovattoron da elektro necesas 3 litroj da akvo, por fandi unu tunon da fero kaj ĝin ŝtaligi necesas 300 kubmetroj da akvo, kaj



Kampoŝirma forstozono en Shache-gubernio de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, Ĉinio

por produkti unu tunon da sinteza kaŭĉuko aŭ artefarita fibro necesas 2,100-3,500 kubmetroj da akvo. Laŭtakso, je la nuna rapideco de industria disvolviĝo, la akvokonsumo kvanto por malvarmigo konsistigos ĉ. 30% de la totala akvokvanto bezonata de la tuta mondo. En 1970 Japanio konsumis 80 miliardojn da kubmetroj da akvo kaj en 1985 ĝi konsumos 131 miliardojn da kubmetroj. La akvokonsumo kvanto de Usono en 1970 estis 523 miliardoj da kubmetroj kaj en 1985 ĝi atingos 1,120 miliardojn da kubmetroj.

Kun leviĝo de la vivnivelo senĉese kreskas la akvokonsumo kvanto de grandaj urboj. Ĉiu loĝanto de Parizo ĉiutage konsumas 450 litrojn da akvo, tiu de Osaka 600 litrojn kaj tiu de Ĉikago 824 litrojn.

La akvokonsumo kvanto de industrio kaj urba vivo ne nur estas tre granda, sed ankaŭ kreskas tre rapide, tial serioze mankas akvo en ĉiuj landoj. Laŭkonjekto, en la jaro 2000 elĉerpiĝos la subtera akvo en FR Germanio. En Japanio tersurfaca malleviĝo okazis al 41 regionoj pro tromulta uzo de subtera akvo. En 1973 nombro da fabrikoj en Nagasaki ĉesis labori pro nesufiĉa akvoprovizo. En Kuvajto, Gibralto kaj aliaj lokoj oni devas sensaligi marakvon por sin vivteni.

La totala produktiveco de mondaj ekipaĵoj por sensaligo de marakvo en 1960 estis nur 40,000 kubmetroj ĉiutage kaj tiu en 1969 — 950,000 kubmetroj. Nun en multaj lokoj pura akvo jam fariĝis komercaĵo.

MALIGNA ŜVELIĜO DE GRANDAJ URBOJ

Tre rapide kreskas la nombro de urbanoj en diversaj landoj. Laŭtakso, la areo de la urboj konsistigas 0.3% de la totala areo de la tero, tamen tie koncentriĝas 40% de la loĝantaro de la mondo. Laŭtakso, en la jaro 2000, 70% de la loĝantaro koncentriĝos en la urboj. Tiam 90% de la loĝantoj en norda Ameriko kaj Latinameriko fariĝos urbanoj, kaj duono de la loĝantoj en Afriko, kies landoj nun estas agrikulturaj, fariĝos urbanoj.

La urboj sur la terglobo havas historion de 5,000 jaroj. Antaŭ la 19-a jarcento estis tre malmultaj urboj, kies loĝantaro superis milionon. En 150 jaroj de 1800 ĝis 1950, la loĝantaro de grandaj kaj mezgrandaj urboj de la mondo plimultiĝis 22-oble.

La maligna ŝveliĝo de urboj kaŭzas seriozan polucion al la medio. Nun ĉiujare ĉiuj grandaj urboj de la mondo ellasas ĉ. 3 miliardojn da tunoj da solidaj rubaĵoj kaj 500 kubkilometroj da malpura akvo.

**Celebrante la 100-jaran jubileon
de la naskiĝo de
LUSIN
(1881—1936)**

**la plej fama verkisto de Ĉinio,
ni rekomendas al vi**



NOVELOJ DE LUSIN

Plena Kolekto

Lusin estis granda literaturisto, pensulo kaj revoluciulo de Ĉinio kaj ankaŭ fondinto de la moderna ĉina literaturo. Liaj ĉefaj noveloj estis verkitaj dum la jaroj 1918 — 1925. Ili profunde reflektis la ŝanĝiĝojn de la diversaj social tavoloj de la tiama ĉina socio forte kritikante kaj atakante la malluman realon kaj esprimante senliman simpatian al la suferantaj laboruloj.

La nuna Esperanta eldono entenas ĉiujn 33 novelojn de Lusin. La antaŭparolo al lia unua novelkolekto *Krioj*, en kiu li parolis pri la motivo, por kiu li prenis literaturon kiel batalilon, helpas al la legantoj kompreni liajn novelojn. Al tiu ĉi volumo estas aldonitaj “Kronologiaj Notoj pri Lusin” kaj pluraj tutpaĝaj ilustraĵoj.

10Es-1290 13×12cm. 496p. bind. £2.80 US\$4.80



SOVAĜA HERBARO


Kolekto de ĉiuj 23 poemoj en prozo verkitaj de Lusin

10Es-30 122×188mm. 96 p. broŝ. £0.35 US\$0.65

Ambaŭ eldonitaj de
FREMDLINGVA ELDONEJO, Beijing

Mendu ĉe loka peranto de EPC
aŭ ĉe Esperanta Sekcio de
GUOJI SHUDIAN

P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Verda Majo:

Flustr' el Uragano

Kun komentoj de Miyamoto Masao

Broŝ. B6 (formato) 89 paĝoj

650 enoj (aŭ egalvaloro)

Mendu ĉe: Japana Esperanta Librokooperativo

Toyonaka, Sone-higasi 1-11-46-204

561 Japanio

aŭ ĉe: Libroservo de UEA



Shen Kegong

Mirinda knabo—viva komputero

de XINTAI

ĈINA 11-jara mirinda knabo Shen Kegong povas fari mense en mirinda rapideco ĝustajn adiciojn, subtrahojn, multiplikojn kaj dividojn de plurciferaĵoj entjeroj, frakcioj kaj decimaloj, precipe operaciojn por radikoj kaj potencoj kaj miksan aplikon de la ses fundamentaj aritmetikaj operacioj. Liaj operacioj plejparte estis pli rapidaj ol tiuj faritaj de poŝkomputero. Ĉiuj, kiuj propraokule rigardis liajn operaciojn, tre miris pri liaj rapideco kaj senerareco kaj nomis lin komputero viva.

Shen Kegong estas filo de kampulo en Xiaxian-gubernio de Shanxi (Ŝanĥi)-provinco. De la lastaj tagoj de septembro ĝis la unua tagdeko de oktobro de la pasinta jaro, li faris dek demonstradojn de mensa kalkulado en Beĵing (Pekino) kaj Taijvan (Tajĵuan) por la Ĉina Scienca kaj Teknika Asocio, la Ĉina Centra Televido k.a., kio vekis grandan intereson ĉe la rigardantoj.

Antaŭ nelonge, en Taijvan okazis demonstrado de mensa kalkulado kun partopreno de pli ol 1,200 kontistoj. Shen Kegong faris ĉelokan mensan operacion dum tri kontistoj faris la samon per poŝkomputeroj. La prezidanto de la kunveno donis skriban demandon: $1.455^2=?$ Post 0.6 sekundo Shen skribis sian respondon 2.117025. Poste estis

donita alia demando: $1 \times 20^2 \div \sqrt{10000} - 0.25=?$ Post 6.5 sekundoj Shen donis respondon 3.75, kaj la tri uzantoj de poŝkomputeroj solvis la problemon nur post 17.5 sekundoj. Tiam ankaŭ iu kontisto donis demandon: $639 \times 33 + \sqrt[3]{884,736}=?$ Post 3.4 sekundoj li faris respondon 21,183, pli rapide ol la komputeroj. Tio mirigis la pli ol 1,200 ĉeestantojn.

Zhang Yuzhong, prezidanto de la Shanxi-provinca Abak-kalkula Asocio, kiu akompanis Shen Kegong en la dek operaciaj demonstradoj, konstatis, ke la pli ol 600 operacioj faritaj de Shen Kegong ĉiuj estis ĝustaj, el ili pli ol 400 estis pli rapidaj ol tiuj faritaj per poŝkomputeroj kaj pli ol 60 respondoj estis pli precizaj ol tiuj faritaj de la 8-12-ciferaĵoj poŝkomputeroj. Zhang Yuzhong trovis, ke Shen Kegong kalkulis ju pli multe des pli rapide, post duonhoro lia operaciado evidente pli rapidiĝis, precipe la polinomia potencado kaj radikado de kvar-kvin ciferoj estis pli rapidaj ol tiuj faritaj per poŝkomputeroj. En demonstrado en Beĵing, oni demandis lin: $625^0=?$ Post 20 sekundoj Shen unuŝpire respondis 14,551,915,228,366,851,806,640,625.

Tiel rapida kaj ĝusta kalkulado de la 11-jara knabo vekis atenton de diversaj rondoj. Menskalkulistoj de la Ĉina Abak-


kalkula Asocio kaj la Shanxi-provinca Abak-kalkula Asocio, prof. Wu Yingdong de la matematika fakultato de la Jilin-a Universitato, prof. Li Baoguang de la Centra Financa kaj Ekonomia Kolegio kaj fama juna mens-aritmentikisto Shi Fengshou k.a. kontrolis la menskalkuladon de Shen Kegong kaj opiniis, ke li havas superhomajn saĝon, memorpovon kaj kapablon de ĝustaj analizo kaj prijuĝo. Kvankam en sia mensa kalkulado li aplikas nur la ĝeneralajn rapidajn metodojn en aritmetiko, tamen li ofte trovas plurajn kalkulajn manierojn kaj elektas por si la plej bonan. Li povas deponi en la cerbo certan nombron da ciferaĵoj donitaĵoj por uzi poste. Tial li povas plenumi serion da prijuĝoj kaj kompleksaj operacioj en nur dekelkaj aŭ kelkaj sekundoj, aŭ eĉ en palpebrumo.

La gepatroj de la knabo Shen Kegong estas komunumanoj de la brigado Shicun de Dalu-komunumo, Xiaxian-gubernio, la patro Shen Hairong iam estis kontisto de sia produkta taĉmento kaj la patrino estas kampulino. Ilia klereco ne estas alta.


En 12 monatoj ekde septembro de 1979, Shen Kegong ellernis ĉiujn lecionojn de malsupera mezlernejo per bonaj poentoj kaj komencis studi en la unuajara klaso de supera mezlernejo en septembro de 1980.

Pentristeto Ma Ling

Ma Ling en pentrado



Ma Ling nutras birdon.




Ma Ling aĝas nur sep jarojn, tamen unu el liaj pentraĵoj ricevis unuagradan premion en la Beijing-a Ekspozicio de Infanaj Pentraĵoj kaj iuj aliaj ekspoziciĝis en eŭropaj landoj.

Li ekamis pentri en sia 2-3-jara aĝo. Li kunportadis paŝtelojn kaj pentrotabulon al infangardeno por pentri kokon, hundon, katon kaj aliajn bestojn. Li ofte vizitis, kune kun sia patro, ekspozicion de pentraĵoj kaj zoologian ĝardenon por observi kaj pentri bestojn. Vere li estas pentro-maniulo.


Li amas ankaŭ bredi kokon, hundon, katon kaj birdon. Liaj pentraĵoj kun lertaj strekoj estas versimilaj. El la figuroj de koko, hundo, kato kaj aliaj bestoj, kiujn li pentris, vidiĝis lia sento pri la infana vivo.

Fortimigo
de MA LING (6-jara)





Ma Ling pentras
en zoologia ĝardeno.



Kato
de MA LING (6-jara)

Aglo
de MA LING (6-jara)

Ma Ling foliumas bildgazeton.







古馬野子

二平九夕





Bokso ĉingjan




Lukto inter lancisto kaj duspadistino

VUŜU — ĈINA LUKTOARTO

Vuŝu estas ĉina antikva popola sporto kaj ankaŭ kultura heredaĵo akumulita kaj pliriĝigita en la vivo de la laboranta popolo. Ĝi estas enhavoriĉa kaj cirkulas en la urboj kaj kamparo de Ĉinio.

Ĉinio havas dekojn da specoj de luktoarto, kiel ĉangĉjuan, tajĝiĉjuan, nanĉjuan, ŝingjiĉjuan kaj tongbiĉjuan. Oni prenas lancon, bastonon, glavon, spadon, hokon, halebardon, 9-eran vipon, tribastonon, svingeblan ferbulon k. a. kiel instrumentojn de tiu sporto.



Kolektiva skermado

Lukto inter glavisto kaj lancisto



Lukto inter tribastonisto kaj du lancistoj





SUKCESO DE ĈINIO EN PREVENTO, KURACADO KAJ SCIENCA ESPLORO PRI KANCERO

Pli ol duono de 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio starigis tumorajn hospitalojn kaj institutojn pri tumoroj aŭ tumorajn fakojn en hospitalo. En tiuj lokoj, kie troviĝas pli da pacientoj de tumoroj, oni starigis subprovincajn, urbajn aŭ guberniajn tumorajn hospitalojn aŭ institutojn pri tumoroj.

En la pasintaj dek jaroj Ĉinio akiris jenajn sukcesojn en esplorado de kancero: De 1975 ĝis 1979 Ĉinio retrospektive enketis pri la morto kaj dislokiĝo de pacientoj de maligna tumoroj inter 850,000,000 loĝantoj kaj akiris grandan kvanton da sciencaj donitaĵoj. En esplorado pri la kaŭzoj de kancero oni havas nemalmultajn trovojn, kiuj jam estis konstatitaj en animala eksperimentado. Laŭ la ĉefaj kaŭzoj de kancero oni disvolvis amasan preventadon kaj senĉese plibonigis fruan prognozon por ke la pacientoj de ezofaga, hepata kaj faringa kanceroj ricevu pli fruan kuracadon, kio rikoltis rimarkinde bonan efikon.

58 USONAJ UNIVERSITATOJ AKCEPTIS ĈINAJN ESPLORANTAJN STUDENTOJN

La fizikaj fakultatoj de 58 usonaj universitatoj inkluzive la Kolumbian Universitaton, la Harvardan Universitaton kaj la Masaŝusecan Instituton de Teknologio kune akceptis per ekzameno diplomitajn

studentojn de Ĉinio. 548 studentoj, diplomitaj studentoj kaj instruistoj de 103 altaj lernejoj kaj scienc-esploraj organizoj de Ĉinio sin anoncis por partopreni en la ekzameno. Prof. Yan Jici gvidis la komisionon por ekzameno, esploris kaj proponis 132 ekzamenitojn. Inter ili 19-jara junulo gajnis la unuan lokon en la ekzameno. Duono de la akceptitoj venis de la Beijing-a Universitato, la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato, la Fudan-a Universitato, la Lanzhou-a Universitato kaj la Nanjing-a Universitato.

“ELEKTITAJ NOVELOJ DE USONO” ELDONITA EN ĈINIO

La Ĉina Junula Eldonejo eldonis “Elektitaj Noveloj de Usono”. Ĝi enhavas 31 novelojn de la pasintaj 1.5 jarcentoj kun verkoj de post periodo de tiu tempo kiel la ĉefa parto kaj la biografiajn notojn de la 31 verkistoj.

Ĝi estis kompilita de prof. Wang Zuoliang de la Beijing-a Fremdlingva Instituto, kiu vizitis Usonon en la unua duono de la pasinta jaro. Li faris antaŭparolon por ĉiu novelo.

MULTIĜAS PANDOJ EN SICHUAN-PROVINCO

La gubernio Baoxing de Sichuan-provinco de Ĉinio estas la hejmloko de pandoj. En la lastaj jaroj evidente multiĝis pandoj en tiu gubernio. Lastatempe oni plurfoje rimarkis, ke pandoj descendis de montoj kaj iuj el ili kunportis idojn.

Oni taksis, ke en Ĉinio ekzistas ĉ. mil pandoj. Nun oni jam difinis 10 lokojn kiel rezervejojn de pandoj. La gubernio Baoxing havas 14 profesiajn protektistojn. La ŝtato publikigis regularon pri protekto de raraj animaloj.

La pandoj, kiujn Ĉinio donacis al Britio, Francio, Japanio, Koreio, Meksikio kaj Usono, estis kaptitaj en tiu gubernio.


LA FAMA RUMANA DRAMO “JUSTA PUBLIKA OPINIO” SUR SCENO DE BEIJING

La satira komedio “Justa Publika Opinio” verkita de fama rumana dramisto O. Baranga estis ludita de la Beijing-a Popola Arta Teatro en Beijing kaj estis alte taksata de ĉinaj spektatoroj.

La komedio senkompate vipis burokratismon. Ĝi havas novan formon kaj uzas esprimmanieron de teatro en teatro. Dum prezentado la aktoroj kiel revuistoj rakontas rekte al la spektatoroj la okazaĵojn kaj esprimas opinion de la dramisto pri la okazaĵo.

En provludo de la komedio, la Rumana Komisiono por Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj kaj koncerna teatro donis varman subtenon, kaj la rumana reĝisoro de la komedio aparte verkis artikolon pri reĝisoraj rimarkigoj kaj donis bonajn konsilojn pri elekto de aktoroj kaj prezenta formo.

La moderna dramo “Justa Publika Opinio” prezentata de la Beijing-a Popola Arta Teatro





KONKOBILDOJ

de Lao Bai

OKAZE de promenado sur marbordo aŭ naĝado en maro, oni ofte volas kolekti belajn konkajn kaj kunporti al sia hejmo por apreco. Tamen, nur en la lastaj dekoj da jaroj oni komencis fari bildojn el konkaj, kaj marborda urbo Dalian en la nordo de Ĉinio estas la ĉefa produkto de la ĉinaj konkobildoj.

Enirinte en la pordegon de la Dalian-a Konkobilda Fabriko, vi sentas, ke vi troviĝas en mondo de konkaj artaĵoj. Ĉe la pordoj, en la koridoroj kaj la gasteĉambroj, ĉie pendas belaj konkobildoj. Sur la stabloj estas ĉiaj konkaj kiaj konusaj krustoj de

litorinoj, ventumilaj krustoj de pektenoj, grandaj kaj dikaj konkaj similaj al la oreloj de budhoj. Iuj el ili ruĝas kiel aceraj folioj; aliaj blankas kaj puras kiel jado; triaj brilas, kvazaŭ ili estus kovritaj per verniso. . .

La konkaj prenataj el riveroj, lagoj kaj maroj havas naturajn kolorojn kaj vejnojn, kaj la konkaj bildoj havas aldone artefaritajn belajn. Oni ofte diras, ke "sen prilaboro jado ne povas fariĝi artaĵo", nur post arta prilaboro belaj ordinaj konkaj povas fariĝi mirindaĵoj. Arta projektisto Wang Bo diris al mi, ke por fari unu konkobildon kun montoj, riveroj, floroj kaj birdoj

estas necesaj pli ol 200 specoj de diverskoloraj kaj diversvejnaj konkaj. Mi iris kun Wang en la laborejon kaj rigardis produktaĵojn de la artistoj. Tenante diversformajn konkajn per siaj lertaj fingroj la junaj laboristoj defrotis kaj tranĉis ilin per smirgaj radoj. Iuj pecoj estis frotitaj ĝis la malgrandeco de rizgrajno, aliaj ĝis la maldikeco de fadeno kaj triaj ricevis la formon de petalo, nubo aŭ flugilo. Poste ili estis laŭprojekte agluitaj al lignaj tabuloj, kaj tiamaniere kreigis konkobildoj.

En sia projekto, montrante la prilaboritajn konkajpecojn Wang diris al mi kie produktiĝas la konkaj kaj kiom da specoj de ili estis uzataj. Antaŭ tre longe en la fina periodo de paleolitiko, la virinoj jam portis konkajn kiel ornamaĵojn. En la neolitiko oni faris el konkaj tranĉilojn, ŝovelilojn, hakilojn kaj aliajn laborilojn. Antaŭ 4,000 jaroj, kun la apero de privata posedsistemo oni ekuzis rarajn belajn konkajn kiel monon. En Han-dinastio antaŭ 2,000 jaroj, oni komencis fari florojn, fiŝojn kaj insektojn el konkaj kaj inkrusti per ili diversajn ilojn. Kaj poste oni faris kompare delikatajn ornamaĵojn uzatajn de la popolo. Tiel disvolviĝis la arto de konkobildoj. Tamen la farado de veraj konkaj metiartaĵoj estis komencita de la Dalian-a Konkobilda Fabriko kaj Wang Bo estas unu el la iniciatintoj de tiu metiarto.

Wang Bo vivis ĉe la marbordo de sia infaneco kaj li aparte amas la maron kaj konkajn. En lia hejmo konserviĝis multaj specoj de konkaj. Li ofte meditis rigardante la konkajn. En 1958, li estis nur pli-ol-20-jara skulptisto de gipsofiguroj. Iun

tagon, li trovis, ke la konkvoj havas riĉajn kaŝitajn kolorojn. Ekstere iuj konkvoj estas te-koloraj, tamen interne estas purpuraj; aliaj ekstere malhelkoloraj, tamen interne ruĝegaj aŭ brile buntaj. Tiam li ekpensis: Kian belajon oni povus krei, se oni farus bildon el konkvoj kun koloroj neniam paliĝantaj kaj diversaj formoj! Li konigis sian ideon al afiŝopentristo, kaj fondis grupon kun kelkaj kolegoj por tion fari. Post kelkaj tagoj ili elfaris la unuan konkobildon "Koko kaj Peonioj" el prilaboritaj konkvoj en formo de tradicia ĉinstila pentraĵo. Tiamaniere aldoniĝis nova branĉo al la me-tiarto de Ĉinio.

Nun, en Ĉinio troviĝas 29 kompare grandaj konkvo-metiar-tajaj fabrikoj kaj la Dalian-a estas la plej granda el ili. Tiu fabriko havas 410 laboristojn kaj oficistojn. Krom ĉefe konkobildoj ili ankaŭ faras kestojn de virinaj orna-majoj, flartabakujojn kaj aliajn pli ol 30 specojn de objektoj. La temoj de iliaj konkobil-doj kovras tre vastan kampon, kiel ekzemple "Belo de la Gran-da Muro" kiu spegulas la belan landon de Ĉinio; "Ĉiuj Birdoj Salutas al la Fenikso", kiu sim-bolas la prosperan vivon de la ĉina popolo; "Nü Wa Riparas


la Ĉielon", kiu laŭdas la venkon de la homoj super la naturo. Iuj el ili estas adaptaĵoj de klasikaj dramoj kiaj "La Okcidenta Ĉambro", aŭ de romano kia "Songo en la Buduaro". En la ekspona ĉambro la plej rimar-kinda estas la bildo "Su Xiaomei Trifoje Testas la Novedzon". Ĝi temas pri anekdoto pri poetino Su Xiaomei antaŭ pli ol 800 jaroj: En la geedziĝa nokto Su Xiaomei, fratino de la fama antikva ĉina poeto Su Dongpo, antaŭ ol la novedzo eniris en la dormoĉambrom, elmetis tri proble-mojn al sia novedzo Qin Shaoyou por lin testi. Ŝi diris, ke se li ĝuste solvos ilin per poemoj, li ricevos tri pokalojn da bona vino en jadvokalo kaj estos akceptita en la ĉambrom. Se li solvos du el ili, li ricevos teon en arĝenta taso kaj atendos refojan teston en la venonta nokto. Se li solvos nur unu el ili, li trinkos akvon el fajenca taso kaj estos punita je legado de tri monatoj eksterdome. La bildo montras, ke la novedzo ne povas elpensi taŭgan version por adaptiĝi al la donita "elpuŝiĝis la luno antaŭ la fenestro per fermo de pordoj". Tiu fierema poeto embarasiĝis kun kuntiritaj brovoj, gapantaj okuloj, ventu-milo swingata en la maldekstra mano, kaj gratas la orelon kaj

mentonon per la dekstra mano. La aŭtoro plene montris lian konfuziĝon per sia artaĵo. Kvan-kam poeto Su Dongpo trovis bonan version kaj volas helpi la novedzon, tamen ne decas, ke li sufloru. La verkinto tiel aranĝis la homojn en la bildo, ke la po-eto Su estas post la artefarita monteto kaj montras sian supran parton kun ruza mieno, unu mano palpanta la barbon kaj la alia ĵetanta ŝtoneton en la lage-ton por sugesti al la novedzo. La novedzino atente aŭskultas kun mieno maltrankvila antaŭ la fenestro.


Tiu bildo estas viveca kaj brilkolora. Ankaŭ la aliaj hom-figuroj estas tre versimilaj. La belaj domoj kaj kioskoj en la korto, oreflavaj krizantemoj ekster la fenestro, la lotusfloroj en la lageto kaj alte pendantaj ruĝaj lanternoj ktp., ĉiuj impresas per etoso de geedziĝa festo.

Ĝuste kiam mi rigardis la belan verkon, iuj fremdlandaj geamikoj iris en la ĉambrom. Unu belartista el ili diris, ke en sesdekaj jaroj ĉinaj konkobildoj estis transportitaj en Japanion kaj treege interesis la belartistojn de Japanio. Nun, la konkobildoj de Dalian jam trovis merkaton en pli ol 20 landoj kaj regionoj de la mondo.

Projektisto Wang Bo
selektas konkvojn.



La konkobildo "Su Xiaomei
Trifoje Testas la Novedzon"



EN la fino de la pasinta aŭtuno mi vizitis la Kvinan Mezlernejon de Beijing kaj sciigis pri ĝia vivo.

Enirinte ĝian pordon, mi tuj vidis vastan placon, kiu servas kaj kiel sportejo kaj kiel mitingejo por la lernejoj. Ĉirkaŭ la placo staras domoj kun klasĉambroj, laboratorioj, loĝĉambroj kaj legoĉambro.

La lernoperiodo de la nomita lernejo estas 6 jaroj, t.e. po tri jaroj por la du gradoj en lernado. 150 instruistoj laboras por 27 grupoj el 1,200 lernantoj.

Antaŭ la Liberiĝo de 1949 la lernejo estis por infanoj de malriĉuloj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, transherediĝis ĝia bona tradicio de diligenta studo, malluksa vivo, ĝentila konduto kaj disciplinemo. Sed en la 10-jara ĥaoso de la kultura revolucio, tiu tradicio estis detruita kaj nun oni devas restarigi ĝin. Tamen la instruistoj estas

optimismaj pri la restarigo de la bona tradicio. Ili aktive plibonigis sian instruadon. Helpate de gepatroj de la lernantoj, ili faris edukadon pri la revolucia tradicio. Post klopodado de du jaroj, multe pliboniĝis la moro de la lernejo. La lernantoj fariĝis pli diligentaj en lernado. En la pasinta jaro, 220 el la 270 abituriientoj trapasis la ekzamenon de supera lernejo.

Plejparto de la lernantoj loĝas hejme, proksime de la lernejo. Ili venas al la lernejo aŭ per aŭtobuso, aŭ per biciklo, aŭ simple per piediro.

Mi intervjuis knabinon nomatan Zhou Jing. Ŝi estas 16-jara. Ŝi ekvizitis tiun lernejon en aŭtuno de 1980. Matene, ŝi devas atingi la lernejon antaŭ 10 minutoj post la sepa. Antaŭ la tagmezo ŝi havas 4 lecionojn, ĉiu el kiuj daŭras po 45 minutojn. Inter la dua kaj la tria lecionoj estas 20-minuta intertempo por gimnastiko. Post la tagmezo ŝi

KE JIAO:

LA KVINA DE

havas 2 lecionojn kaj hejmeniras je duono post la kvara.


Zhou Jing diris al mi, ke inter la lernobjektoj ŝi plej ŝatas la ĉinan lingvon kaj matematikon. Posttagmeze de sabato ŝi vizitas la kurson pri la ĉina klasika literaturo organizitan de la Geknaba Palaco.

La lernejo kelkiam aranĝas koncerton kaj ekspozicion de pentraĵoj de lernantoj. La distraĵo kaj amuzado de la lernantoj estas utilaj. En la mezlernejo estas malpermesata amorilato inter la gelernantoj, ĉar la registaro pledas por malfrua geedziĝo de la gejunuloj.

Mi sciigis, ke la instruistoj de la lernejo, same kiel instruistoj en aliaj lokoj, vivas kompare mallukse. Ilia salajro dividiĝas en 10 klasojn. La unuaklasa monata salajro estas 140 juanoj kaj tiu de la 10-a klaso estas nur 42. Plimulto el la instruistoj de tiu lernejo estas mezaĝaj kaj salajrataj per ĉ. 70 juanoj (1 juano egalas al 0.68 usona dolaro).

Matematika instruisto Deng Yuji estis diplomitiĝinta en universitato de Wuhan en julio de 1962. Ankaŭ lia edzino okupiĝas pri instruado. La enspezo de la geedzoj estas nur 120 juanoj.

Gelernantoj en gimnastiko



MEZLERNEJO

BEIJING

Unu infanon ili havas, kaj la tuta familio loĝas en la lernejo.

Kamarado Deng instruis jam 19 jarojn. En tiuj jaroj li dediĉis sian tutan energion al instruado. Ĉiutage li estas okupata per korekto de la hejmtaskoj de la lernantoj, preparo de la leciono kaj kompilo de la materialoj por instruo. Iun antaŭtagmezon mi vidis lin preparanta lecionon. Li diris al mi, ke li instruas matematikon al du grupoj kaj preskaŭ ĉiutage li povas enlitiĝi nur post la 11-a nokte. Liaj kamaradoj diris al mi, ke instruisto Deng ofte laboras eĉ en dimanĉo kaj feriaj tagoj. Li estas tre pacienca al siaj instruatoj kaj lin vizitas lernantoj en postlecionaj horoj, malgraŭ ke lia loĝejo estas malvasta. Se lernantoj forestas en lecionoj pro malsano, li helpas ilin en sia hejmo, ĝis kiam la lernantoj povas atingi la kamaradojn.

Krom instruado en sia lernejo, instruisto Deng kontribuas ankaŭ al la socio. La Geknaba Palaco de la urbo-distrikto Dongcheng ofte okazigas matematikan konkurson por elstaraj lernantoj kaj instruisto Deng estas unu el la organizantoj.

Instruisto Deng kaj mi havis interparoladon pri la bonstato de la instruistoj. Li diris al mi, ke

la lupago de ilia loĝejo estas malalta, kiu okupas nur 5 procentojn de la tuta enspezo. La instruista sindikato invitas la instruistojn al kinejo aŭ teatro unu fojon en ĉiu monato. La Kvina Mezlernejo havas banejon kaj la instruistoj povas baniĝi senpage. La instruistoj ĝuas senpagan kuracon. Escepte de multekostaj tonikaj medikamentoj, la instruistoj ne bezonas pagi por medikamentoj, operacio kaj kuraco. En la lastaj jaroj instruistoj estis invititaj al turismo aŭ sanatoriado. Someron de 1980 instruisto Deng havis plezurajn feriadon en Beidaihe, unu el la plej bonaj somerumejoj de Ĉinio. Li diris al mi, ke dum la somerumado li bezonis pagi nur por sia manĝado.

Por ke la lernantoj estu laboremaj, lertaj kaj saĝaj en sia estonta profesio, multaj lernejoj establis malgrandan fabrikon. Ankaŭ la Kvina Mezlernejo havas sian fabriketon.

La fabriketo situas oriente de

la sportejo, en etaĝdomo, kie laboras 136 "laboristoj". Sed la fabriketo de la lernejo diferencas de la aliaj lernejaj fabrikoj en tio, ke ĝiaj "laboristoj" plejparte devenas de senlaboraj gejunuloj, kiuj malsukcesis en la ekzameno de supera lernejo. Sur la dua etaĝo de la domo estas ilmaŝinoj, per kiuj ili prilaboras aŭtopecojn por la Aŭtoindustria Kompanio. Sur la tria etaĝo estas 30 stebiloj por kudri vestaĵojn. La enspezo de la fabriketo estas uzata por pligrandigi re-produktadon, salajri laboristojn kaj premii bonajn lernantojn.

La lernejo funkciigas 3 kursojn por siaj abiturientoj kaj tiuj de aliaj najbaraj mezlernejoj. La kursoj daŭras 1 jaron kaj la kursanoj rajtas sin anonci al ekzameno de superaj lernejoj. Vicrektoro de la lernejo Xu diris al mi, ke la kursanoj estas tre diligentaj en lernado, kaj en 1980 pli ol 70 el la kursanoj trapasis la eniran ekzamenon de superaj lernejoj.

Gelernantoj en kemia eksperimentado



ZHAO YING:



Intervjuo al verkistino

Chen Rong

EN la lastaj 3-4 jaroj, leviĝis en la literaturaj rondoj de Ĉinio nombro da novaj figuroj. Aparte ĝojinda estas la vigla kreado de verkistinoj. Per siaj akraj observoj kaj delikataj priskriboj specifaj de la virino ili kreis nemalmultajn bonajn verkojn, per kiuj ili aldonis brilon al la ĉina literaturo. La aŭtoro de "En Mezaĝo" Chen Rong estas eminenta ekzemplo inter ili.

Estas popoldiro, ke "verko similas al sia aŭtoro". Kiel mi deziris vidi tiun verkistinon post tralego de ŝia verko! En iu tagmezo, mi vidis ŝin tuj post kiam ŝi ĉeestis kunsidon aranĝitan de iu ĵurnala redakcio. Bone sciante kiel valorega estas tempo por tiu verkistino, mi devis laŭeble mallongigi la tempon de la intervjuo.

Chen Rong, nun 44-jara, estas patrino de tri infanoj. Ŝia edzo estas sperta ĵurnalisto.

Ŝi ne volis multe paroli pri si mem, nek taksi siajn verkojn. Ŝi diris, ke ŝi prezentis siajn verkojn al la legantoj ke ĉi tiuj juĝu pri ilia kvalito. Koncerne al sia persono, ŝi diris, ke ŝi nek spertis idilian infanecon, nek havas enviindan lernejan karieron aŭ romantikan travivaĵon, ke ŝi estas virino ordinara, nenio pli.

Chen Rong plenkreskiĝis ĉe la bordo de Jialing-rivero en Siĉuan (Siĉuan)-provinco. Ŝia patrino estis instruistino. Chen Rong estis knabino diligenta en lernado, tamen pro familia okazaĵo ŝi devis ĉesigi sian studon, kiam ŝi pasigis nur unu jaron en mezlernejo. En sia 15-jara aĝo ŝi jam eklaboris kiel komizo en librejo, kie ŝi avide legadis. En la daŭro de tri jaroj, ŝi ne nur legis multe da modernaj kaj klasikaj literaturaĵoj ĉinaj kaj fremdlandaj, sed ankaŭ memlernis studobjektojn por mezlernejoj. En 1954 ŝi eniris la Ruslingvan Instituton de Beijing (Pekino) kiel ĝia studentino kaj post la diplomitiĝo ŝi eklaboris ĉe la Centra Popola Radiostacio kiel redaktoro kaj tradukisto. Poste ŝi estis transpostenigita al la Eduka Buroo de Beijing pro malfortiĝo de sia sano. En 1963 ŝi ofte suferis de kapturiniĝo, pro kio ŝi venis en vilaĝon de Shanxi (Ŝanĥi)-provinco kaj vivis tie ĉe iu estrino de virina taĉmento por plibonigi sian sanstaton. Tio ebligis al ŝi kontakti kamparanojn. En la sekvanta jaro ŝi revenis en Beijing kaj komencis verki kaj pentri. Ŝiaj unuaj verkoj estis teatraĵoj.

Dum la periodo 1969-1973 ŝi vivadis en vilaĝo de Tongxian-

gubernio en antaŭurbo de Beijing, kiel aliaj kadroj senditaj al bazaj unuoj en la kamparo. Ŝi vivis ĉe kamparano kaj partoprenis kune kun liaj familianoj en kamplaboroj. Tiutempe, komunumanoj ofte petis helpo de tiuj kadroj por solvi diversajn konfliktojn inter ili kaj tio prezentis bonan ŝancon al Chen Rong por koni kamparanojn.

Dum la periodo 1975-1978 ŝi verkis du romanojn.

Poste, ŝi verkis tri mallongajn romanojn unu post alia kaj inter ili "Eterna Printempo" ricevis favoran takson de veterana verkisto Mao Dun. Ŝia romano "En Mezaĝo" skuis la ĉinan literaturistaron. Ĉina veterana beletristo Bakin diris kun ĝojo: "Kiel mi deziras, ke mi povu verki romanon kia 'En Mezaĝo'." Li eĉ sendis sian filinon por viziti la malsanan Chen Rong kaj transdoni al ŝi bondeziron.

Chen Rong estas diligenta verkistino kaj en nur 5 jaroj ŝi jam skribis verkojn kun 850,000 ideografiaĵoj. Sufiĉe vastan sferon tuŝis ŝiaj temoj kaj en ŝiaj verkoj troviĝas bildoj pri kampara vivo, figuroj de kadroj kaj priskriboj pri la vivo de intelektuloj.

La mezaĝaj intelektuloj hodiaŭaj en Ĉinio estas elbakitaj post la fondiĝo de la popola respubliko. Ili estas en siaj energioplennaj jaroj kaj plejparte ludas ĉefrolojn sur diversaj laborpostenoj. Delonge Chen Rong jam sin preparis por ilin priskribi. Kial ŝi elektis kuracistinon kiel heroinon en sia "En Mezaĝo"? Ŝi klarigis al mi: "Praktikante sian arton, kuracistoj kontaktas homojn de ĉiuj soci-

tavoloj kaj pro tio la verko povas tuŝi relative vastan terenon de la socio.” Antaŭ sia verkado ŝi vivadis en Tongren-hospitalo de Beijing por akiri vivsperton. Tiu famis pro sia oftalmologia fako tra nia tuta lando. Tie ŝi konatiĝis kun multaj okulistoj. Ili ĉiuj volonte elverŝis al ŝi siajn korajn vortojn kaj la realaĵoj en la vivo devigis ŝin ilin priskribi.



Chen Rong

Respondante mian demandon pri sia kompreno el la verkado, Chen Rong diris jene: “Mi bone konas la travivaĵojn kaj vivcir-konstancojn de Lu Wenting kaj similaj, scias la pezan ŝarĝon sur iliaj ŝultroj kaj la malfacilojn en ilia vivo. Ili estas novaj homoj kulturitaj post la Liberiĝo kaj generacio kiu povas multon fari. Sur ĉiuj frontoj de nia lando troviĝas Lu-Wenting-oj, kiuj ne strebas por famiĝo sed nur oferas siajn sangon kaj energion. Sed pro diversaj kaŭzoj, ili vivas en malriĉeco kaj havas multajn neesprimeblajn malfacilojn. Mi opinias, ke ili, inkluzive de iliaj familioj, estas farantaj oferadon. Kaj tamen tia oferado estas ĝenerale neatentata aŭ ne agnoskita. Tial mi prenis Lu Wenting kiel heroinon de mia romano. Mi pensas, ke la arta figuro Lu Wenting vekis kunsenton ĉe la legantoj kaj fariĝis ilia amiko ĝuste pro tio, ke ŝi reprezentas ilin.”

la hospitalo, kie mi kolektis vivspertojn, ĝuste estis tia paro, kiu petis permeson elmigri kaj fine ricevis permeson kaj forveturis. Tiu okazaĵo sentigis al mi, de alia flanko, la urĝan solvendecon de la problemo de mezaĝuloj. Estas vere, ke ili ne devas elmigri, kaj tion ili ja ne volas. Mi opinias, ke tio estas socia fenomeno speciala en la nuna specifa historia periodo post la dek plagaj jaroj de la kultura re-

volucio de Ĉinio. Mi sentis, ke mi havas la devon ĝin prezenti el la literatura verko, por ke ĝi portu la epokan stampon.”

Mi vere ne toleris forrabi de ŝi pli da valora tempo. Je nia disiĝo ŝi diris al mi ĝojindan novajon: Lastatempe ŝi jam adaptis la romanon “En Mezaĝo” al filmo kaj iu filmstudio estis preta ĝin surekranigi. Kaj krome ŝi intencis skribi du novelojn antaŭ la fino de 1980.

KOREKTO

En la unua numero de 1981, troviĝas pluraj eraroj faritaj pro hazarda kaŭzo. Kun granda bedaŭro ni petas pardonon de aŭtoroj, precipe de s-roj Tibor Sekelj kaj G. Waringhien.

Gravaj eraroj estas jene:

1. Kelkaj paĝo-numeroj en “Enhavo” sur p. 1. estas en malordo.
2. Sur p. 13, dekstra k., la 6-a linio de malsupre, anstataŭ “en la ĉina lingvo” legu “en la japana lingvo”.
3. Oni malordigis la paĝon 16. La noto de la redakcio por “Antaŭparolo al la Kvara Eldono de la Plena Gramatiko de Esperanto” kun la titolo devas esti metita malsupre de la paĝo.

Ni ankaŭ interparolis pri disputata demando en la socio pri tiu romano, nome la elmigro de mezaĝa paro kun eminenta kuracarto. Chen Rong diris: “Mi ne pensis pri tia afero kiam mi formis la romanon en mia cerbo, tamen la reala vivo devigis min ŝanĝi mian antaŭan planon. En

CHEN RONG:

EN MEZAĜO

(Novelo)

Ilustritaj de YU QIHUI

Post kiam Lu Wenting resanigis okulon de metalografiisto, ili ekamas unu la alian.



“En Mezaĝo” estas mallonga romano el pli ol sesdek mil ideografiaĵoj. Kiam ĝi unufoje aperis en la unua numero de 1980 de la Shanghai-a literatura revuo “Rikolto”, ĝi vekis ĝeneralan atenton en la socio kaj vaste cirkulis kiel verko furora. Kiam ĝi eldoniĝis en formo de libro lastatempe, rapide elĉerpiĝis ĝiaj stokoj en la librejoj. Kial tiu romano akiris tiel grandan favoron de la legantoj? Ni opinias, ke la kaŭzo plejparte kuŝas en la sukcesa modlado de la arta figuro Lu Wenting, la heroino de la verko. Ŝi estas ordinara okulistino kun travivaĵoj similaj al tiuj de la nunaj mezaĝuloj de Ĉinio. Pro tio ŝi impresas la legantojn per tia familiareco, kvazaŭ ŝi vivus inter ili.

Lu Wenting estas kuracistino elbakita de la nova Ĉinio. Ŝi laboras konsciencie sen konsidero pri siaj pozicio kaj salajro, kvankam ŝia malalta salajro estas tiel malegala al la valora kontribuo kiun ŝi faris. Dank’ al sia diligenta klopodado, ŝi akiris eminentan kirurgian arton de okulisto kaj fariĝis unu el la ĉefaj kuracistoj de la hospitalo. Ŝi laboradas kun zorgemo kaj entuziasmo kaj havas varman koron tiel al maljuna kamparano kiel al altranga ŝtatoficisto. Ŝi pacience persvasis, kiel amema fratino, knabineton suferantan de okula malsano, ke ŝi akceptu operacion, kaj solvis ŝian timeton al operacio.

Ŝi havas harmonian familion. Kvankam ili vivis sen komforto, tamen la edzo estas plena de amzorgo al ŝi. Por ke ŝi havu pli da tempo legi fremdlandajn oftalmologiajn materialojn, li volonte prenis sur sin parton de la dommastrumado. Por ke la infanoj ne ĝenu ŝin, li pendigis pecon da plasta tuko por apartigi ŝian “vilaon” en la ĉambreto. La infanoj estas amindaj, tamen ŝi ne havis tempon por ilin prizorgi, eĉ ne kontentigi la deziron de la filineto pri plekto de malgrandaj harligoj. Tiel okupita kaj laca ŝi estas. Ŝi ofte sin riproĉas, ke ŝi ne bone plenumis la devon de edzino kaj patrino. Pro la longa penlaborado kaj malbonaj vivkondiĉoj, ŝia sano difektiĝis neeviteble kaj kadukiĝo falis sur ŝin antaŭtempe. Iun antaŭtagmezon, ŝi falis malsana post plenumo de tri sinsekvaj operacioj. Ŝi suferas de miokardia infarkto! La subita malsaniĝo de tiu okulistino, kiu ĉiam sin nomas sanulino kaj neniam konsultis doktoron, skuegas la estraron de la hospitalo kaj ŝiajn kolegojn, ĉiuj opinias, ke ŝia malsano devenis de penlaborado. Ankaŭ multaj legantoj same opinias kaj maltrankvilas pro la vivdanĝero de la respektinda kuracistino. Tiel kortuŝa estas la romano, ke multaj ĝin tralegis per unu spiro kaj kun larmoj!

La lasta ĉapitro de la romano rakontas, ke doktorino Lu finfine eldanĝerigis dank’ al urĝa helpo de la hospitalo kaj post unu kaj duona monatoj ŝi, apenaŭ resaniĝinta, akiris permeson forlasi la hospitalon, kaj tiam la legantoj longe elspiras kun malstreĉita koro. Je la fino la romano diras, ke Lu Wenting eliras el la hospitalo “renkonte al la matena suno kaj frosta vento”. En sia letero al la legantoj, la aŭtoro skribis: “Eble ŝi reiros viglanime al la operacia stablo, eble ŝi ankoraŭ renkontos malfacilojn. Kompreneble mi esperas ke ŝia vivo pleniĝos je sunbrilo, ĉar printempo jam alvenis.”

La tuta romano konsistas el 22 ĉapitroj. Ĉi-sube estas la 17-a.

— La redakcio

Neniam Lu Wenting dormis tiel longe, tiel lacigite. Ŝi sentis, kvazaŭ ŝi estus falinta de sur alta nuboj, tiel ke la tuta korpo doloris ŝin neelteneble, tute elĉerpiĝis ŝiaj fortoj. Post la subita kvieta kuŝado, ŝiaj membroj ekripozis, ankaŭ ŝia koro kvietigis kaj ŝia cerbo tute vakuiĝis.

De multaj jaroj ŝi kuradis sur la vojo de vivo kaj ne povis havi tempeton por halti kaj rigardi, kiom da kavoj kaj obstakloj troviĝas sur la trapasita vojo, eĉ por konsideri, kiom da dornoj kaj malfaciloj ankoraŭ troviĝas sur la irota vojo. Nun, formetita estas la peza ŝarĝo de sur ŝiaj ŝultroj kaj ŝi liberiĝis de ĉiaj penigaj laboroj, ŝajne ŝi jam havas sufiĉan tempon por serĉi siajn antaŭajn piedsignojn kaj esplori la irotan vojon. Sed ŝia cerbo estas vaka, sen rememoro, sen espero, ĝi enhavas nenion.

Ho, kiel terura malpleno!

Eble tio estas nur sonĝo, sonĝo en soleco. Ankaŭ en la pasinteco ŝi havis tian sonĝon, tiel solecan kaj tristan. . .

Tiutempe ŝi estis nur 5-jara knabineto. En nokto kun hurlanta norda vento, ŝia patrino eliris kaj ŝi restis sola en la domo. Jam fariĝis mallume, sed la patrino ankoraŭ ne revenis. Unuafoje en la vivo ŝi ek-sentis solecon kaj teruron. Ŝi ploradis kriante: "Panjo . . . panjo!" Poste, tiu sceno reaperadis en ŝiaj sonĝoj. La hurlanta vento, la pordo blove malfermita kaj la malforta lumo de la petrola lampo vidiĝis tiel klare, ke ŝi longe ne povis certiĝi, ĉu ŝi vere sonĝas aŭ prenas sonĝon por realaĵo.

Ne, ĉifoje ŝi ne sonĝas sed estas en realo!

Ŝi mem kuŝas sur malsanula lito kaj ŝia edzo Jiajie sidas apude por ŝin flegi. Li aspektas laca. Sin klinante al la litrando li endormiĝis. Li povus malvarmumiĝi, ŝi devas vekti lin. Ŝi provis kelkfoje, tamen ne aŭdis sian voĉon. Ŝia gorgo ŝajne

estas blokita de io, ke ŝi ne povas aŭdigi sian voĉon. Ŝi deziris etendi sian manon por altiri veston kaj lin kovri per ĝi, sed ŝi ne povis movi la manon, kvazaŭ ĝi ne apartenus al ŝi.

Ŝi ĉirkaŭrigardis kaj trovis, ke ŝi kuŝas en malsanula ĉambro por unu persono. Tia "eksterordinara favoro" ĝenerale estas donita nur al paciento en agonio. Subite ŝi terurigis: ĉu ankaŭ mi. . .

Susura aŭtuna vento frapadas la pordon kaj fenestrojn kaj profunda nokto englutas la malsanulan ĉambron. Ŝi ekŝvitis malvarme je la tuta korpo, kaj tamen klariĝis ŝia konscio. Ŝi konscias, ke ĉio antaŭ la okuloj estas reala, ŝi ne estas en sonĝo. Ŝi venas al la fino de la vivo kaj alproksimiĝas al morto.

Do tia estas la morto, ne timinda, ne dolora. Ĝi estas nur po-grada velkiĝo de la vivo, nebuliĝo de la

konscio, ĝi malsupreniĝas lante kiel folio flosanta sur akvo, ĝi drivas en la fluo kaj fine dronas en ĝi.

Ŝi sentas, ke ĉio finiĝas nesaveble. Furiozaj ondoj kovras ŝian bruston, ŝi drivas en la fluo. . .

"Panjo. . . panjo. . ."

La fluo forportas ŝin. Malklariĝas la mieno de ŝia filineto Jiajia, kaj ŝia raŭka vokado fariĝas kompartinda plorsingultado:

"Panjo. . . mi volas harligojn. . ."

Kial ne fari harligojn al ŝi? Nur ses jarojn ŝi estis en la mondo kaj ŝia deziro en la vivo estas nur ek-havi du harligojn malgrandajn. Kian envion ŝi sentis ĉiufoje kiam ŝi vidis knabineton kun harligetoj ornamitaj per silkubandaj papilioj! Sed eĉ tiun malgrandan deziron de la infano ŝi ne povis plenumi. Ŝi ne havis tempon, ĉar en mateno de la lundoj la hospitalon vizitis plej



La edzo pendigis pecon da plasta tuko por apartigi ŝian "vilaon" en la ĉambreto, por ke ŝi havu pli da tempo por legi fremdlandajn oftalmologiajn materialojn.

granda nombro da pacientoj, kaj ĉiu minuto estis kara por ŝi.

“Panjo. . . panjo. . .”

Ŝi aŭdis, ke ŝia fileto Yuanyuan ŝin vokas, kaj vidis ke li alkuras laŭ la bordo de la rivero. Ŝi returnis la kapon kaj kriis etendante al li la brakojn: “Yuanyuan. . . Yuanyuan. . .”

Unu ondo premis ŝin malsupren. Ŝi pene elakvigis sin, sed Yuanyuan jam malaperis, nur aŭdigis lia voĉo de malproksime:

“Panjo. . . ne forgesu. . . blankajn gum-ŝuojn. . .”

Diversaj gum-ŝuoj turniĝas antaŭ ŝi kvazaŭ en kalejdoskopoj: blankaj, bluaj, altflankaj, malaltflankaj, blankaj kun ruĝa bordero, blankaj kun blua bordero. Elektu paron por Yuanyuan, ĉar tiuj sur liaj piedoj delonge estas difektitaj. Havigu al li paron da blankaj gum-ŝuoj, kaj li ĝojos dum tuta monato. Sed ĉiuj gum-ŝuoj malaperis je palpebrumo. Alflugis prezo-etiketoj: 3.1 juanoj, 4.5 juanoj, 6.3 juanoj. . .

Jiajie alkuras. En la akvo speguliĝas lia inversa figuro kureganta. Li kuras kun tia impeto kaj lia voĉo tremas:

“Wenting, vi ne povas foriri. . .”

Kiel forte ŝi deziras halti por ke li atingu ŝin kaj ŝin helpu per sia mano. Sed la torento kruela ŝin forportas plue!

“Doktorino Lu! Doktorino Lu!”

Kiel multe da homoj ŝin vokas sur ambaŭ bordoj! Yafen, maljuna Liu, hospitalestro Zhao, ĉefkuracisto Sun en blankaj kiteloj, Jiao Chengsi, maljunulo Zhang kaj Wang Xiaoman kaj multaj aliaj konataj kaj nekonataj pacientoj en malsanulaj vestoj, ĉiuj krias, kriadas.

Ĉu ili vokas min? Mi ne devas foriri, ja ne devas foriri! En tiu ĉi mondo mi havas ankoraŭ multajn aferojn nefinitajn, ankoraŭ multajn devojn neplenumitajn. Mi ne devas lasi Yuanyuan kaj Jiajia fariĝi sen-

patrinaj orfoj. Mi ne devas perdigi al Jiajie la edzinon en lia mezaĝo. Mi ne povas forlasi mian hospitalon, miajn pacientojn. Mi ja ne povas adiaŭi, adiaŭi tiun ĉi turmentan kaj nerezigneblan vivon!

Mi ne povas droni en la fluo de morto. Mi baraktos, rezistos, mi volas resti en la mondo. Sed, kial mi estas tiel laca? Mi ne havas forton por rezisti, barakti, nun mi malsupreniĝas, malsupreniĝas. . .

Ho! Adiaŭ, Yuanyuan! Adiaŭ, Jiajia! Ĉu vi iam rememoros panjon? En la lasta momento de la vivo, panjo foriras kun profunda sopiro al vi. Kiel mi sopiras vin! Mi ĉirkaŭprenu vin kaj diru al vi: Miaj infanoj! Pardonu panjon, ke mi amis vin tro malmulte, pardonu panjon, ke mi devis foje kaj refoje retiri miajn brakojn etenditajn al vi, forpuŝi de mi viajn alŝovitajn ride-tantajn vizaĝetojn kaj devigi vin forlasi en via infaneco la sinon de la patrino.

Lu Wenting vekigigas de sveno, kaj ŝia edzo flegas ŝin kaj mallaŭte deklamas por ŝi ampoemon de Sandor Petofi ŝatatan de ili ambaŭ.



Adiaŭ, Jiajie! Ĉion vi oferis por mi kaj mia vivo eĉ unu paŝon ne povus fari sen via helpo. Sen vi mia vivo en tiu ĉi mondo fariĝus seka. Ho, kiom grandan oferon vi faris por mi! Se vi permesus min penti, mi genuiĝus antaŭ vi por peti vian pardonon, ke mi ne povis rekompenci vian plej senmankan amzorgon al mi, ke tiel malmulte mi zorgis pri vi, tiel malmulte mi donis al vi. Multfoje mi pensis, ke tuj en tempeto de mia neokupiteco mi klopodos por iom pli multe plenumi mian devon de edzino, mi revenos hejmen akurate je finiĝo de mia deĵoro, por ke vi ricevu pretan vespermanĝon. Mi cedos al vi la tritirkestan skribotablon, por ke vi havu eblecon fini vian disertaĵon. Sed bedaŭrinde, estas tro malfrue, mi jam ne plu havas tempon.

Adiaŭ, pacientoj ĉe la kliniko! Adiaŭ, pacientoj en la hospitalo! Dum la 18 jaroj pasintaj, al vi apar-



La Yunnan-a Pekin-opera Trupo en Eŭropo

de SONG CHENGJIU*

ANTAŬ nelonge, revenis la grupo por ludado de la dramo "Tetrinkejo" de la Popola Arta Teatro de Beijing (Pekino) post sia turneo en Eŭropo kaj transdonis al mi salutojn kaj bondezirojn de miaj amikoj, kiuj akceptis la Yunnan-an Pekin-operan Trupon dum ĝia turneo. Tio rememorigis min pri miaj travivaĵoj dum mia vizitado kun la trupo al Francio, Italio, Aŭstrio, Svisio kaj Lihtenŝtejno.

EN LIONO

Estis bela vespero. Humida zefiro el Mediteraneo blovdadis al la urbo Liono ĵus eklumigita de sen-nombraj lampoj. Vervis muziko en la aŭditorio Maurice Ravel. Tio estis koncerto speciale aranĝita de la Liona Filharmonio por la Yunnan-a Pekin-opera Trupo. Oni ludis verkojn de Betoveno k.a. famaj komponistoj sub direktado de la juna Sylvain Cambreling. La eminenta arto de la muzikistoj estis multe laŭdata de la ĉinaj gastoj.

Post la koncerto, la lionaj muzikistoj nin regalis en la hotelo Frantel, unu el la plej belaj hoteloj en tiu urbo. Ili diris, ke ili estis varme akceptataj de la ĉina popolo, kiam ilia filharmonio vizitis Beijing en 1979, kaj hodiaŭ ili akceptas siajn ĉinajn kolegojn same kun tia kora



Je la 23-a de aprilo 1980, franca ĉefministro Barre (la tria de maldekstre en la dua vico), ĉina ambasadoro en Francio Yao Guang kaj iliaj edzinoj inter la geaktoroj

sento. La direktoro de la Liona Filharmonio s-ro Serge Baudo diris sian impreson pri la vizito al Ĉinio kaj esprimis la koran senton de la muzikistoj de tiu filharmonio por la ĉina popolo kaj sian esperon refoje viziti Ĉinion kaj daŭrigi sian kontakton kun ĉinaj muzikistoj.

Liono troviĝas ĉe la okcidenta fino de la antikva Silka Vojo kaj skribis siajn legindajn paĝojn en la historio de la ĉina-franca amikeco. La prezentado de la Yunnan-a Pekin-opera Trupo en Liono, same kiel ĝia unua prezentado en Parizo, ricevis varmajn laŭdojn de la spektantoj: "La ĉina pekin-opera trupo konkeris Lionon per sia unika ĉarmo." Sendube la vizito de la trupo al tiu urbo skribis novan

paĝon en la historio de la ĉina-franca amikeco.

MARCELLA

La Yunnan-a Pekin-opera Trupo ludis sesfoje en la Roma Operejo. Por garantii la sukceson de la prezentado, la amikoj de tiu operejo donis varman helpon en aranĝo de la scenejo, lumigiloj kaj rekvizitoj.

Nin aparte kortuŝis la amikeco de ŝminkistino Marcella, kiu volontemte preparis por ni boligitan akvon ĉiufoje je nia prezentado por kontentigi nian kutimon de trinkado. Foje ni veturis al loko je dekoj da kilometroj for de Romo, ŝi ankaŭ volontemte iris kun ni por fari tion.

Si estis en aparte bona interrilato kun nia aktorino Guan Shuang kaj lasis sin esti fotita kune

tenis la plej grava parto de mia vivo. Dum mi iris, promenis, sidis aŭ kuŝis, ĉiam en mia cerbo moviĝadis vi, viaj okuloj! Vi ne scias, kiel

grandan konsolon kaj ĝojon vi donis al mi, kuracistino, per ĉiu el viaj resanigitaj okuloj. Sed bedaŭrinde, tian ĝojon mi neniam plu havos!

Adiaŭ, miaj karuloj! Adiaŭ, mia hospitalo! Adiaŭ, miaj pacientoj! Mi ja ne volontas forlasi vin. . .
Mi. . .

kun ŝi por memoro. Ŝi diris, ke ŝi vidis multajn famajn aktorojn, tamen tre malmultaj el ili estas tiel sinceraj, honestaj kaj egalulecaj kiel la ĉinaj artistoj. Ĉe nia adiaŭo al Romo, ŝi kun larmoj akompanis nin ĝis la atendejo. Ŝi diris: "Tiel bonaj vi estas. Mi vin sopiregos post via foriro."

BANKEDO EN VINKELO

En la tago antaŭ nia foriro, la mastro de la roma hotelo Massimo, en kiu loĝis la Yunnan-a Pekin-opera Trupo, donis originalan bankedon en sia vinkelo por esprimi sian amikecon al la forveturontaj ĉinaj gastoj. Por nin regali, li elprenis vinon, kiun oni konservadis de la tempo de lia avo. Aŭskultante napolajn popolkantojn kaj gustumante nektarojn kun aromo de antikva Romo antaŭ riĉa stoko de bonegaj vinoj konservataj en la kelo, ni interparolis pri arta interfluo inter la ĉina kaj itala popoloj. La kantado, ridoj, tintado de glaso kaj ĝojkrioj "Beijing — Romo!" "Romo — Beijing!" formis grandiozan simfonion, kiu flugis el la kelo en la aeron de Romo.

ĈINSTILA TEATRO

"Kian sorĉan forton la pekin-opera arto havas, tion oni ankoraŭ ne povas bone taksi nun. Kion ni neniam povis fari, ĉinaj majstroj-artistoj tamen jam sukcesis fari per magiista sorĉo." Tio estis la opinio de la aŭstria "Laborista Gazeto" pri la prezentado de la Yunnan-a Pekin-opera Trupo. Verdire, la

sukcesa prezentado de nia pekin-opera trupo en Vieno estis en certa grado nedisigebla de la aparta aranĝo de la Viena Urbo-halo.

Por ke la pekin-opera trupo povu ludi siajn programerojn laŭ la ĉina tradicia maniero, la administranto de la halo speciale konstruigis ĉinstilan teatron sur la placo ĉe la Kultura kaj Sporta Domo. En mallongaj du tagoj, la laboristoj jam finkonstruis sufiĉe imponan pekin-operan scenejon kaj ŝtuparojn kun dumil sidlokoj por spektatoroj. La ĉinaj aktoroj laŭdegis la amikojn de la Viena Urbo-halo pro ilia klopodo kaj ilin dankis pro la kreita oportuna kondiĉo por prezentado.

KONCERTO EN LA HEJMO DE PROFESORO

Fama aŭstria muzika profesoro Huebner, kiu foje vizitis Ĉinion kun la Viena Filharmonio sub sia gvido, gastigis nin en sia hejmo. La profesoro parolis kun entuziasmo pri la sukcesa prezentado de la ĉina muzikista grupo dum sia vizito al Vieno en la unua duono de la pasinta jaro, precipe pri sia profunda impresado pri ĉina bivisto Liu Dehai. La edzino de la profesoro propramane faris por ni aŭstriaajn pladojn. Krome, ŝi ankaŭ prezentis al ni dolĉan frandaĵon dirante, ke ĝi estas Shanghai-a frandaĵo, pri kies preparado ŝin instruis Liu Dehai, kaj ŝi petis ke ni juĝu ĉu ĝi gustas kiel ĉina frandaĵo.

Estis meznokto. Amikoj kaj studentoj de la profesoro venis al

lia domo post sia prezentado en la operejo. Inter ili troviĝis flutistoj, violonistoj kaj kantistoj. Ili ludis por ni verkojn de Mozarto kaj aliaj famaj komponistoj. En la kvietaj nokto de la muzika lando, tiu hejma koncerto plena je amikeco ebrigis min kaj la aliajn ĉeestantojn. Kiam ni revenis al nia hotelo sub la brilaj steloj, la varma regalo kaj la belaj melodioj de la majstroj de la aŭstria klasika muziko tenis nin tre longe en ekscitiĝo.

SINAMUZO DUM TAGMANĜO EN LUCERNO

Post nia unua prezentado en Zuriko, nia trupo haltis ĉe Lucerno por tagmanĝo survoje al Berno.

Ni eniris drinkejon homplenan, sur kies podio ĝuste prezentiĝis programero. Por bonvenigi la ĉinajn gastojn, oni speciale elprenis alpan kornon kun longeco de tri metroj. Tiu instrumento kun bela tembro simila al tiu de ĉina nacimallimplimulta instrumento *bau* sonis aparte intima por ni. Iu aktorino sur la podio proponis, ke diversnaciaj gastoj ascendu la podion por kanti kun ŝi svisan popolkanton. Ŝi unue invitis du ĉinajn junajn geaktorojn, poste hispanan, meksikian, usonan, anglan kaj francan, fine ankaŭ iun ĉinon el Taiwan. La verva kunkanto trasonoris la tutan drinkejon, kiu tuj transformiĝis en malgrandan internacian amuzejon. Diverslandaj amikoj arope mansalutis la ĉinajn gastojn, jen kaj jen kriante "amikeco", "pekin-opero", "Pekino", "Ĉinio".

Aktorino Guan Sushuang (la tria de maldekstre) de la Yunnan-a Pekin-opera Trupo kaj geamikoj de la francaj artaj rondoj



Guan Sushuang kaj fama aktorino B. P. Sarata de la Ŝtata Opera Teatro de Aŭstrio



SLOSILARO

Post la prezentado en Genevo, ni denove veturis al Zuriko. Apenaŭ ni enloĝiĝis en la hotelo Atlantis, aŭto haltis ĉe la pordo post trihora galopado el Genevo kaj tri svisoj elaŭtiĝis kaj urĝe demandis pri la numeroj de la ĉambroj loĝataj de la ĉinaj gastoj. Ni ankoraŭ ne rimarkis, ke ni perdis la ŝlosilaron por la kestoj por ŝminkajoj, rekvizitoj kaj kostumoj dum nia prezentado lastvespere en la teatro Casino en Genevo, kaj konstatinte ke la ŝlosiloj apartenas al nia trupo, la administrantoj de la teatro tuj sendis al ni la tri personojn kun la perdaĵo. Tio profunde kortuŝis nin, ĉar oni sendis al ni ne nur ŝlosilaron sed ankaŭ sinceran amikecon de la svisa popolo por la ĉina.

“INTERLIGITAJ ESTAS NIAJ AMIKAJ KORJOJ!”

En la plej bela teatro Vaduz en la ĉefurbo de Lihtenŝtejno ĉirkaŭita de la Alpoj, la Yunnan-a Pekin-opera Trupo faris prezentadon. Ĉiuj 800 biletoj por la sidlokoj de la teatro estis jam forvenditaj tre rapide, kaj oni devis aldoni 100 kromajn sidlokojn por rigardantoj. En la vespero de la prezentado, la parko antaŭ la teatro kaj eĉ la ĉirkaŭaj stratoj estis plenigitaj de aŭtoj. Tia fenomeno neniam antaŭe okazis al Vaduz.

Dum la prezentado aklamadis la spektatoroj. Kiam finiĝis la ludo, la aktoroj plurfoje venis sur la scenon por danki la aplaudantojn kaj la spektatoroj forlasis la teatron nur post refoja ludo de la enakva batalado en la pekina opero “Yandang-monto”, kiu levis la entuziasmon de la rigardantoj al la kulmino. Iu Lihtenŝtejna amiko diris: “Neniam antaŭe mi rigardis ĉinan teatron arton kaj la pekino-opera trupo donis al mi la unuan ŝancon. Kvankam la Alpoj estas fore de Kunlun-montaro, tamen interligitaj estas niaj amikaj korjoj!”

* La aŭtoro estis vicestro de la Yunnan-a Pekin-opera Trupo de Ĉinio dum ĝia turneo en Eŭropo.

Sporto

KONKURSO DE JUDO INTER ĈINIO KAJ JAPANIO

En la unua tagdeko de novembro de 1980 okazis en Beijing konkurso inter la Japana Studenta Ĵuda Teamo kaj la Ĉina Ĵuda Teamo. En la konkurso de ok grupoj en ses pezkategorioj, 6 japanaj judistoj venkis en kvar pezkategorioj kaj 2 ĉinaj judistoj venkis en du pezkategorioj. Post la dua matĉo la japana teamo laŭdis, ke la Ĉina Ĵuda Teamo deveninta de lukta teamo travivis nur kvin monatojn tamen progresis rapide.

LA ĈINA PLONĜA TEAMO GAJNIS LA ĈAMPIONECON

En la Martinia Internacia Plonĝa Konkurso okazinta en Londono en la tria tagdeko de novembro de 1980, ĉinaj geplonĝistoj Chen Xiaoxia, Li Kongzheng kaj Shi Meiqin gajnis po unu ĉampionecon kaj Li Honglin subĉampionecon en la konkurso de viraj kaj virinaj turoplonĝo kaj trampiloplonĝo, kaj per iliaj totalaj poentoj Ĉinio gajnis la teaman ĉampionecon. En la konkurso partoprenis sep landoj, el kiuj Usono gajnis la duan lokon kaj Sovetunio la trian.

LA USONA ARTOSKETA TEAMO EN ĈINIO

La 12-an kaj la 13-an de novembro 1980, la 11-membra Usona

Artosketa Teamo kaj la Ĉina Artosketa Teamo kune faris du prezentadojn en Beijing (Pekino) kaj ricevis grandan aplaudadon de dekoj da miloj da spektantoj.


Duopan artosketadon prezentis Tai Babilonia kaj Randy Jardner, gajnintoj de la ĉampionecon en du tut-usonaj konkursoj de para artosketado kaj la ĉampionecon en la monda ĉampionecon konkurso de 1980. Ili kiel mevoj libere kaj gracie glitis en harmoniaj kunagoj.

Por montri sian amikecon por la ĉina popolo, Peggy Flening, sketostelulino delonge konata de la ĉinaj spektantoj pere de televido, prezentis sketadon per movoj de papilio, sub la fama ĉina melodio “Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai”, kaj rikoltis laŭdon de la ĉinaj rigardantoj.

LA 23-A SKANDINAVA INTERNACIA ĈAMPIONECA KONKURSO DE TABLOTENISO

La nomita konkurso okazis en Karlskrona, Svedio, en novembro de 1980. Ĉinio gajnis la viran kaj virinan teamajn ĉampionecon, kaj Francio — la viran teaman subĉampionecon. En la individua konkurso la 19-jara sveda tablotenisisto Ulf Carlsson venkis ĉinan tablotenisiston Guo Yaohua per 3:2 kaj tiel gajnis la ĉampionecon en la vira solludo, kaj Guo — la subĉampionecon en la sama ludo. Ĉinaj tablotenisistinoj Cao Yanhua kaj Zhang Deying gajnis respektive la ĉampionecon kaj la subĉampionecon en la virina solludo.

Duopa artosketado de Tai Babilonia kaj Randy Jardner






Vizito al la ruino de Ĝardeno Yuanmingyuan

LA okcidenta antaŭurbo de Beijing (Pekino) estas pitoreskejo, kie staras kontinuaj montoj kaj ŝprucas klaraj fontoj. La regantoj de diversaj dinastioj siatempe konstruigis por si multe da distraj ĝardenoj kaj kromaj palacoj, el kiuj Yuanmingyuan estis la plej grandioza.

Sed kia katastrofo trafis ĝin antaŭ 120 jaroj!

La 17-an de oktobro de 1860, matene, en la nordokcidenta antaŭurbo de Beijing leviĝis densaj fumkolonoj unu post alia. Ili kreskadis kaj rapide formis vastan amason da nigraj nuboj, kovrantaj la tutan urbon. La suno perdis sian brilon kaj la tago mallumiĝis kiel en krepusko. Jen kion kaŭzis la bruligo de ĝardeno Yuanmingyuan far la brita-franca alianca armeo en la Dua Opia Milito. Falis tiu senprecedence pompa palaco konstruita dum pli ol 150 jaroj, enkorpiganta kaj ĉinajn kaj eksterlandajn arkitek-

La ruino de la ĝardeno Yuanmingyuan



turajn artojn kaj kolektanta en si rarajn artaĵojn antikvajn kaj modernajn. Ĝi estis tute ruinigita en la incendio.

En iu oktobra tago de 1980, t.e. ĉirkaŭ la 120-a datreveno de la forbruligo de Yuanmingyuan, mi vizitis la ruinon de tiu imperiestra ĝardeno.

Yuanmingyuan konsistis el tri ĝardenoj: Yuanmingyuan, Wanchunyuan kaj Changchunyuan. Kun perimetro de 10 kilometroj, ĝi okupis 325 hektarojn da tero kaj havis 150,000 kvadratajn metrojn da konstruaĵoj. En ĝi kolektiĝis entute pli ol cent vidindejoj. La konstruado de la ĝardeno komenciĝis de 1709 kaj daŭris 150 jarojn, kaj en tiu periodo regis sinsekve kvin imperiestroj. Krom palacoj, loĝdomoj kaj aliaj ĝardenaj konstruaĵoj, tie estis ankaŭ temploj budaista, taoista kaj imperiestro-familia, arkpafejo, scenejo, biblioteko, muzeo, kajo, varfo, strato kun butikoj kaj vilaĝaj kabanoj.


Tiuj konstruaĵoj aŭ sin apogis sur monteto, aŭ bordis akvejon; iuj estis imitaĵoj de la famaj pejzaĝoj en suda Ĉinio, kaj aliaj formiĝis laŭ ideoj el poemoj aŭ pentraĵoj de la antaŭuloj. Bone aranĝitaj en la natura spaco kaj ornamitaj de arboj kaj floroj, ili formis grandiozan ĝardenon kun belaj pejzaĝoj kaj variaj stiloj: En la ĝardeno rete interkruĉiĝis fluoj kaj sur ili sidis diversformaj pontoj. Iu franca turista skribis: “Ŝajne estis nekredeble, ke nur por unu palacdomo jam estis konsumitaj pli ol kvar milionoj da frankoj, sed en Yuan-

mingyuan ekzistas pli ol 200 tiaj domoj.” Oni diris, ke la ĉina Yuanmingyuan kaj la franca Versailles estas du mirakloj en la monda ĝardenistiko.

Mi atingis iun monteton kaj vidis kelke da grandaj kolonoj el blanka marmoro kun bele ĉizitaj romostilaj desegnoj, malorde starantaj apud la ŝtona arkpordo. Kontraŭ la monto sin trovas kvin ŝtonaj ekranegoj kun delikataj desegnoj. Multaj turistoj ŝatas fotiĝi kaj pentri tie. Antaŭe tie staris pompa konstruaĵo “Okcidenta Domego”, projektita de italo J. Casliglione kaj franco P. Michel Benoit kaj finkonstruita en 1759. Tiu domaro estis konstruo de eŭropa stilo, masonita el blankaj ŝtonoj kun delikataj skulptaĵoj. Tie estis multe da ŝprucigiloj, i.a. oni vidis ke la bestoj luktas, ĉashundoj persekutas cervon, horloĝo ŝprucigas delikatajn akve-rojn ktp. Tamen nun videblas nur iliaj fragmentoj.

Trairinte kvietan padon, mi venis al la loko aranĝita antaŭe laŭ pejzaĝo de la Okcidenta Lago en Hangzhou (Hangĝoŭ). Nun restas nur rondaj bazoŝtonoj. Sude de ĝi estas vasta malaltaĵo, kie en la pasinteco estis la “Feliĉa Maro”, la plej granda lago en la ĝardeno. Ĝi situis en la centro de la ĝardeno. En la lago iam ekzistis tri insuletoj kaj sur la centra staris palacdomo “Pengdao Yaotai”. Laŭ antikva ĉina legendo, Pengdao kaj Yaotai estis loĝejoj de feoj.

Okcidente de monteto vidiĝas alta rektangula fundamento de palaco, kun postrestinta murego ambaŭflanke, tio estis urbo Sravasti, kion



La origina
Eŭropa Palaco

oni oferis al Budho. Ĝi estis konstruita imite al la samnoma urbo de Hindio, priskribita en sutro. Sude de la urbo etendiĝis larĝa vojo, t.e. fama "Komerca Strato" siatempe. Tie estis strato kun bazaro, butikoj kaj aliaj publikejoj. Ĉiufoje kiam imperiestro alvenis por promenadi kaj sin amuzi, kortegaj eŭnukoj devis sin alivesti kaj ludi rolojn de soldatoj, juĝistoj, poŝtistoj, metiistoj kaj eĉ ŝtelistoj. Tie svarmis homoj irantaj tien kaj reen, interpuŝiĝantaj unu kun alia, kaj senĉese aŭdiĝis krioj de kolportistoj kaj bruo de homamasoj ĉirkaŭ akrobatoj aŭ ĉe historio-rakontistoj. En ĉio ĉi tio prezentiĝis bildoj de homplena bazaro kaj popola vivo. Kiam alvenis la imperiestro, sekvate de korteganoj, li nepre trabutikis kaj aĉetis multe da varoj kaj poste disdonacis ilin al siaj edzino, kromedzinoj kaj sekvantoj.

Ion pli okcidente mi trovis artefaritan monteton el groteskaj ŝtonegoj. Tie estis la sidloko de la imperiestra biblioteko "Wenyuange",



La ruino de la Eŭropa Palaco

en kiu iam estis konservita la plej granda libroserio de Ĉinio — *Si Ku Quan Shu*. Bedaŭrinde ankaŭ tiu ĉi valora biblioteko ne eskapis el la incendio kaj rabado.

Suden paŝinte tra herbejo, mi ascendis malgrandan altajon. Okcidenten rigardante mi rimarkis, ke en malaltaĵo kuŝas dombazo en svastika formo. Tie origine izole staris en la lago stranga domaro, en kiu estis varme en vintro kaj malvarmete en somero, pro kio ĝi fariĝis tre ŝatata loĝejo de imperiestroj.

Paŝinte suden tra sovaĝaj herboj, mi venis al loko de la pordego de Yuanmingyuan. Tie nun estas videblaj nur rizkampoj, kaj ĝiaj aliaj restaĵoj jam ne troveblaj.

Kia bedaŭro estas, ke tiom belega ĝardeno estis komplete detruita! Lastatempe iuj ĉinaj famuloj proponis restaŭri Yuanmingyuan, por ke ĝi fariĝu nova turisma regiono en la okcidenta antaŭurbo de Beijing. Tiu propono jam estis alte taksita kaj varme aprobita de diversaj sociaj rondoj.



SERPENTAĴO-PLADO

Ĉinoj diras: “Oni preferas frandi en Guangzhou.” En la menuo de tiu urbo troviĝas multaj frandaĵoj, inter kiuj estas serpentaĵo-plado kun aparta loka gusto.

La Guangdong-anoj ne nur havas longan historion de ĝia farado, sed ankaŭ posedas plej altan gastronomion tiurilate. En restoracioj de la urbo oni ĝuas tiun frandaĵon kiel altklasan pladon, kaj ĝiaj preparaj metodoj estas malsamaj. Sur la strato Jianglan en la urbo staras la plej renoma restoracio “Serpentaĵo” kun pli ol 400 sidlokoj. Ĉiutage

La plado “Krizantemo - Drako - Tigro”

ĝi akceptas multajn klientojn inkluzive de diverslandaj gastoj, el kiuj plejparto estas okcident-eŭropanoj kaj japanoj.

La plado “Krizantemo-Drako-Tigro-Fenikso” estas la plej fama el la serpentaĵoj. Ĝi estas preparita el viandoj de serpento, mont-kato (*Felis bengalensis*) kaj koko, kun aldono de vintra fungo, orelfungo kaj zingibro. Kiam surtabliĝas tiu

serpentaĵo kun surmetitaj petaloj de krizantemoj, oni povas ĝui ĝian apartan guston.

La Guangzhou-anoj havas jenan proverbon: “Aŭtuno venas, serpentoj grasiĝas.” Vintro estas taŭga sezono por manĝi serpentaĵon, ĉar antaŭ vintrado la serpentoj estas tre grasaj kaj tonikaj. Tial la serpentaĵo-restoracioj havas sian prosperon ekde aŭtuno.

Serpentajaj pladoj de la Guangzhou-a Restoracio estas multe laŭdataj de ĉinaj kaj fremdlandaj klientoj.



Nigra kokino (Papertondaĵo)

de JIANG SHUPU kaj WANG BIN



1



2



3



Rikolto de lotussemoj

Honghu-lago de Hubei-provinco en la centra parto de nia lando estas fama liveranto de lotussemoj kun longa historio.

Lotussemoj de Honghu-lago

Lotuso estas plurjara herbeca plantaĵo, kiu adaptiĝas al varmeta kaj malseka klimato kaj havas fortan vivipovon kreskante en malprofunda akvo. La lago produktas lotussemojn de tri specioj: La semo de ruĝa lotuso, sovaĝa specio, estas en formo de ovalo; tiu de blanka lotuso kulturata estas ronda kaj bongusta; kaj tiu de blank-kukurba lotuso hibridigita per la ruĝa kaj blanka lotusoj kaj simila al blanka kukurbo estas pli granda ol tiu de la

ruĝa kaj pli longa ol tiu de la blanka. En tiuj tri specioj, la blanka lotuso havas plej altan ekonomian valoron.

La semoj kuiritaj kun sukero estas bongustaj kaj nutraj. Ili estas bona tonikaĵo, ĉar ili enhavas amelon, proteinojn, grason kaj plurajn vitaminojn. Ili servas ne nur kiel plado, sed ankaŭ kiel medikamento. La ladmanĝo el la semoj de blanka lotuso ĝuas grandan debiton en internacia merkato.

Jinhua-ŝinko


Jinhua-ŝinko portas la nomon pro tio, ke ĝia produktaĵo troviĝas en la urbo Jinhua, Zhejiang-provinco. Ĝi estas fama speciala produktaĵo de Ĉinio kaj kalkulata kiel unu el la altklasaj viandaĵoj. Ĝia produktado komenciĝis en Song-dinastio (960-1279 p.K.).

La bongusta ŝinko estas taŭga por ĉiu sezono. Estas multaj metodoj por ĝin kuirati. La plej bona metodo estas vaporumi aŭ stufi. Tia kuirarito ebligas al la plado konservi sian

originalan guston. Oni povas vaporumi ŝinkon en granda peco kune kun kokajo aŭ porkhufoj en argila vazo. Oni povas ankaŭ meti ŝinkopecojn kaj spicaĵojn sur diversajn fiŝojn kaj poste ilin vaporumi. Tia preparado estas bongusta kaj delikata. La plej simpla metodo estas

unue kuirati aŭ vaporumi ŝinkon kaj je malvarmiĝo tranĉi ĝin en maldikajn pecojn.

Historia literaturaĵo notas: Jinhua-ŝinko servas por sanigi renon kaj stomakon, kreskigi korpolikvon, vekti apetiton, fortigi talion, medolon kaj piedon kaj resanigi vundon.



Sunumado de ŝinkoj



4



5



6



El leteroj de legantoj

Paroli pri bonegaj trajtoj el la revuo nur per malmultaj vortoj, mi opinias, estas tute ne juste; vere tra la tuta mondo oni konas ĝin kaj ĝi certe ĝojigas ĉiujn. Eĉ en la plej malproksimaj lokoj kaj precipe ĉe la Tria Mondo, kie oni havas multajn malfacilaĵojn por akiri librojn aŭ aliajn legaĵojn (multekostajn), mi estas certa, ke oni preferas EPĈ-n, ĉar (almenaŭ antaŭ nelonge) ĝi estis la plej malmultekosta, tamen feliĉe neniu povus nei evidentan pliboniĝon, kiun ni esperas sekvi ĉiufoje plu.

VIVIANA SANTILLAN MEDIANERO, Peruo

Pri via revuo, en ĝia nuna stato, mi povas certe aserti, ke ĝi estas unu el la plej bonaj en la mondo kaj povas honore situi apud la revuo de UEA, ĉiu el la du revuoj havanta nature sian propran stilon kaj redaktmanieron. Kaj tio estas bona, ĉar unuformeco, nevarieco povas tedi la legantojn. Mi konstatis, ke vi obeis ankaŭ la konsilojn kaj la sugestojn de tiuj legantoj, kiuj petis, ke la revuo spegulu pli detale la interesiĝon pri E-o en via

lando. Kaj vi bone faris ankaŭ tion, sed ne troigante, do vi faris tion gardante iun sanan ekvilibron inter la priesperantaj temoj kaj la temoj peresperantaj, ĉar E-o ja estas farita ne por ke oni tro parolu pri ĝi kaj pri la esperantistoj, sed ĉefe por ke oni parolu per ĝi al ĉiaj ajn homoj.

CONSTANTIN DOMINTE, Rumanio

Al ni, kiuj alte taksas la multajn kontribuojn de via antikva lando, ĝi estas vera fonto de informo kaj plezuro. Ĝiaj tekstoj, per facile komprenebla lingvaĵo, instruas nin pri la longa kaj varia historio, la nuntempaj streboj, kaj la estontaj celoj de la lando kies juneco okazis multajn jarcentojn antaŭ la naskiĝo de la okcidenta kulturo. Plue, "El Popola Ĉinio" alportas al siaj legantoj per fotografaĵoj atente kaj sperte faritaj multajn ravajn vidindaĵojn kontraste al tiuj en aliaj landoj. Ni vidas belajn ĉinajn virinojn, elegantajn dancistojn, viglajn infanojn, dignajn maljunulojn, kaj tiun majestan pejzaĝon, kiu rememorigas al ni majstrajn verkojn de antaŭlonge forpasintaj pentristoj.

Ĉiujn, kiuj kunlaboras por verki, eldoni kaj akurate sendi ĉi tiun altgradan gazeton, mi volas sincere gratuli kaj danki. Vi faras multon por la Esperanta movado, via lando kaj tutmondaj amikaj interrilatoj.

H. CLAPHAM, Anglio

Generale, mi amas "El Popola Ĉinio", mi ĝojas kun ĝia legado kaj mi atendas ĝin ĉiumonate kiel leteron de amiko.

Sed ĉefe, mi ŝatas tri tipojn de artikoloj:

1. Tiuj kiuj temas pri Esperanto, kiel "30 Jarojn Kune kun EPĈ", "Espero de Ĉina Erudiciulo", "Kial kaj Kiel Mi Amas Esperanton", ktp.

2. Tiuj kiuj diskonigas la ĉinan literaturon, kiel "Pri Romano de Ba Jin", "Kelkaj Vortoj pri la Ĉina Klasika Poezio", "Lerta", ktp.

3. Tiuj kiuj parolas pri la ĉiutaga vivo de la popolo, kiel "La Ĉina Sistema de Pledado Vidita en Unu Proceso", "Ili Hieraŭ kaj Hodiaŭ", "Juna Generacio en Progreso", ktp.

Pri la grafika fako mi opinias ke la kovriloj, dorskovriloj kaj koloraj bildserioj devas sin dediĉi al mirindaĵoj el Ĉinio kaj la nigra-blankaj bildserioj al subitfotoj de la ĉiutaga popola vivo. "Mateno de Guangzhou" kaj "Ekskurso al Badaling" estas bonaj ekzemploj.

PASKAL PONT, Hispanio

La stilo de la revuo ĉiam pliboniĝas, do laŭ mi daŭrigu laŭ sama stilo.

Mi opinias, ke vi estas multe pli sinceraj ol antaŭaj kelkaj faroj, vi ne timas priskribi malfacilaĵojn de via ekonomia disvolviĝo.

GOSSET ROGER, Belgio



FOSILIA KRANIO DE SIMIHOMO TROVITA EN ANHUI-PROVINCO

Ĉinaj antropologoj trovis, dum fosado en kaverno de Hexian-gubernio de Anhui-provinco en oktobro kaj novembro de la pasinta jaro, unu bone konserviĝintan fosilian kranion de simihomo antaŭ 300,000-400,000 jaroj, kaj fosiliojn de mal-supra makzelo, du muelaj dentoj, 3 kaj duona dentoj de alia simihomo.

Fakuloj opinias, ke la fosilia kranio apartenas al la plejstoceno kaj proksimas al la geologia historio de la Pekin-simihomo. Tiu trovo prezentis gravan pruvon al esploro pri la origino kaj evoluo de la homaro kaj esploro pri la komuneco de kaj diferenco inter la sudaj kaj nordaj antikvaj ĉinoj.

La Kanto kaj Danco de la Manĉuroj

La manĉuroj estas unu el la ĉinaj naciecoj kun longa historio. Ili ekaperis en la 11-a jarcento a. K. Nun tiu nacieco nombras pli ol 2.6 milionojn da membroj.

La manĉuroj faris sian kontribuon al la ĉina literaturo kaj arto. La romano "En Ruĝa Buduaro"

verkita de Cao Xueqin, manĉura verkisto en la 18-a jarcento, estas rigardata kiel brila monda literaturajo. La manĉuroj amas kanti kaj danci, kaj ilia popola arto havas tre diversajn formojn. Dum festeno la mastroj kaj la gastoj dancadas alterne. Kiam unu kantas, la ceteraj akompanas per ĥoro.




Danco kun tintiloj ĉe la talio



Popola danco esprimanta sopiron de la manĉuroj al feliĉa vivo



Virina solo




Ekspozicio de Krizantemoj

Fotoj de CHUN BO

Fruvintre de 1980 okazis en grandaj parkoj de Beijing ekspozicio de krizantemoj, kiu altiris al si sennombrajn vizitantojn.

Krizantemo, kiu origine kreskis en Ĉinio, estas unu el la dek famaj floroj de Ĉinio. Laŭ ĉina klasika verko, Ĉinio havas 2,000-jaran historion de krizantema kulturado. En la antikveco la ĉinoj havis la moron "ĉiu familio plantas krizantemajn branĉojn, ĉiu homo trinkas krizanteman akvon aŭ krizanteman vinon" en ĉiu krizantema monato. Hodiaŭ la ĉinoj ŝatas planti krizantemon en sia korto aŭ florzazo por beligi la medion.

Ĉinio havas pli ol 1,000 specojn de krizantemoj. Inter la ekspoziciataj krizantemoj troviĝas pli ol 600 valoraj specioj kaj nemalmultaj novaj specioj sennomaj.



Buntaj krizantemoj



La vizitantoj ĝuas krizantemojn.

Sceno artisme aranĝita laŭ intrigo de la ĉina klasika romano "En Ruĝa Buduaro", en kiu Lin Daiyu verkas poemon pri krizantemo.

